


EL POPOLO CINIO

中國藝道



12


1981




TRAFIKO EN BEIJING

Beijing, la ĉefurbo de Ĉinio, estas antikva urbo. Kun la pligrandigo de la urbo kaj la plibonigo de la vivo de la popolo, la trafiko en Beijing senĉese moderniĝas. Kaŭze de la ĉiam kreskanta nombro de aŭtobusoj kaj trolebusoj, la trafiko en Beijing montriĝas tre streĉa. En la lastaj jaroj la Beijing-a magistrato konstruis ĉirkaŭurbajn stratojn kaj subterajn fervojojn kaj larĝigis malnovajn stratojn. Ĉe iuj ĉefaj vojkruciĝoj nove konstruiĝis aŭtovojoj kaj trefkruciĝoj. Samtempe, oni pliiĝis sekurigajn instalaĵojn kaj intensiĝis la edukadon al la ŝoforoj kaj biciklantoj kaj la administradon de la trafiko.

Fotoj de QU WEIBO



Movoplena strato



Nove konstruita aŭtovoja trefkruciĝo






Ĉe vojkruciĝo



Trafikinsulo

Strato en nokto



EL POPOLA ĈINIO

1981
N-ro 12
(279)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

La danco "Koloraj Skulptaĵoj de Dunhuang"

Foto de LAO BAI

Mogao-ŝtonkavernaro de Dunhuang de Ĉinio estas mondfama trezorejo de historiaj artaj objektoj. Tie konserviĝas granda kvanto da freskoj kaj koloraj skulptaĵoj kreitaj en 366-1368 p. K. La freskoj estas belaj kaj la skulptaĵoj versimilaj, kiuj montras la altan arton de antikvaj ĉinaj artistoj. La nomita danco estas kreita de modernaj ĉinaj dancistoj laŭ diversaj pozoj de la koloraj skulptaĵoj.

SUR LA DORSKOVRILO:

La tibeta fresko "Feino"

Kopio de DAN LANG

KOLORAJ SERIOJ:

Trafiko en Beijing

Naturaj belajoj

Fotoj pri naturaj belajoj faritaj de E-istoj

Kantoj kaj dancoj de la hani-oj
Ŝtona skulptaĵaro de Kongwang-monto

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ

Nova industria urbo Wuhu

La tibeta opero "Knabino Langsha"

En Tibeto

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

Vizito al la okcidenta parto de Tibeto	2
La familio de Qamba	6
"Romeo kaj Julieta" surscenigita en Lhasa	8
Trafiko en Beijing	11
KURANTAJ AFEROJ	14
Wuhu — nova industria urbo	15
La nuna vivstato de la ĉinaj salajruloj	17
ESP-NOVAĴOJ	21
VIDINDAJ LOKOJ: Vizito en Zhangjiajie	23
NIA KULTIVEJO:	
Liu Shifu kaj Esperanto	25
Pupistoj interesiĝas pri Esperanto	28
KORESPONDI DEZIRAS	28
SPORTO	27
KULTURAJ NOTOJ	29
Altprodukta kotono Lumian n-ro 1	30
KALEJDOSKOPO	32
Grandaj amikoj de la infanoj	33
Blanka muro (Novelo)	35
AMIKECO: Bonan vojaĝon, Mary!	38
INTER NI	41
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Ĉina Popola Liberiga Milito	42
Konferenco pri la monda krizo de energio	46
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Surklifa ŝtona skulptaĵaro de Kongwang-monto	48

VIZITO AL LA OKCIDENTA PARTO DE TIBETO

En la Tibeta Aŭtonoma Regiono loĝas plejparto de la ĉina tibetana nacieco. Post la paca liberigo de tiu loko en 1951, oni faris demokratian reformon en 1959, renversis la feŭdan servutan sistemon kaj finis la historion de kruela sklavigado al la tibeta popolo dum miloj da jaroj. Tamen pro ne bona plenumado de la naciaj politikoj en la pasintaj jaroj, la tiea produktado disvolvigis malrapide kaj la tibetanoj ankoraŭ ne forlasis malriĉecon kaj postigiĝintecon. Por ŝanĝi tiun staton, la Sekretariato de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazigis speciale kunsidon pri tibeta laboro en marto de la pasinta jaro. En majo de la sama jaro, kamarado Hu Yaobang, la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de KPC, persone faris inspektadon al Tibeto kaj elmetis al la tibeta popolo sespunktan proponon inkluzive de plena praktikado de aŭtonomio en nacieca regiono sub la unueca gvidado de la centra registaro. Konforme al tiu propono, la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono publikigis serion da politikoj. El la sekvanta raporto de niaj specialaj korespondantoj vi povas vidi, ke ĝojinda ŝanĝo jam okazis en Tibeto en la pasinta pli ol unu jaro.

— LA RED.

En aŭgusto de la kuranta jaro ni vizitis la subregionon de Xigaze en la okcidenta parto de Tibeto, kiu estis antaŭe sub regado de Banchan, la viva budho de la sekto Gelugba de lamaismo. Ni ekveturis de Lhasa, la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, transpasis la riveron Yarlung Zangbo, transpasis la monton Kamba La kun alteco de pli ol 5,000 metroj, veturis pli ol cent kilometrojn laŭ la bordo de la fama lago Yangzhogyum kaj atingis la urbeton Xigaze.

“REVENIS LA NACIAJ POLITIKOJ DE LA PARTIO!”

Xigaze estas la dua grava urbo de Tibeto. Antaŭe ĝi estis la ĉefurbo de la Malantaŭa Tibeto kaj nun tie troviĝas la subregiona registaro. Nin akceptis Losang Gyancan, la subregiona estro, en sia kabineto.

“Ekde la pasinta jaro,” li diris, “grandaj ŝanĝoj okazis al la subregiono Xigaze. Rilate al la kialo de tiuj ŝanĝoj la tibetaj popolamasoj laŭdis: ‘La naciaj politikoj de la Kompartio revenis al la vasta altebenajo.’”

Losang Gyancan estas veterana tibetana kadro kun aĝo de 45 jaroj, kaj li laboras kiel gvidanto de tiu subregiono de la sepdekaj jaroj kaj havas profundan konon pri la vojo irita en la 30 jaroj post la liberiĝo de Tibeto. Li diris, ke la Centra Komitato de la Partio ĉiam persistis en la opinio, ke oni praktiku en Tibeto, laŭ ĝiaj efektivaj kondiĉoj, specialajn politikojn malsamajn al tiuj en la regionoj loĝataj de han-nacieco, kiel ekzemple respekti la morojn kaj kutimojn de la tibetanoj, unuiĝi kun la patriotaj personoj en la superaj socitavoloj tibetaj, permesi libere kredi religiojn, disvolvi la tibe-

tan ekonomion, kulturaj tibetanajn kadrojn ktp. Tio akcelis la disvolviĝon de diversaj konstruaj aferoj, plibonigis la vivon de la popolo kaj ricevis varmajn laŭdojn de la vastaj amasoj de tibetanoj. Sed dum la dek jaroj de la “kultura revolucio”, la naciaj politikoj de la Partio estis detruitaj. En politiko oni troe emfazis klasbatalon kaj en ekonomio oni limigis la amasojn en disvolvo de produktado. Tio damaĝis la nacian solidarecon, malhelpis la produktadon kaj malbonigis la vivon de la popolamasoj.

Losang Gyancan diris, ke la subregiona registaro nuligis multajn maljustajn kaj erarajn verdiktojn kaj enoficigis grandan nombron da patriotoj el la superaj socitavoloj en ŝtataj institucioj, laŭ la instrukcioj de la Centra Komitato de la Partio. Krome, la registaro asignis gran-

dan monsumon por ripari la famajn templojn de la lamaismaj sektoj kiel Zhashilumpo, Sagya kaj Baigoin Qoide kaj krome la tibeta lingvo estas proklamita la unua oficiala lingvo kaj en aktoj, dokumentoj, anoncoj kaj instruado oni uzas paralele la tibetan kaj hanan lingvojn. Ĉio tio ricevis subtenon kaj bonvenigon de la tibetaj amasoj kaj personoj de diversaj socitavoloj kaj plibonigis la rilatojn inter la naciecoj.

Por efektiviĝi aŭtonomion de nacimalplimulta regiono, la subregiona registaro de Xigaze energie kulturis kaj promociis grandan nombron da tibetanaĵoj kaj kadroj. Nun la tibetanaĵoj konsistigas 65% de la kadroj de la tuta subregiono kaj 60% de la kadroj de la subregiona kaj gubernia niveloj. Ĉiuj ĉefaj gvidantoj de la 19 gubernioj de tiu subregiono estas tibetanoj kaj ankaŭ ĉiuj gvidantoj de la distriktoj estas tibetanoj. Losang Gyancan diris, ke la praktiko pruvis, ke la kadraro kun tibetanoj kiel la ĉefa konsistiga parto ludas gravan rolon en efektiviĝo de la principoj, ke la tibeta popolo mem administru siajn aferojn kaj praktiku aŭtonomion en la nacimalplimulta regiono.

GUBERNIESTRO LAŬDATA DE LA POPOLO

Refoje ni vizitis la urbeton Gyaze. Kiam ni unuafoje vizitis ĝin antaŭ du jaroj, ĝiaj stratoj estis en malprospereco. Sed ĉifoje ni vidis, ke en la butikoj kaj standoj ambaŭflanke de la stratoj vendiĝas vere abunde da diversaj vivbezonaĵoj, lanaj litkusenoj, antaŭtukoĵoj, krudaj lanŝtofoj produktitaj de tibetaj metiistoj, buterujoj, lig-



Tibetanoj de Chengbei-komunumo de la gubernio Xigaze transportas rikoltitan tritikon.


naj bovloj, tibetaj tranĉiloj, oraj kaj arĝentaj ornamaĵoj por virinoj, agrikulturaj kaj flankokupaj produktadoj, kaj la svarmoj da tien kaj ĉi tien irantaj amasoj sur la stratoj prezentis vere prosperan scenon.

Kial okazis tiel rimarkinda ŝanĝo en la daŭro de nur du jaroj? Yao Bingshun, vicestro de Gyaze-gubernio, donis al mi jenan klarigon:

Gyaze estas grava pasejo por komunikado kun la antaŭa kaj malantaŭa Tibeto kaj la grava urbeto Yadong ĉe la suda limo de Tibeto kaj ankaŭ grava urbeto de komerco kaj metia produktado. La tapiŝoj kaj lanaj kusenoj kun ekzotikaj desegnoj en brilaj koloroj kaj karakterizataj per moleco kaj elasteco produktitaj en tiu urbo delonge ĝuas grandan renomon en kaj ekster Ĉinio. La plejparto de ĝiaj loĝantoj sin okupas de generacio al generacio pri metiarto, komerco kaj diversaj servoj. Dum la dek ĥaosaj jaroj, la

tradiciaj metio kaj komerco estis limigataj kiel "kapitalismo" kaj la metiistoj kaj komercistoj estis devigataj okupiĝi pri agrikulturo. Rezulte de tio, malaltiĝis la enspezo de la loĝantoj, mizeriĝis ilia vivo kaj la prospera Gyaze dronis en depresio.

La nova guberniestro Puncog estas 39-jara ekservutulo, kiu partoprenis en la ŝtata laboro dum la demokratia reformo. Li tre zorgas la amasojn en malfaciloj. Post enketado, li konvinkigis, ke la metiartaj kaj komercaj aktivadoj de la urbanoj utilas al disvolvo de la produktado kaj plibonigo de la vivo de la popolo. Sekve li persvadis kaj konvinkis la aliajn gvidantojn kaj faris decidon kun ili, ke la loĝantoj kiuj volas denove okupiĝi pri metiarta produktado aŭ komerco povas ricevi grenon de la ŝtato. Kaj krome koncernaj institucioj liveris 12.5 tunojn da lano, 7.5 tunojn da greno kaj 200,000 juanojn kiel pruntomonon por helpi la loĝantojn en solvo de manko de materialo kaj



Paŝtejo de Zhongzi-komunumo de Gyaze-gubernio

kapitalo. Tiu paŝo aktivigis la loĝantojn en rekomenco de sia antaŭa okupo kaj akcelis la restarigon de naciaj metiproduktaĵoj kaj komerco. Nun en la urbeto funkcias 19 kolektivaj kaj 140 individuaj metiartaj kaj komercaj entreprenoj, kiuj produktas diversajn metiartaĵojn kiel tapiŝoj, lanaj kusenoj, kruda lanŝtofo, bovloj por butera teo, fingraj kaj orelaj ringoj k.s. La revigliĝo de la antikva urbeto ne nur multigis la enspezojn de la loĝantoj kaj plibonigis ilian vivon, sed ankaŭ akcelis la interŝanĝon de varoj inter la urbo kaj kamparo.

Kvankam Puncog laboris nur pli ol unu jaron kiel guberniestro de Gyaze, ni tamen aŭdis multajn laŭdojn pri lia laboro, kaj oni intime nomis lin "nia bona guberniestro".

RIĈIĜO DENOVE ESPEREBLA

Namling-gubernio situas sur la norda bordo de Yarlung

Zangbo ĉe ĝia meza parto kaj limtuŝas la vastan stepon de norda Tibeto. La meznombra alteco de ĝia tereno estas 4,000 metroj super la mara nivelo. Pro frosteco, la agrikulturo de tiu loko estas ne stabila. Post printempa semado, kunportante siajn instrumentojn per gruntoj, la tieaj kamparanoj kutime iras al la stepo de norda Tibeto por tie tani felon, fari selojn, fosi putojn k.s., kaj ili revenas hejmen antaŭ aŭtuna rikolto. Sed dum la dek ĥaosaj jaroj de la "kultura revolucio", tiu vojo por perlabori monon estis blokadita kaj tiu fame konata riĉa gubernio malriĉiĝis.

En la pasinta jaro, la popola registaro de Namling ŝanĝis la politikon kaj permesis la terkulturistojn fari flankokupojn en la paŝta regiono. Krom la supre diritaj tradiciaj okupoj, oni ankaŭ faras domkonstruadon kaj transportadon kaj kolektas brullignon kaj drogherbojn. Laŭ statistiko, la totala flankokupa enspezo de la komunumoj kaj

brigadoj de tiu gubernio atingis 1,050,000 juanojn, t.e. je 380,000 juanoj pli multe ol tiu en la pasinta jaro. Ĉijare, la gubernia popola registaro donis dekmilojn da juanoj por helpi la komunumanojn en aĉetado de instrumentoj kaj gruntoj kaj pro tio ankoraŭ pli altiĝis la entuziasmo de la popolamasoj por flankokupoj. La totala flankokupa enspezo de la tuta gubernio en la unua duono de tiu ĉi jaro jam atingis 700,000 juanojn. La enspezo de flankokupoj de multaj komunumoj kaj brigadoj jam superis la totalan enspezon de la pasinta jaro. Gvidantoj de la gubernio diris kun memfido: "La flankokupa enspezo de la tuta gubernio en la kurenta jaro certe duobliĝos kompare kun tiu de la pasinta jaro, se oni klopodos ankoraŭ pli energie." La popolamasoj opinias ĝenerale, ke riĉiĝo denove estas esperebla, se oni agas en tia maniero.

Guberniestro Namgyal diris: "La disvolviĝo de flankaj okupoj ne malhelpas la agrikulturan produktadon. En 1980, la totala produktokvanto de greno kaj oleo atingis pli ol 19 milionojn da kilogramoj, je pli ol 1.45 milionoj da kilogramoj pli multe ol tiu de la jaro 1979 kaj je pli ol 500,000 kilogramoj pli multe ol tiu de la rekorda jaro 1977. Pro riĉa rikolto de agrikulturo kaj disvolviĝo de flankokupoj en la pasinta jaro la jara enspezo de greno kaj mono de la komunumanoj atingis la plej altan nivelon post la popolkomunumigo.

JA PLI BONA ESTAS NIA SOCIALISMA PATRIO!

Laŭ dekreto de la popola registaro de la Tibeta Aŭtonoma

Regiono, la registaro de Xigaze-subregiono deklaris: Ekde 1980 la registaro ne impostos agrikulturon, brutobredadon, industrion kaj komercon por du jaroj kaj firme efektiviĝos la politikon pri privataj terpecoj, dombrutoj, arbaroj kaj familiaj flankokupoj; kamparaj foiroj estos malfermitaj, rekomenciĝos produktado de tradiciaj plantaĵoj kiel sekalo, fazeoloj kaj kolzoj; kaj diversformaj produktaj sistemoj povos esti aplikataj laŭ la volo de la popolamasoj kaj konforme al lokaj kondiĉoj. Losang Gyancan diris al ni, ke ĉio ĉi tio estas varme akceptita de la tibeta popolo kaj stimulis ĝian aktivecon. En la pasinta jaro, oni akiris riĉan rikolton en agrikulturo, brutobredado kaj flankaj okupoj de la subregiono kaj kreis jenajn kvin rekordojn en la historio:

1. La totala produktokvanto de greno kaj oleo atingis 178,690 tunojn, je 8.13 procentoj pli multe ol tiu de la rekorda jaro 1978;

2. La brutaro de la tuta subregiono kreskis je 20 procentoj kaj atingis rekordan nombron post la popolkomunumigo en 1970;

3. La kolektiva flankokupa enspezo de la tuta subregiono atingis 13,500,000 juanojn, je pli ol 5,000,000 juanoj pli multe ol la plej alta cifero en 1979;

4. La meznombra persona enspezo de la kamparanoj kaj paŝtistoj de la tuta subregiono atingis 159 juanojn, je 25 juanoj pli multe ol tiu de la rekorda jaro 1979;

5. La meznombra persona grenporcio de la tuta subregiono atingis 324 kilogramojn, je pli ol

50 kilogramoj pli multe ol tiu de la rekorda jaro 1978.

Losang Gyancan diris, ke kvankam en la kuranta jaro la tuta subregiono suferis sinsekve plagojn de trosekeco, inundo, neĝego, hajlado, fiinsektoj kaj plantmalsanoj, tamen la grenplantoj bone kreskas dank' al bona flegado kaj riĉa rikolto jam estas antaŭvidebla. Ankaŭ la brutobredado disvolviĝis certgrade, la ŝafoj kaj bovoj estas grasaj kaj ankoraŭ pli bone prosperas la flankokupaj produktadoj.

Deloin Sanggyai Qoipei, vicestro de la subregiona registaro kaj patrioto el la supera socitavolo, diris al ni, ke antaŭ la Novjara Tago laŭ la tibeta kalendaro li iris al popola komunumo de Xigaze-gubernio kaj survoje renkontis avinon Lhagqung kun aĝo de pli ol 70 jaroj. La maljunulino prenis lian manon kaj diris al li: "Mia familio konsistas el nur du membroj: mi kaj mia edzo. En la pasintaj jaroj ni vivis tre malfacile, sed nun pliboniĝis nia vivo, dank' al la bonaj politikoj de la Partio!" Kaj montrante al la ŝtofo, teo, manĝiloj kaj aliaj objektoj en la korbo sur sia dorso ŝi aldonis: "Vidu, nun mi jam havas monon por aĉeti tiajn bezonaĵojn. Nun mi deziras vivi pli multajn jarojn por ĝui la belan vivon." Tiuj vortoj forte kortuŝis lin.

Ankaŭ la agrikulturo, brutobredado kaj flankokupaj produktadoj de Yadong-gubernio ĉe la landlimo pliboniĝis ol en la pasinta jaro kaj la popolanoj ĝuas bonan vivon. Multaj tibetanoj, kiuj elmigris antaŭ kelkaj jaroj, revenis al siaj hejmlokoj kun siaj brutaroj. Ili diris: Ja pli bona estas nia socialisma patrio!



Prezidanto de la Virina Federacio de Xigaze-subregiono laboras kune kun komunumanoj.



Laboristino de tapiŝa kooperativo de Gyaze prilaboras tapiŝon.

La Familio de Qamba

de Liu Yunsheng kaj Zuo Sang

LHASA, la ĉefurbo de Tibeto, signifas feliĉan lokon en la tibeta lingvo. Sed antaŭ la Liberiĝo ĝi estis infero por la laboranta popolo. Nur hodiaŭ en la socialisma socio ĝi fariĝis vera feliĉa loko por la liberigitaj servutuloj.

Iun aŭgustan tagon ni venis al nove konstruita etaĝdomo sude de Dazhao-templo en Lhasa por viziti la familion de Qamba, servutulo en la pasinteco kaj nun direktoro de la pogranda vendejo de la Lhasa-a Komerca Kompanio. La mastro afable kondukis nin en la gastaĉambro kaj prezentis al ni aroman buteran teon.

Lia familio enloĝiĝis antaŭ nelonge en tiu nova domo 7-ĉambra kun plankareo de pli ol 140 kvadrataj metroj. La ĉambroj estas grandaj, kun koloraj tapiŝoj. La fenestroj estas garnitaj per kurtenoj, kaj sur iliaj bretoj metiĝas potoj kun floroj.

“Jen nia tuta familio,” diris Qamba, montrante la foton sur muro. “Ni, ses gefratoj, ĉiuj havas laboron. Inter ni estas ŝtatificisto, oficiro de la Liberriga Armeo, laboristoj k.a. Dimanĉe ni kunestas en la hejmo — jen kun granda intereso diskutas pri ŝtataj aferoj trinkante buteran teon, jen kantas kaj dancas laŭ melodio de radio-ricevilo.”

Qamba (la tria de maldekstre) ĝoje interparolas kun siaj familianoj.



Qamba, pli ol 40 jarojn aĝa, impresis min per modesteco kaj sincereco. Kaj je tio ni petis lin rakonti al ni iom pri sia travivaĵo.

“Tio ja ne estas direbla per unu vorto!” li kun klinita kapo refreŝigis la memoron kaj ekparolis lante. “Mia patro naskiĝis en montvilaĝo en Zhanang-gubernio de Shannan-regiono. Jam en sia knabeco li fariĝis servutulo de feŭdmastro. Poste li iris al Lhasa, sekvante la feŭdmastrojn. Tie li prizorgis la ĉevalon de la lasta tage kaj nokte. Post longaj jaroj restis nur liaj ombro kaj piedsignoj.

“Tujare la feŭdmastro ordonis, ke mia patro kontrolu kaj pesu la grenon konservatan dum multaj jaroj. La febla maljuna patro tion faris en malhela grenejo kaj grave malsaniĝis je pulmito de trolaciĝo kaj sorbado de tro da polvo. Li sputis sango kaj ne povis ellitiĝi. Sed dirante ke mia patro ŝajnigas sin malsana, la feŭdmastro ordonis siajn homojn ligi mian patron al paliso kaj lin skurgi kaj bastonis. La krueluloj eĉ ŝtonbatis al li la bruston, ke li vundiĝis tutkorpe. Baldaŭ mia patro bedaŭrinde forlasis la homan mondon.

“Post lia morto mia patrino devis vivteni la familion kun sep membroj, kiuj baraktis inter la vivo kaj la morto. Kaj ĝuste en tiu momento sendito de la feŭdmastro diris al mia patrino: ‘Sendu vian unuan filon Qamba al la mastro, por ke li laboru anstataŭ via mortinta edzo!’ Tiam mi estis nur 9-jara. Ne tolerante, ke mi suferu kiel la paĉjo, la panjo petis parencon sendi min ŝtele al Zhebang-tem-

plo por fari min lamaisto. Kie ni malriĉuloj povus vivi en tiu malnova socio? En la templo mi tage surdorse portadis akvon kaj purigis ĉambrojn, kaj nokte nutradis la ĉevalojn kaj gardis la templon. Mi estis tutjare nudpieda, laca kaj malsata, troviĝis nenio alia por mi krom pedikoj vivantaj sur mia korpo. Pro timo, ke la feŭdmastro kaptos min, mi fuĝis poste al malgranda templo en vilaĝo por min kaŝi. La panjo kune kun miaj gefratoj vagadis tien kaj tien por almozpeti..." Qamba haltis momenton kun larmoj en la okuloj kaj daŭrigis kun emocio: "La suferoj en la malnova socio ne povas esti tute elverŝitaj dum kelkaj tagoj! Kiom alte staras Himalaya-montaro, ĝi tamen havas sian pinton; kiom longa estas Yarlungzangbo-rivero, ĝi tamen havas sian fonton. Fine al sia fino venis la mizera vivo de la tibeta popolo!"

En 1951 Tibeto pace liberiĝis! "Tiam la popola registaro alprenis diskretan politikon rilate al Tibeto, kiu lasis la tri grandajn feŭdmastrojn daŭre teni la regpotencon. Tamen la Kompartio amas la malriĉulojn. Nia familio ricevis monhelpon por la vivo, miaj du pliaĝaj fratinoj estis senditaj al Beijing (Pekino) por studo, ankaŭ mi mem laboris portempe en hidroelektrajo. Nia familo saviĝis el la seneliro," diris Qamba.

En 1959 ribelis la tibeta super-tavola reakcia kliko. Sub la gvido de la popola registaro la tibeta popolo subpremis la ribelon kaj renversis la putran feŭdan servutan sistemon, ke la miliono da servutuloj liberiĝis kaj fariĝis mastroj de Tibeto.



Qamba ofte partoprenas en transportado.

"Post la demokratia reformo," ĝoje diris Qamba, "ĉiuj en nia familio ekhavis laboron, krom tiuj vizitantaj lernejon. Panjo laboras en la Grena Buroo de Lhasa, la du pliaĝaj fratinoj laboras respektive en radiostacio kaj en Nyemo-gubernio, mia unua plijuna frato estas tradukisto en la redakcio de la loka revuo 'Milicio', la dua — elektristo, kaj la fratineto — laboristino. Antaŭe mi laboris en la gubernio Damxung kiel vicestro de proviza kaj venda kooperativo, vicedirektoro de la gubernia komerca kompanio kaj estro de la komerca sekcio. Lastjare mi venis al Lhasa por funkcii kiel direktoro de la pogranda vendejo de la Komerca Kompanio de la Lhasa-a Komerca Buroo. Kaj la mastrumadon prizorgas mia edzino sola." Li kalkulis la enspezon de sia familio: Inter la 25 familianoj troviĝas 13 salajruloj. La tuta familio enspezas pli ol 1,500 juanojn ĉiumonate, t.e. laŭkape ĉiu havas 60 juanojn ĉiumonate por sia vivteno.

Poste, montrante la litkovriilojn sur la tapiŝo, li diris: "Nun la tuta familio ne suferas de manko de vestoj, la litajoj ĉiuj estas novaj, kaj la mebloj estas de ĉiaj specoj. Ni ĉiuj, escepte de la infanoj, portas altklasan brakhorloĝon. Ĉiuj salajruloj havas biciklon. Jam antaŭlonge ni aĉetis magnetofonon, kudromaŝinon kaj televidilon. Krome ankaŭ abundas manĝaĵoj. Ni ankoraŭ ne formanĝis du bovojn kaj tri ŝafojn aĉetitajn antaŭ la lasta vintro. Ni ĉiutage trinkas buteran teon kaj sekalvinon. Ni vivas vivon feliĉan!"

Ĉe tiuj vortoj la bruna vizaĝo de Qamba disradiis ruĝan brilon de ekscitiĝo. La suno estis subiranta jam sur la oran tegmenton de Potala-palaco, kaj ni manpremis kun Qamba por lin adiaŭi.



"ROMEO KAJ JULIETA"

SURSCENIGITA EN LHASA

de PENG ZHANKUI

EN julio de la kuranta jaro, la diplomitoj de la tria tibetana dramluda klaso de la Shanghai-a Dramaturgia Instituto revenis al Tibeto, kaj per sia ludo de la fama tragedio "Romeo kaj Julieta" de Ŝekspiro en la tibeta lingvo ili rikoltis varmajn aplaŭdojn de la literaturaj artaj rondoj kaj spektantoj de Tibeto. Ili ludis ĝin 11 fojojn sinsekve en teatro plena de spektantoj, kiuj ĉiam tenis tre bonan ordon kaj varme aplaŭdis post la ludado. Post la rigardado multaj el la spektantoj diris kun starigita polekso: "Bonege! Bonege!"

Estis vere ĝojinde, ke la debuto de la junaj tibetaj aktoroj rikoltis tiel multe da laŭdoj. Sed kiu povas imagi al si, kiom diligente laboris kaj kiom zorgeme strebadis instruistoj de la

Shanghai-a Dramaturgia Instituto por kulturi la tibetajn lernantojn kaj havigi al la tibetanoj ŝancon aprezi la mondfaman dramon!

Antaŭ kvar jaroj la nomita instituto akceptis 30 tibetajn studentojn, kiuj estis plejparte infanoj de paŝtistoj kaj terkulturistoj. Plejparto de ili ne povis skribi en la tibeta lingvo des malpli en la hana, kaj la plej klera el ili atingis nur la nivelon de mezlerneĵano de unuajara klaso. Pro longa sinokupado per fizika laboro en kamparo, iliaj korpoj ne respondis al la postuloj pri formo kaj ili konis la literaturon kaj artojn tiel malmulte, ke iuj eĉ neniam aŭdis la vorton "dramo".

La instruistoj rigardis la kulturadon de tibetaj popoloj

artistoj kaj helpadon al disvolvo de kulturo kaj artoj en Tibeto kiel sian gloran taskon kaj devon. Ili decidis bone kulturi tiujn tibetajn studentojn malgraŭ ĉiaj malfaciloj. La 49-jara instruisto Xu Qiping iniciative prenis sur sin la taskon esti ĉefinstruisto de tiu klaso, kaj kelkaj aliaj instruistoj volonte akceptis la taskon de instruado al ĝi.

En la unua jaro, Li Ruisheng instruis la hanan lingvon al la gestudentoj kiel iradon al infanoj. Estas imageble kiel malfacile estis instruadi la lingvon al la gestudentoj, kiuj scipovis eĉ neniun frazon en ĝi! Li instruadis ilin farante diversajn gestojn, kvazaŭ en interparolo kun surdmutulo. Por instrui la vortojn "malfermi pordon", li iris al la pordo kaj ĝin malfermis: kaj por instrui al ili la vortojn "fermi fenestron", li iris al la fenestro kaj ĝin fermis. Li rapidis jen tien, jen ĉi tien en la klasĉambro kiel aktoro. Per tio li kortuŝis la gestudentojn. Por helpi ilin bone ellerni la hanan lingvon, li mem kompilis tri lernolibrojn taŭgajn por ili. En unu sola jaro, la studentoj jam ellernis ĉ. 1,500 vortojn, ili povis legi librojn kaj ĵurnalojn, iuj el

Scenoj el "Romeo kaj Julieta"



ili eĉ verkis poemojn en la hana lingvo.

Eĉ pli multajn malfacilojn oni renkontis en instruado de dramluda arto al la tibetaj studentoj. En la komenco, rigardante teatraĵojn por lernado ili interesiĝis nur pri la sensaciaĵoj; en lerno de muziko ili devis komenci de la muziknotoj; kaj en lernado de dramludo ili havis nenian komprenon pri la afero. Malgraŭ ĉio ĉi tio, Xu Qiping, kiu respondecis pri instruado pri dramludo, ne deprimiĝis. Li trovis kun ĝojo, ke la tibetaj studentoj honestaj kaj sinceraj respektas la instruistojn, lernas diligente kaj estas riĉaj je sentoj kaj saĝeco dotita de la naturo, ĉio ĉi altigis lian memfidon kaj pliiĝis lian amon al ili. Por rapide havigi al ili kapablon de dramludo kaj altigi ilian prezentan arton, instruisto Xu klopodis eltrovi novajn instruaĵajn rimedojn, kiujn li aplikis al ili ekster la plenumado de la instrua plano. Li gvidis ilin al la zooĝardeno en la okcidenta antaŭurbo de Shanghai por observadi bestojn kaj postulis, ke reveninte al la instituto, la studentoj imitu movojn kaj gestojn de simioj, cervoj, lupoj, ursoj ktp. Por stimuli ilin en imitado kaj prezentado, li ofte imitis,

kiel infano, katon aŭ hundon, tiel komprenigante al la studentoj la prezentan arton en amuziĝo. Krome, li ofte gvidis ilin en promenado sur strato por observi irantojn kaj post reveno al la instituto li postulis, ke ili faru notojn pri la familio, profesio, karaktero kaj ŝatokupo de observitaj irantoj laŭ iliaj vestaĵoj kaj movoj. Dank' al tio kreskis la observa kapablo kaj imagpovo de la studentoj.

Iuj diris, ke instruisto Xu ludis samtempe la rolojn de profesoro kaj gubernisto. Vere tiel estis. Se iuj el la dekelkjaruloj eksopiris sian hejmon, li konsolis ilin; se iuj el ili malsaniĝis kaj devis kuŝadi en hospitalo, li iris vidi ilin, kunportante al ili bongustaĵojn. Li kaj lia edzino ankaŭ ĝoje pasigis festotagojn kune kun ili, por ke ili ne sentu solecon. Dum ilia kvar-jara lernado en Shanghai, Xu pasigis kune kun ili ĉiujn Novjarajn Tagojn.

La kora prizorgado kaj ŝvitlaborado de la instruistoj rapide kreskigis la junajn artistojn. Antaŭvespere de ilia diplomitiĝo, Xu kuraĝe elektis la faman tragedion "Romeo kaj Julieta" de Ŝekspiro por ilia provludado. Kvankam tiu teatraĵo estas mal-

facila, tamen instruisto Xu opiniis, ke la altigo de prezenta arto estas atingebla nur per praktikado, kaj en provludado de tiu dramo la studentoj povos multe ellerni. Kaj li kredis, ke la studentoj povos ĝin ludi kun sukceso post lernado de pli ol tri jaroj.

Post la komenciĝo de la provludado, Xu plene sin dediĉis al tiu laboro kaj tage kaj nokte li direktis la provludadon de la studentoj; kaj li eĉ trenis sian edzinon, kiu instruis en la sama instituto, en la laboron por direkti la prezentadon. Li klariĝadis kaj demonstradis, oni ne scias kiomfoje, al la studentoj por instrui al ili prezentadon de malfacilaj gestoj kaj sentoj kaj ĉesis nur kiam ili povis tion fari kontentige. Lernantino Nima, kiu ludis la rolon de mamnutristino, ne sciis kia estas fremdlanda mamnutristino, des malpli pri mamnutristino en itala aristokrata familio en la meza epoko, kaj estis tre malfacile por ŝi ludi tiun rolon. Xu ŝin kuraĝigis, ke ŝi unue bone ludu rolon de mamnutristino konata en la vivo kaj poste lernu ludi rolon de fremdlanda mamnutristino. Li foje refoje klarigis al Nima kaj aliaj gestudentoj sciojn pri pentrarto, skulpturo kaj danca-

Reĝisoro Xu Qiping (meze) diskutas kun studentoj pri roloj en opero.



do, rigardis kune kun ili fremdlandajn filmojn kaj helpis ilin posedi arton de prezentado. La dua sceno "Rendevuo sur Balkono" prezentas lunnoktan okazaĵon. Por ke lernanto Dobjial, kiu ludis la rolon de Romeo, havu propran sperton pri tia sceno kaj bone ĝin ludu, Xu direktadis, kune kun sia edzino, la provludadon de la studentoj en lunlumo, ofte ĝis noktomezo. Kvankam tre laciga estis la laboro, tamen li sentis koran ĝojon vidante la progresadon de la gestudentoj. Foje studentino Deyang, kiu ludis la rolon de Julieta, ne plenumis sian hejmtaskon pro vizito al amiko, kaj informiĝinte pri tio, Xu diris serioze al la klasanoj: "Ĉu vi ankoraŭ volas ludi la dramon sukcese? Vi estas junaj ka' an-

koraŭ ne konscias, kiom pezan ŝarĝon vi portas sur la ŝultroj. Vi devas strebi por honoro de la tibeta nacieco!" Liaj vortoj forte kortuŝis la gestudentojn.

Finiĝis la kvarjara lernado. En la 13-a de julio ili revenis kun riĉaj atingoj en lernado al sia hejmloko longe nevidita — Tibeto. Kiel forte ili emociiĝis! Sen vizito al siaj parencoj, ili jam tuj komencis intense sin okupi per provludado, aranĝo de dekoracioj kaj baldaŭ prezentadis "Romeo kaj Julieta" al la tibeta popolo, kaj krome ili ludis ankaŭ la dramon "Princo Dasang", kiu estas adaptaĵo de tibeta popolrakonto. Propraokule vidinte la sukcesan prezentadon de la studentoj, sentis senliman kontentecon instruisto Xu, kiu speciale akompanis ilin al Tibe-

to. Je lia reveno al Shanghai, la Kultura Buroo kaj aliaj institucioj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono donacis, pere de li, honoran standardon al la Shanghai-a Dramaturgia Instituto, kiu portas jenan surskribon: "Dank' al diligenta flego de Shanghai-aj ĝardenistoj, jen la junaj plantoj ekfloras ĝojige sur la altebenaĵo."



(Daŭrigo de p. 31)

nombra hektara produktokvanto de sensemigita kotono atingis 1,845 kg. kaj tiuflanka enspezo superis 322,000 juanojn, t.e. 80% de la totala enspezo de la tuta brigado. Ekriĉiĝis kaj la komunumanoj kaj la kolektivo. Mi vizitis multajn familiojn kaj vidis, ke ili ĉiuj estas ĝojplenaj kaj iuj el ili sin preparas por konstrui novajn domojn, aĉeti biciklojn, stebmaŝinojn, brakhorloĝojn kaj aliajn objektojn.

"Vere bona estas *Lumian* n-ro 1!" ĝoje diris al mi iu maljunulo. "Ni kore ĝojiĝis vidinte la neĝblankan kotonon ĉe la aŭtuna rikolto."

Mi informiĝis de vicsekretario de la gubernia kompartia komitato, ke kvankam reduktiĝis la grenkampoj pro disvastiĝo de la nomita specio de kotono, tamen

kun granda pliprodukto de kotono la produktaj brigadoj akiris pli da mono por aĉeti kemian sterkon, dank' al kio leviĝis la totala grena produktokvanto. Nun la pormanĝa greno de la tieaj loĝantoj estas garantiata — ĉiu el ili ricevas pli ol 300 kg. da greno ĉiujare. Kaj plie, la ŝtato levis dufoje la kotonan aĉetprezon en la lastaj jaroj, tial la komunumanoj konkure kultivas kotonon. Nun oni praktikas novan produktan sistemon laŭ kiu ĉiu respondecas pri sia produktita tasko, kio multe pli levis la laboraktivecon de la komunumanoj. La bona specio ne nur pliigis la produktokvanton je 30-40% kompare kun tiu en la pasinteco, sed ankaŭ plialtigis la kotonan kvaliton. Inter la 110,000 kotonkultivantaj familioj de Lingqing-gubernio troviĝis 27,000 familioj, kiuj enspezis po

pli ol 1,000 juanojn en la lasta jaro, kaj 4,000 familioj kun jara enspezo de pli ol 3,000 juanoj. Kiel ili povus ne ĝoji kun la kresko de enspezo!

Sed la vojo estas longa kaj la scienca laboro ne konas finon. Evidenta estas la ekonomia frukto liverita de la grandarea pliprodukto de kotono. Sed la scienc-esploristoj ja ne ebriiĝis de siaj sukcesoj. Ili diris al mi, ke la fibro de *Lumian* n-ro 1 estas malpli bona ol tiu de *Daizi* n-ro 15, kvankam la produktokvanto de la antaŭa estas pli alta ol tiu de la lasta. Kaj ili decidis daŭre klopodi por elkultivi novan kotonan specion, kiu kun la sama rezistemo kontraŭ malfavoraj naturkondiĉoj povos produkti kotonon pli multan ol *Lumian* n-ro 1 kaj pli bonkvalitan ol *Daizi* n-ro 15.

TRAFIKO EN BEIJING

de Hua Wen



Torento da bicikloj en mateno

LA trafiko en Beijing (Pekino), la ĉefurbo de Ĉinio, ŝajne ne estas tiel moderna kiel tiu en grandaj urboj de la evoluantaj landoj. Tamen ĉiu, kiu konas la historion de la malnova Beijing, konfesas, ke rapida estis la disvolviĝo de la trafiko en tiu urbo dum la 32 jaroj post la Liberiĝo.

Antaŭ la Liberiĝo en tiu antikva urbo troviĝis nur dekkelkaj asfaltitaj stratoj kun totala longeco de 214 km., ili ĉiuj estis en la urbocentro. Iris tie rikiŝoj, tricikloj kaj malmultaj tramoj kaj aŭtobusoj. Hodiaŭ la totala longeco de la asfaltitaj stratoj de la urbo atingis 2,185 km. Ĉiuj popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj en la antaŭurba kamparo estas interligitaj per ŝoseoj. La antaŭaj malnovtipaj trafikiloj malaperis jam en la sesa jardeko. Ilin anstataŭis ĉefe la de Ĉinio mem faritaj novtipaj trolebusoj, artikitaj aŭtobusoj kaj motoraj tricikloj, kies persontrafika kvanto 82-obliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Ekzistas neniuj privataj personaŭtoj en Beijing, kaj ĉiuj aŭtoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, apartenas al la ŝtato. La persontrafika kvanto de la personaŭtoj en malgranda nombro konsistigas nur 3% de la totala persontrafika kvanto. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ŝtato prenis kiel ĉefan laboron la disvolvon de la publika trafika afero de Beijing por akceli la ekonomian disvolviĝon kaj kontentigi la bezonon de la popolo. Ĉe la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, troviĝis en Beijing nur 164 aŭtobusoj funkciantaj sur 11 vojlinioj, kun totala longeco de 77 km., kaj en 1981 la nombro de la trolebusoj kaj aŭtobusoj atingis 3,063, kiuj kuras sur 162 linioj, kun totala longeco de 1,491 km. La persontrafika kvanto kreskis de 28 milionoj da homoj en 1949 ĝis 2,380 milionoj da homoj en la jaro 1980. Hodiaŭ 1,871 haltejoj trolebusaj kaj aŭtobusaj troviĝas sur la ĉefaj stratoj de la urbo, kaj la interhalteja distanco estas ĉ. 0.5 km. Tial estas tre

oportune veturi en la urbo per aŭtobuso aŭ trolebuso.

Kvankam la trafiko en Beijing tiel rapide progresis post la Liberiĝo, tamen tio ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la veturantoj. Ekz-e, en la plej movoplenaj horoj matenaj kaj vesperaj kunpremiĝas 11-12 personoj en ĉiu kvadrata metro en trolebuso aŭ aŭtobuso veturanta laŭ la ĉefaj linioj. En 1979 la Beijing-a popola registaro postulis, ke grandaj institucioj kaj fabrikoj difinu malsamajn tempojn por komenci kaj fini deĵoradon, kun la celo redukti la trafikajn streĉecon en mateno kaj vespero. La kaŭzo de la tropleneco de la publikaj trafikiloj kuŝas en tio, ke draste kreskis la nombro de la loĝantoj kaj vizitantoj dum la lastaj jaroj. Kaj la ŝtato ne povas asigni grandan monsumon al plibonigo de la trafika situacio pro la ekonomia reguligo, tial la plimultiĝo de la publikaj veturiloj ne povas kontentigi bezonon de la urba loĝantaro kontinue plimultiĝanta.

En la Beijing-a Ĝenerala Kompanio de Publika Trafikado mi informiĝis, ke la personaŭtoj plenumas 3%, la publikaj trafikiloj — 36% kaj la bicikloj — 61% de la totala persontrafiko de la urbo, kies loĝantoj veturas meznombre po 700 fojoj jare. Evidente, biciklo estas la ĉefa trafikilo en Beijing. En la plej movoplenta tempo ĉiun el la ĉefaj vojkruciĝoj trapasas pli ol 35,000 bicikloj hore. Ne estas senkaŭze, ke iuj nomas la biciklojn de Beijing “reĝo sur la strato”.

En Beijing estas 3,200,000 bicikloj, t.e. unu por 2.5 loĝantoj. Kial troviĝas tiom multe da bicikloj en ĝi? Ne nur pro la nesufiĉeco de la publikaj veturiloj, sed ankaŭ, kaj ĉefe, pro la multeco de stratetoj tie (laŭdire, ĉ. 4,000) kaj ili ĉiuj sur ebenaĵo. Por aŭtoj estas malfacile veturi en tiuj stratetoj, sed por bicikloj senĝene. Jen ĉiumatene biciklantoj, kiuj veturas al sia fabriko aŭ lernejo, fluas de diversaj stratetoj al la ĉefaj stratoj kaj formas grandan nehaltigeblan torenton. Antaŭ nelonge, kiam la antaŭa usona prezidanto Carter vizitis Beijing, li foje biciklis interesplene sur strato kune kun sia edzino por vidi tian spektaklon.

Bicikloj estas pli taŭgaj en ferioj. Iuj biciklas por viziti parencojn aŭ amikojn kaj aliaj kune kun sia tuta familio bicikle veturas al parko aŭ aliaj pitoreskejoj. Kiam ili biciklas malrapide sur antaŭurba ombroriĉa strato aŭ pado en verda kampo, la biciklo, krom solvi ilian trafikalan problemon, ankaŭ havigas al ili ĝojon kaj plezuron.

La bicikloj fariĝis ŝatataj trafikiloj de Beijing-anoj ankaŭ pro tio, ke ili ne postulas ener-



La serio de du poŝtmarkoj por celebrazo de la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Lusin, la unua montras Lusin en la juneco kaj la alia en la maljuneco.

gion nek kaŭzas polucion, sed male, ekzercas ilin fizike. Krome, biciklo estas malmultekosta, kaj ordinara laboristo povas aĉeti ĝin kontraŭ sia 2-3-monata salajro.

Estas ankaŭ tre facile trovi en la urbo gardejon de bicikloj. Ekz-e, iuj faras provizoran gardejon de bicikloj nur ĉirkaŭigante iun lokon per ŝnuro ligita ĉe arboj. Nature, ĉe iuj magazenoj aŭ teatroj konstruiĝis konstantaj gardejoj kun plasta tegmento, kie instaligis framoj por bicikloj. La gardejoj protektas la biciklojn kontraŭ la suno kaj pluvo. Tage oni povas loki tien sian biciklon tiom longe, kiom li volas, kaj devas pagi nur 2 cendojn. La fabrikoj kaj institucioj havas sian senpagan gardejon. Kaj krome, ĉiu bici-

100-JARA JUBILEO D

La 25-a de septembro ĉijare estis la centa datreveno de la naskiĝo de la ĉina granda literaturisto, pensulo kaj revoluciulo Lusin. En la 24-a kaj 25-a de septembro okazis jubileaj mitingoj por memori pri li en Beijing (Pekino), Shanghai (Sanhajo), Tianjin (Tiangin), Hangzhou (Hangĝoŭ), Guangzhou (Kantono) kaj aliaj urboj.

La plej grandan mitingon okazintan en la Popola Halo de Beijing ĉeestis pli ol 6,000 personoj inkluzive de partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de Ĉinio kaj reprezentantoj de diversaj rondoj. Ĝin ĉeestis ankaŭ amikoj el diversaj landoj.

Hu Yaobang, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, faris paroladon en

klanta salajrulo ricevas ĉiumonate 2 juanojn por riparo.

Sed respondeculo de la Beijing-a trafikala administracio diris al mi, ke bicikloj kaŭzas implikojn al trafikaj administracioj, kvankam ili donas trafikalan oportunon. Profitante la facilmovecon de la biciklo, oni biciklaĉas tiel ke iafoje lia subita apero antaŭ aŭtisto tute lin konfuzas. Laŭ statistiko, 60-70% de la trafikaj akcidentoj en Beijing rilatis al bicikloj, kaj 30% de la viktimoj en la trafikaj akcidentoj estis biciklantoj.

Por disciplini la biciklantojn, la trafikaj administracioj de la urbo alprenis efikajn rimedojn: en la ĉefaj stratoj estis faritaj dividstrioj, ke la bicikloj kaj motorveturiloj iru en sia kori-

LA NASKIĜO DE LUSIN

la mitingo. Li diris, ke Lusin estis granda heroo en la ĉina moderna revolucia historio kaj granda batalanto sur la ĉinaj kultura kaj ideologia frontoj. Li alvokis ĉiujn lerni la revolucionan spiriton de Lusin kaj memori lian senmortan kontribuon al la ĉina popolo. Parolante pri la aktuala stato de la ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj, li konfirmis la sukceson de tiu fronto, kaj samtempe montris ĝiajn nesanaĵojn kaj negativajn flankojn malutilajn al la popolo. Li postulis, ke oni faru ĝustan kritikon pri literaturo kaj arto.

Zhou Yang, fama verkisto kaj la unua vicestro de la Komitato por la Centjara Jubileo de la Naskiĝo de Lusin, faris en la mitingo longan paroladon titolitan per "Persis-

tu en la Direkto de Lusin pri Kulturo kaj Disvolvado de Lian Batalanta Tradicio".

La jubilea aktivado pri Lusin estis senprecedence grandskala. Oni okazigis ekspoziciojn kaj simpoziojn pri Lusin, eldonis liajn verkojn, surscenigis liajn verkojn aŭ adaptis ilin al la ekrano kaj faris statuojn de li.

Lusin ĝuis altan prestiĝon ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la literatura mondo. Laŭ informoj, okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo diversrondaj personoj, specialistoj, kleruloj kaj popolaj organizoj de Italio, Jugoslavio, Pakistano, Britio, Francio, Usono kaj aliaj landoj okazigis memorigajn aktivadojn, inter kiuj estis memoraj kunvenoj, raportaj kunvenoj, simpozio "Lusin kaj Liaj Heredaĵoj", bildaj ekspozicioj pri Lusin kaj liaj verkoj kaj projekciado de filmoj faritaj laŭ liaj verkoj.

doro, kaj estas ofte farata prisekura propagando al biciklantoj kaj konstante praktikataj necesaj trafikaj reguloj; kaj biciklantoj, kiuj malobservas trafikajn regulojn, estas kritikataj kaj tiuj, kies kulpo estas pli serioza, ricevas monpunon aŭ kriminalan punon laŭ leĝo.

Dum la lastaj jaroj la Beijinga popola registaro plirapidigis la konstruadon de vojoj por faciligi trafikon. Krom larĝigi stratojn, oni ankaŭ konstruis la modernan Duan Ĉirkaŭurban Straton en la loko, kie etendiĝis la murego de la interna urbo. Ankaŭ la pli larĝa Tria Ĉirkaŭurba Strato estas en konstruado. Kun totala longeco de 23 km. la Dua Ĉirkaŭurba Strato havas la 28-metrajn koridorojn por motorveturiloj kaj la porbiciklajn

koridorojn ambaŭflanke ĉiu kun larĝeco de 6-8 metroj. Ekde 1973 oni konstruis dek aŭtovoĵajn trefkruciĝojn en la lokoj, kie la Dua Ĉirkaŭurba Strato kruciĝas kun aliaj ĉefaj stratoj de la urbo.

Post la finkonstruado de la Dua Ĉirkaŭurba Strato kaj la

dek aŭtovoĵaj trefkruciĝoj, la meznombra rapideco de aŭtoj veturantaj sur tiu strato atingis 50 km. en ĉiu horo; en la plej movoplena tempo la ĉiuhora trapasa kvanto de motorveturiloj ĉe iuj ĉefaj vojkruĉiĝoj de la urbo reduktiĝis meznombre je 10% kaj la ĉiuhora trapasa kvanto de la antaŭurbaj motorveturiloj irantaj al la urbo reduktiĝis meznombre je 18%, kio plimalpli mildigis la urban trafikajn streĉecon.

Krom tio, post ekzameno la unua subtera fervojo de Beijing inter ĝia fervoja stacio kaj la Pomĝardeno en ĝia okcidenta antaŭurbo kun totala longeco de 23.6 km. kaj 17 haltejoj oficiale malfermiĝis al trafiko en la 15-a de septembro 1981. Tiu fervojo finkonstruiĝis en oktobro de 1969 kaj komencis servi por prova funkciado en januaro de 1971. Dum la 10-jara provado veturis sume 250 milionoj da homoj, kio mildigis en certa grado la streĉan persontrafikon surteran. Post la oficiala transdono de tiu fervojo al trafiko, ĉiutage povas trakuri maksimume 320 trajnoj veturigitaj 190,000 homojn. Kaj alia ĉirkaŭurba subtera fervojo nun estas en streĉa konstruado.

Haltejo de trolebusoj





6 GRANDAJ BASENOJ KUN OLEO KAJ GASO TROVITAJ EN ĈINAJ MAROJ

Ĉinaj laborantoj de maraj stratumoj faris petrol-geologian enketadon en areo de miliono da kvadrataj kilometroj en proksimaj ĉinaj maroj kaj trovis ses grandajn basenojn kun oleo kaj gaso en Bohai-mar, en la suda parto de la Flava Maro, en la Orienta Ĉina Maro, ĉe la buŝo de la Perla Rivero, en Beibu-golfo kaj en la baseno Yinggehai en la Suda Ĉina Maro.

ĈINIO ESPLORIS SIAN RIĈAN SUBTERAN AKVON

Ĉinio estas riĉa je subtera akvo bonkvalita kaj vaste troviĝanta. Laŭ la unua esploro, 300 miliardoj da tunoj da akvo konserviĝas sub 15 nordaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj la norda parto de la provincoj Jiangsu kaj Anhui, kaj 500 miliardoj da tunoj sub la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj en suda Ĉinio.

LIAOYANG-A ĜENERALA PE- TROL-KEMIA KOMPANIO EN PROVA PRODUKTADO

La nomita kompanio, la plej granda petrol-kemia kaj kemifibra kombinumo de Ĉinio, finkonstruiĝis kaj komencis provan produktadon antaŭ nelonge.

Kiam ĝi ekfunkcios oficiale, ĝi produktos ĉiujare 70,000 tunojn da

polietileno kaj polipropileno, kiuj povas anstataŭi 200,000 tunojn da ŝtalo por farado de diversaj objektoj; ĉiujare ĝi produktos ankaŭ 131,000 tunojn da poliestero kaj 300,000 tunojn da kromproduktoj de dekelkaj specoj vaste uzablaj en industrio, agrikulturo kaj scienco esplorado.

LA RIVERA NAVIGADO DE ĈINIO EN GRANDA PROGRESO

Ĉinio havas pli ol 5,800 riverojn kaj pli ol 900 lagojn. En 1980 la rivera floto de Ĉinio transportis sume 330 milionojn da tunoj da varoj.

Ke la motorizita transportado disvolviĝis rapide, tio estas unu el la karakterizoj de la progreso de la surakva navigado de Ĉinio. Nun pli ol 90% de la varoj taskitaj al la rivera transportado estas transportataj de trenŝiparoj. Konforme al tio, oni novigis ankaŭ havenojn, dokojn kaj staplejojn. Ekzemple, la Changjiang-a Buroo de Ŝipa Transportado 4-oble multigis siajn dokojn kaj ŝiphaltojn kompare kun 1952, kaj la kapacitoj de la havenoj grandiĝis 16-oble.

RAPIDA KONSTRUADO DE LOĜDOMOJ EN ĈINAJ URBOJ

1980 estis la jaro, en kiu konstruiĝis plej multaj loĝdomoj en la ĉinaj urboj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. En 1981, kiam oni malgrandigis la skalon de la fundamenta konstruado, la konstruado de loĝdomoj en la ĉinaj urboj tamen estis en relative granda rapideco. De januaro ĝis aŭgusto de 1981 estis konstruataj loĝdomoj kun totala areo de 87,780,000 kvadrataj metroj kaj finkonstruiĝis 22%.

ĈINIO, LANDO KUN PLEJ GRANDA PRODUKTOKVANTO DE DOLĈAKVAJ PERLOJ


En 1980 Ĉinio havis produktokvanton de dolĉakvaj perloj pli multan ol tiu de Japanio konata kiel "perlolando", kaj fariĝis lando kun plej granda produktokvanto de tiaj perloj.

Ĉinio komencis kulturi perlojn antaŭ dekelkaj jaroj. En 1971 ĝi unufoje eksportis al Japanio nur 0.6 kg. da dolĉakvaj perloj kaj en 1980 eksportis al tiu lando 12.1 tunojn valorantajn 6.26 miliardojn da japanaj enoj.

NOVA GRANDA DIAMANTO TROVITA EN SHANDONG- PROVINCO

En 1977 kamparanino de la Changlin-a Produkta Brigado de Linshu-gubernio, Shandong-provinco, trovis tre grandan diamanton. Aŭguston ĉijare laboristoj de diamantminejo de Tancheng-gubernio de la sama provinco trovis alian grandan diamanton pezan je 124.27 karatoj. Tiu diamanto estas kristale blonda.





Kemia fabriko de Wuhu

MU CHANGGEN:

WUHU — NOVA INDUSTRIA URBO

WUHU situas en la malsupra baseno de Changjiang (Jangzi)-rivero. Okcidente de ĝi estas tiu granda rivero, oriente ĝia delto, sude la montregiono de suda Anhui-provinco kaj norde Jianghuai-ebenaĵo. Ĝi havas ĉarmon de lando abunda je akvo kaj verdaj montetoj, ĉu ene aŭ ekstere de la urbo troviĝas montetoj kaj lagoj, kaj pro la belaj pejzaĝoj ĝi estas deantikve turisma loko. Wuhu estas ankaŭ pordo por eniri la fame konatajn pitoreskajn Huangshan-monton kaj Jiuhua-monton, kiu estas unu el la kvar ĉefaj budhismaj sanktejoj de Ĉinio.

Wuhu estas antikva urbo kun historio de pli ol dumil jaroj. Ĝi estas grava urbo de suda Anhui-provinco kaj ankaŭ ŝlosi-

la strategia pasejo por Changjiang-rivero de la antikveco. Ĝia origina nomo estis Jiuzi (Giuzi). En 106 a.K. ĝi estis alinomita Wuhu. Dum la periodo de Qing-dinastio (1644-1911 p. K.) ĝi famiĝis kiel la unua el la kvar grandaj rizproduktejoj de Ĉinio (Wuhu, Jiujiang, Wuxi kaj Changsha), tiam ĝi ĉiujare eksportis 400,000 tunojn da rizo.

Sur la pinto de Zheshan-monto en la centro de la urbo oni povas rigardi la tutan urbon: Interkruciĝantaj stratoj, vicoj post vicoj da etaĝdomoj, ŝipoj kaj boatoj sur la malrapide fluinta rivero, alte starantaj grupoj multaj sur ĝia bordo. . .

Antaŭ la fondiĝo de la popola respubliko Wuhu estis kaduka urbo. Tiam en ĝi troviĝis multaj opi-fumejoj, bordeloj kaj vetlu-


dejoj, sed nur unu malgranda elektrejo, unu kotonŝpino, unu duone funkcia faruna fabriko kaj kelkaj metiejoj. En la pasintaj 32 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Wuhu estis konstruita en novan industrian urbon. Hodiaŭ ĝi havas kvin industriajn kvartalojn kun 466 fabrikoj grandaj kaj malgrandaj de papero, tabako, alumeto, vitro, led, sapo, manĝaĵoj, vino, ŝpinaĵoj, ŝtofoj, tinkturado, kemiaj fibroj, plasto, metalurgio, minekspluatado, ŝipfarado, maŝinoj, elektronikaj produktaĵoj, mezuraj instrumentoj, konstruaj materialoj kaj kemiaĵoj. Ankaŭ ĝia produktado de diversaj tradiciaj metiartaĵoj ricevis grandan disvolviĝon. La nombro de la specoj de la ĉefaj produktaĵoj atingis 2,000, el kiuj pli ol 50 estis akceptitaj de internacia

merkato. La totala industria produktovaloro de la lasta jaro atingis 206-oblon de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

La ŝanĝiĝo de la Wuhu-a Ŝpinteksejo kaj la Wuhu-a Pez-ilmaŝina Fabriko estas miniaturo pri la industria disvolviĝo de la urbo. La antaŭa fondiĝis en 1918, ĝis 1949 ĝi havis 18,400 spindelojn kaj posedis fabrikajn domojn kun plankareo de 10,432 kvadrataj metroj. Nun ĝi havas 120,000 spindelojn kaj la plankareo de ĝiaj fabrikaj domoj atingis 238,000 kvadratajn metrojn. Krome ĝi konstruis laboristajn loĝdomojn kun plankareo de 47,800 kvadrataj metroj. La totala plankareo de la nove konstruitaj domoj de tiu fabriko estas 115% de tiu de la fabrikaj domoj de la urbo en 1949.

La Wuhu-a Pez-ilmaŝina Fabriko situanta en Gandao, la plej granda industria kvartalo de la urbo, estis formita el pluraj privataj feraĵaj metiejoj. En la komenco ĝi posedis nur 8 rimenajn tornilojn, 5 bormaŝinojn kaj 1 rabotmaŝinon. Hodiaŭ ĝi havas laborejojn kun plankareo de 266,000 kvadrataj metroj kaj 544 ilmaŝinojn kaj produktas ĉiujare pli ol 1,000 ilmaŝinojn de 14 specoj. Inter ili la vertikala alezmaŝino T716 trovis merkaton en 19 landoj kaj regionoj.

Angulo de la Hong-guang-a trikejo de Wuhu



En la lastaj jaroj la urbo kreis nombron da sciencexploraj fruktoj kun avangarda teknika nivelo. La novaj teknikoj de elektroniko, fluidiko*, mikroondo, lasero kaj mikrobo, industria plasto kaj vitrofibro armaturita plasto estis jam vaste uzataj en multaj fabrikoj kaj entreprenoj de la urbo. Tio multe levis la kvaliton de ĝiaj produktaĵoj, parto de ĝiaj produktaĵoj akiris relative altan renomon en la internacia merkato. La bonaj malkaraj elektraj motoroj produktitaj de la Wuhu-a Fabriko de Elektromotoretoj uzablaj kiel dinamoj trovis merkaton en Usono, Francio, Italio, Aŭstrio, Aŭstralio, Egiptio, Pakistano, Irano, Irako kaj sudorientaziaj landoj.

Antaŭ la Liberiĝo la metiarto de feraj bildoj de Wuhu kun historio de pli ol 300 jaroj preskaŭ pereis. Hodiaŭ ĝi jam fariĝis alloga floro inter la popolaj metiartoj de Ĉinio. La fera bildo "Bonveniga Pino" de la giganta ekrano en la Popola Halo de Beijing (Pekino) estis farita de Wuhu-aj metiartistoj. La feraj bildoj "Aglo super Pino", "Floroj kaj Papilioj" kaj "Umeo, Orkideo, Bambuo kaj Krizantemo" estis eksponataj en Francio, Japanio, Sovetunio kaj UNO.

Wuhu estas la trafika centro de la orienta parto de Anhui-

provinco. Trajno, aŭtoj kaj ŝipoj kunligas la sudan kaj nordan partojn de Anhui. La haveno de Wuhu jam fariĝis la kvara granda haveno de Chang-jiang-rivero kaj oni konstruis novan dokon por ekstera komerco, la eksportaj produktaĵoj de Anhui povas esti transportataj de tie al diversaj landoj de la mondo.

Dank' al la disvolviĝo de ekonomio kaj konstruado, la malnova urbo ĉe la sudorienta parto de Zheshan-monto etendiĝas al la pasinta ĉirkaŭurbo. Ĝia areo pliiĝis de 12 kvadrataj kilometroj ĝis 174 kaj la nombro de la loĝantoj kreskis de 120,000 ĝis 420,000. Antaŭ la Liberiĝo la urbo havis nur unu asfaltitan straton kun longeco de malpli ol 100 metroj, kiu estis mokita de fremdlanda ĵurnalo kiel la plej mallonga asfaltita strato en la mondo. Nun la urbo havas ĉ. 50 kilometrojn da cementaj kaj asfaltitaj stratoj, kies plej granda larĝeco atingis 40 metrojn. Estas antaŭvideble, ke Wuhu faros pli firmajn paŝojn en la moderniga konstruado de nia lando.


* *Fluidiko (angle: fluidics): scienco aŭ teknologio pri regado de aerfluo aŭ alia fluidaĵo uzata kiel elektronika cirkvito en plenumo de diversaj funkcioj.*

Laboristoj de motoreta fabriko de Wuhu ekzamenas produktojn.




Nova industria urbo Wuhu

Fotoj de REN REN kaj XIN HUA




La haveno de Wuhu — la kvara granda haveno de Changjiang-rivero


La ĝenerala muntejo de la Wuhu-a Pez-ilmaŝina Fabriko





Angulo de ŝipfarejo






Nova aspekto de la urbo



La parko Jinghu

La Wuhu-a Tekstilejo havanta 120.000 spindelojn





"Bambuoj" (Fera bildo)

"Pejzaĝo de Huangshan-monto" (Fera bildo)



Feraj bildoj estas metiartajoj propraj al Wuhu. Dank' al delikata ĉizado kaj arangado de metiartistoj, ordinaraĵoj farigas belajn metiartajojn. Jen veteranaĵoj laboristoj faras ferajn bildojn.

"Aglo super Pino" (Fera bildo)



La nuna vivstato de la ĉinaj salajruloj

de ZHONGYI kaj FANG JINGEN

KIEL vivas la ĉinaj salajruloj? Pri tio zorgas multaj amikoj. En tiu ĉi artikolo ni faru koncizan raporton pri ilia vivo.

REALAĴO KONFIRMITA EN RAPORTO PRI ENKETADO

Nun troviĝas raporto pri enketado fare de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, kiu fidele spegulas la vivon de la ĉinaj salajruloj. La raporto estas ĝenerala enketo farita en la lasta sezono de 1980 pri 7,962 familioj en Bejing, Shanghai, Tianjin, Wuhan k.a. 40 urboj. Tiuj familioj apartenas al laboristoj, teknikistoj, instruistoj, kuracistoj, sciencistoj kaj ŝtatoficistoj. La enketado faris komparon inter la spezoj de tiuj familioj kaj tiuj en la 60-aj jaroj.

La raporto montris, ke en 1980, ĉiu membro de la enketitaj familioj enspezis ĉiumonate meznombro 37.7 juanojn, kiuj estas 199.3% de tiu en 1964 (18.92 juanoj). Kun dekalkulo de la faktoro de la prezaltiĝo, la fakta enspezo kreskis je 68.6%.

La raporto montris ankaŭ, ke plimultiĝis la nombro de la familioj kies enspezo pliiĝis. La procentoj de la familioj kun diversanivelaj enspezoj inter la enketitaj familioj estas jenaj: la procento de la familioj, kies ĉiu membro enspezas ĉiumonate meznombro pli ol 50 juanojn,

kreskis de 1.3% en 1964 ĝis 14.2% en 1980; la procento de la familioj, kies meznombra monata enspezo de ĉiu membro estas 35-50 juanoj, kreskis de 5.8% ĝis 36.8%; la procento de la familioj, kies ĉiu membro enspezas ĉiumonate 20-25 juanojn, reduktiĝis de 27.5% ĝis 4%; kaj la procento de la familioj, kies ĉiu membro enspezas meznombro ĉiumonate malpli ol 15 juanojn, reduktiĝis de 32% al 1%.

La altiĝo de meznombra enspezo kaŭziĝis ĉefe de la sekvantaj faktoroj: unue, multiĝis salajruloj en ĉiu familio. Inter la enketitaj familioj, la meznombra cifero de salajruloj de ĉiu

familio multiĝis de 1.56 en 1964 ĝis 2.35 en 1980. Tio pliiĝis la enspezon je 51%. Kaj due, pro la naskolimigo, reduktiĝis la familia meznombra membraro de 5.3 homoj en 1964 ĝis 4.3 en 1980. Tio ankaŭ pliiĝis la enspezon de familioj relative je 35%. Trie, ankaŭ la altiĝo de salajro, premio kaj subvencio pliiĝis la enspezon je 14%. La supreme cititaj kaŭzoj ĝenerale multiĝis la enspezon de la salajruloj. Des pli grandiĝis la proporcioj de altiĝo precipe por la familioj, el kies membroj ĉiu enspezis malpli ol 15 juanojn ĉiumonate.

La plibonigo de la vivo de la salajruloj estas spegulita ne nur en la plimultiĝo de la enspezo,

Emeritaj laboristoj trinkas teon en ĝardeno.



sed ankaŭ en la kresko de ĉefaj familiaj konsumajoj kaj la ŝanĝiĝo de la konsisto de la konsumajoj.

Koncerne la nutraĵoj de la salajruloj, meznombro ĉiu persono konsumas ĉiumonate 13.5 kg. da greno, t.e. 103.2% de tiu en 1964. Kaj krome la konsumitaj vegetala manĝoleo, ovoj, akvaj produktoj, sukero kaj legomoj kreskis je 67.9-81.1%. La kvanto de la konsumita viando 2.3-obliĝis kompare kun tiu en la pasinteco. Rimarkinde multiĝis ankaŭ la konsumitaj kortobirdoj, fruktoj, vino, lakto k.a.

Pri la vestado, meznombro ĉiu persono konsumas ĉiumonate 0.5 metron da kotona aŭ kemifibra ŝtofo, kio estas 150.9% de tiu en 1964. La kvantoj de la aĉetitaj trikitaj vestaĵoj, lanfadenoj, lanaj vestaĵoj, drapo, drapaj vestaĵoj, silkajoj, ledŝuoj k.a. kreskis respektive je 97.4%-480%.

Pri la ĉiutagaj uzadoj, oni konfirmis, ke la nombro de longeuzablaj objektoj aĉetitaj de salajruloj multiĝis kontinue. En la fino de 1980, meznombro ĉiu centoj da enketitaj familioj pose-

dis 127 biciklojn, 66 stebmaŝinojn, 85 radioricevilojn, 32 televidilojn, 5.4 magnetofonojn kaj 22 elektrajn ventumilojn.

En 1980, meznombro ĉiu membro de la enketitaj familioj elspezis 37.58 juanojn ĉiumonate por la vivtenado, nome la sumo estas 204.4% de tiu de 18.39 juanoj en 1964. Escepte de la faktoro de altiĝo de la prezaro, la efektiva kresko estis 72.9%. Ĉiu loĝanto elspezis meznombro 2.86 juanojn por lupagoj de domo, elektro, akvo, razado, bano, infanvarto, riparo k.a., kiuj okupis 7.6 procentojn de la totala elspezo; dume 34.72 juanoj, nome 92% de la totala elspezo, estis uzataj por aĉeti, inter kiuj 21.05 estis konsumitaj por manĝaĵo, 6.47 por vestaĵoj. La procentoj en tiuj flankoj ŝanĝiĝis tiel: La procento por manĝaĵoj reduktiĝis de 69.4% al 60.6% de la totala elspezo, dume tiu por vestaĵoj leviĝis de 12.9% al 18.6%; kaj la sumo elspezita por aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn, amuzajn kaj sportajn uzadojn, librojn kaj gazetojn, altiĝis respektive en malsamaj procentoj. Tio montris, ke altiĝante la nivelon de man-

ĝado, la familioj donas grandan atenton al plibonigo de vestado kaj disvolvado de kulturaj kaj sportaj aktivecoj.


Sed ĝenerale dirite, la nivelo de la vivo de la ĉinaj salajruloj estas kompare malalta, ĉar nia lando estas disvolviĝanta, la loĝantaro estas granda kaj la bazo estas malforta. Ni ne devas fanfaroni pri plibonigo de la vivo sen sufiĉa atento al la disvolvado de la ekonomio. Nia plibonigo de la vivo de la popolo baziĝas nur sur la disvolvado de la produktado kaj altiĝo de la produktiveco.

GRAVAJ RIMEDOJ POR PLIBONIGO DE LA VIVO

En la lastaj jaroj, por bonigi la vivon de la popolo, la registaro de Ĉinio faris reguligadon al la nacia ekonomio kaj reduktis la procenton de la akumula fonduso en la nacia ekonomio. La ĉefaj metodoj estas jenaj:

1. MALGRANDIGI LA SKALOJN DE FUNDAMENTA KONSTRUADO KAJ REGULIGI LA DIREKTON DE LA INVESTO. En la reguligado de la nacia ekonomio, la ŝtato rezolute reduktis la skalojn de la fundamenta konstruado, por iom post iom ŝanĝi la sintenon akcenti solflanke akumulon kaj neglekti konsumon. Laŭ la plano, la investo al la fundamenta konstruado jam reduktiĝis de 53.9 miliardoj da juanoj en 1980 al 30 miliardoj en 1981, interalie la investaĵo planita rekte de la ŝtata budĝeto reduktiĝis de 28.2 miliardoj da juanoj al 17 miliardoj. Inter la totala investo la procento por la malpeza industrio kaj tiu por konstruadoj servantaj al la popola vivo multe grandiĝis. En 1980 la investo por la malpeza

Por la sano de ministroj



industrio estis preskaŭ 5 miliardoj da juanoj, kun kresko de 64.2 procentoj kompare kun tiu en 1979. Kalkulate en komparo kun la totala investo, tiu sumo kreskis de 6.1% en 1978 al 9.1%. En 1980 la ŝtato sume konstruigis pli ol 1,600 entreprenojn, kiuj ĉiuj postulis investon de pli ol 100,000 juanoj. Dank' al tiuj entreprenoj oni povas produkti pli da teksaĵoj, papero, sukero, bicikloj, stebmaŝinoj, brakhorloĝoj, televidiloj k.a. En tiu jaro la investo por neproduktaj konstruadoj servantaj al la materia kaj kultura vivo de la popolo estis 18.2 miliardoj da juanoj, nome 134.9% de la sumo de la antaŭa jaro. Kaj kalkulate en komparo kun la totala investo, la procento kreskis de 17.4% en 1978 ĝis 33.7%. En la unuaj 8 monatoj de la kuranta jaro la procento de tiu sumo kreskis ĝis 38.6%. La investo por konstruo de loĝdomo por laborantoj estis 10.8 miliardoj da juanoj, en kresko de 46% kompare kun tiu en la antaŭa jaro, kaj kalkulate en komparo kun la totala investo, la sumo kreskis de 7.8% en 1978 ĝis 20%.

2. REGULIGI LA STRUKTURON INTERNE DE LA INDUSTRIOJ KAJ PROGRESIGI PRODUKTADON DE KONSUMAĴOJ. En multaj jaroj, oni troe akcentis la pezan industrion kaj al ĝi devis cedi ĉiuj aliaj industrioj, rezulte de tio tro dikiĝis la peza industrio kaj tro marasmiĝis la malpeza industrio. Tia anormala strukturo de la industrioj konsumis grandan kvanton da hejtajoj, energioj kaj krudmaterialoj, dume la efiko estis malbona. Dank' al la reguligo dum la du jaroj, la anormala stato estas korektita iom post iom. En 1980 la produktado de la malpeza in-

dustrio kreskis je 18.4% kompare kun tiu en la pasinta jaro, multe pli rapide ol la peza industrio, kies produktado kreskis nur je 1.4%. En la pasinta jaro la produktovaloro de la malpeza industrio konsistigis 47.1% de la totala produktovaloro de la tuta industrio, dum tiu en 1978 estis 43.1%. En la unuaj 8 monatoj ĉijare tiu cifero grandiĝis ĝis 50.5%. Pro la racia reformado de la strukturo de la peza kaj malpeza industrioj, la malpeza industrio multe progresis: La kvanto de elektraĵmaŝinoj multiĝis je 88%; tiu de radioriceviloj je 120%; tiu de fotoaparatoj je 57%; tiuj de bicikloj, stebmaŝinoj kaj brakhorloĝoj je almenaŭ 29%; tiuj de kemia fibro, kottona ŝtofo, drapo, silkaĵoj k.a. je 11-38%; tiuj de salo, biero kaj cigaredo je 17-33%. Ĉio ĉi tio bone efikis por vigligi la merkaton kaj kontentigi la bezonon de la popola vivo.

3. LAŬPAŜE REFORMI LA EKONOMIAN SISTEMON KAJ GRANDIGI LA MEMDECIDAN RAJTON DE ENTREPRENOJ. Ekde 1979, la memdecida rajto de la entreprenoj

estis iom post iom pligrandigita tra la tuta lando. En la fino de 1980, la lando jam havis pli ol 6,000 eksperimentajn entreprenojn kun diversaj karakteroj. La plej granda avantaĝo en pligrandigo de memdecida rajto de entreprenoj estas kombini la interesojn de la tri flankoj de la ŝtato, entrepreno kaj laboranto, kaj precipe kunligi la produktajn fruktojn kun la materia intereso de la produktantoj, kio stimulis la aktivecon de la produktantoj, plibonigis la administradon de la entreprenoj, utiligis la latentajn fortojn, altigis ekonomian efikon kaj akcelis pliprodukton. Laŭ primara statistiko de la supre menciitaj entreprenoj, en 1980 la profito de ĉiu cento da juanoj de la produktovaloro de la entreprenoj kies memdecida rajto estis pligrandigita, estis pli alta je 23% ol tiu de la ordinaraĵaj entreprenoj. Dank' al tio, profitis el la kresko de produktado kaj la ŝtato kaj la entreprenoj kaj la produktantoj. Ekzemple, en urbo Wuhu de Anhui-provinco, meznombre ĉiu laborulo de la entreprenoj, kies memdecida rajto estis

Purigistoj en la Xiangshan-a sanatorio de Beijing



pligrandigita, enspezis 835.5 juanojn, kun kresko de 17.8% kompare kun 709 juanoj en 1979.

4. PRAKTIKI LA SISTEMON DE PREMIADO KAJ ALTIGI LA SALAJRON DE LA LABORULOJ. Ekde 1977 tri kvaronoj de ĉinaj salajruloj estis promociitaj, kaj iuj lokoj faris reguladon al normo de salajro, vaste praktikis premiadon kaj po-pecan salajron, kaj cetere la ŝtato subvenciis ĉiun salajrulon pro la altiĝo de la prezaro de la almanĝaĵoj, dank' al kio la enspezo de la plejparto de la salajruloj altiĝis. En 1980 meznombro ĉiu salajrulo enspezis 762 juanojn, kaj tiu de ŝtataj entreprenoj enspezis 803 juanojn, kun kresko de 33.4% kompare kun tiu en 1977. Escepte de la faktoro de altiĝo de la vivkosto, fakte la salajro altiĝis je 21%, meznombro ĉiujare kreskante je 6.5%; dum en la jaroj 1952-1977 la salajro de la salajruloj kreskis nur je 0.4%. La jara salajro de 1980 por laboruloj en la entreprenoj posedataj de kolektivo estis 624 juanoj, kun kresko de 31% kompare kun tiu en 1977. Kaj escepte de la faktoro de altiĝo de prezaro, la fakta kresko estis 19%, nome 6% meznombro ĉiujare.

Kvankam la sumo de la salajro de ĉinaj laborantoj estas malgranda en komparo kun tiu de aliaj landoj, tamen la strukturoj de la elspezoj de ĉinaj kaj fremdlandaj salajruloj estas tre malsamaj. La ĉinoj ne pagas al la ŝtato laŭenspezan imposton. Kaj krome la lupago por loĝejoj en Ĉinio estas tre malalta, kiu okupas nur 3-5% de la salajro, por la salajruloj la kuraco estas senpaga, kaj iliaj familianoj ĝuas duonpagan ku-

racon. Cetere la ŝtato subvencias la salajrulojn en aĉetado de greno, legomo kaj en trafikado kaj hejtado.

5. LAŬEBLE ENOFICIGI SENLABORULOJN. Pro la dekjara tumultado de la kultura revolucio la nacia ekonomio estis serioze damaĝita, kaj cetere oni erare nuligis individuajn laborulojn kio mallarĝigis la vojon por enoficigi senlaborulojn, kaj pro tio aperis senlaboreco en la urboj. Por solvi la problemon, samtempe kun klopodado por enoficigo de senlaboruloj en la entreprenoj de la tutpopola posedanteco, la ŝtato kuraĝigas la senlaborulojn mem starigi kooperativojn per propra mono helpate de la lokaj registaroj. En multaj lokoj oni establis servokompaniojn por liveri al la socio laborulojn aŭ organizi diversajn teknikajn kursojn. En 1980 9 milionoj da senlaboruloj tra la tuta lando ekhavis oficon. Tiu cifero plus tiu en la antaŭaj 3 jaroj atingis 28,670,000 personojn, kiuj okupas 27% de la totala nombro de la salajruloj de la lando en 1980.

Por havigi oficon al pli multaj homoj, nun oni faras grandan klopodon por disvolvi diversajn publikajn servojn t.e. la tiel nomata tria industrio, kiu inkluzivas la trafikadon, poŝtadon, komercadon, restoraciaron, edukadon, higienon k.s. La perspektivo en tiu flanko estas brila.

6. INVESTI TRA DIVERSAJ KANALOJ POR PLIRAPIDIGI LA KONSTRUADON DE LOĜDOMOJ. En la urboj la loĝejoj estas ĝenerale malvastaj, kaj tiu ŝtato daŭras delonge. En la lastaj jaroj la registaro faris grandan klopodon por solvi la problemon. Unue la

ŝtato grandigis la investon al konstruado de loĝdomoj. En 1978-1980 la sumo de la investo por konstruado de loĝdomoj estis 21.9 miliardoj da juanoj, t.e. 2.5-oblo de tiu en la periodo 1967-1976.

Krom la ŝtato, ankaŭ entreprenoj kaj ŝtataj departementoj estas konstruantaj loĝdomojn. En la 10.8 miliardoj da juanoj de la investo en 1980, laŭ la budĝeto la investita sumo de la ŝtato konsistigis trionon de la totala sumo kaj tiu de lokaj departementoj kaj entreprenoj 2 trionojn.

Antaŭe la loĝdomoj estis ĝenerale konstruitaj de la ŝtato. En la lastaj jaroj la ŝtato kuraĝigis konstrui privatajn domojn. Ĝis nun 128 urboj kaj iuj gubernioj de 26 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj faris eksperimenton de konstruado de privataj domoj, kies totala areo atingis 3,320,000 kvadratajn metrojn. En 50 urboj la ŝtato vendis al privatuloj domojn, kies totala areo atingis 44,000 kvadratajn metrojn en 1980.

Dank' al la supre menciitaj rimedoj, la konstruado de loĝdomoj multe plirapidigis: En la tri jaroj de 1978-1980 la totala areo de la konstruitaj domoj atingis 182,380,000 kvadratajn metrojn, kiuj superis la totalan areon de la domoj konstruitaj en 1967-1976, kaj konsistigas pli ol kvaronon de la totala areo de la domoj konstruitaj en la 31 jaroj de post la fondiĝo de nia respubliko.



ESP-ASOCIO DE YUNNAN FONDITA

Post pli-ol-unu-jara preparo la Esperanto-Asocio de Yunnan fondiĝis en la provinca ĉefurbo Kunming en la kunveno de la 12-a ĝis la 14-a de septembro, kiun ĉeestis pli ol 200 novaj kaj veteranaj esp-istoj el diversaj lokoj de la provinco.

En la 30-aj kaj 40-aj jaroj prosperis Esp-movado de tiu provinco. Post longa stagnado la movado revigliĝis tie, kaj nun pli ol 2.000 personoj komencis lerni nian lingvon.

Dum la kunveno la reprezentantoj interŝanĝis siajn opiniojn pri propagando kaj disvastigo de Esperanto. Ili unuanime aprobis inviti veteranan esp-iston Zhu Jiabi, vicprezidanton de la provinca politika interkonsiliĝa konferenco, esti honora prezidanto de la asocio kaj elektis Fang Zhongbo kiel ĝian prezidanton kaj Hong Shuxun kiel ĝian vicprezidanton.

NOVAJ ESP-KURSOJ EN ALTAJ LERNEJOJ

Dum la lastaj monatoj novaj Esp-kursoj kaj Esp-studrondoj fondiĝis en ĉinaj altaj lernejoj.

En julio ĉijare, la Xi'an-a Esperanto-Asocio funkciigis, en la Xi'an-a Fremdlingva Instituto, someran kurson de Esperanto, kiun vizitis instruistoj, sciencaj laborantoj, teknikistoj, ŝtataj funkciuloj kaj studentoj.

Subtenate de la prepara grupo de la Jiangsu-a Esperanto-Asocio kaj gvidantoj de la Nanjing-a Telegrafa kaj Poŝta Instituto, ekfunkciis Esp-kurso en tiu instituto en la fino de septembro.

En la dua tagdeko de septembro la Esp-instituto de la Hunan-a

Normala Instituto okazigis la trian Esp-kurson kun 180 vizitantoj. Ĝi ankaŭ kunvokis kunvenon por daŭre propagandi kaj disvastigi Esperanton.

ESPERANTON EKKONIS ĈINAJ URBETOJ

Kun la disvolviĝo de la ĉina Esp-movado en la lastaj jaroj, Esp-kursoj kaj Esp-studrondoj aperis en pli ol 20 guberniaj urboj de Ĉinio, kiel Changshu, Yangshuo, Yuhang kaj Xinxiang. Tiuj kursoj kaj studrondoj ricevis subtenon de la lokaj propagandaj, scienc-teknikaj kaj edukaj departementoj, tiel ke ili altiris al si pli kaj pli multajn homojn.

JAPANA TUTLANDA ESP. KONGRESO

La 68-a Kongreso de Japanaj Esp-istoj estis okazigita en Tokio je la 8-a kaj 9-a de aŭgusto. Ĝin partoprenis 340 esp-istoj el la tuta lando kaj 8 el aliaj landoj.

Kadre de tiu ĉi kongreso okazis la ĝenerala kunveno de Japana Esperanto-Instituto, kiu akceptis

plej gravajn laborplanojn kaj budĝetojn, kongresa universitato kaj multaj fakaj kunsidoj. Gejunuloj prezentis unu-horan teatraĵon "Pikniko en Batalkampoj".


Paralele kun la kongreso havis lokon ankaŭ infana kongreseto kun partopreno de 15-16 infanoj, inkluzive de 2 germanaj knaboj.

INTERNACIA KULTURA SEMAJNO EN ISLANDO

Sub organizado de la Islanda Esperanto-Asocio okazis internacia kultura semajno en Stykkisholmur. Tio estis eksterordinara travivaĵo por la ĉ. 30 partoprenintoj, inter kiuj sin trovis 4 eksterlandaj esp-istoj. Ili grimpis multajn vulkanojn kaj manĝis en pseŭdokratero. Dum la ekskurso oni klarigis detale pri islanda geologio. Kelkaj interesaj prelegoj estis faritaj, interalie pri antikvaj islandaj verkistoj kaj la estigo de Islanda Antologio.

Islanda esp-isto Ragnar Baldursson rakontis pri siaj spertoj en Ĉinio kaj Japanio kaj pri la Esperanto-movado en tiuj landoj. Li ankaŭ montris lumbildojn pri Japanio.

Esperantistoj partoprenantaj internacian kultureman semajnon rigardas monton lasitan de glaĉera periodo.



INTERNACIA SEMINARIO KAJ INTERNACIA FESTIVALO EN FR GERMANIO

Germana Esp. Junularo, kiu siavice ĉi-jare festas sian 30-an jubileon, okazigos la 25-an jubilean Internacian Seminarion de 27.12.1981 ĝis 3.1.1982 en Sensenstein, FR Germanio. Paralele al ĝi ankaŭ okazos, samdate kaj samloke kaj jam por la tria fojo, Internacia Festivalo, por kiu respondecas Germana Esperanto-Asocio. Tial denove eblos por mezaĝuloj (inter 26- kaj 50-jaraj) kaj junaj familioj partopreni en la aranĝo.

Diversaj aspektoj de la temo "Paco en la 80-aj jaroj" estos trak-

tataj en labor-grupoj kaj prelegoj. Krom la labora parto la partoprenantoj ĝuos ankaŭ ampleksan distran programon. Aliĝontoj skribu al: Uschi Felholter, Topferstr. 20, D-4500 Osnabruck, FR Germanio.

"LA KURSO DE ANDREO CSEH"

Internacia Esperanto-Instituto estas por kulturi bonajn kursgvindantojn, kiuj volantas instrui laŭ la Cseh-metodo. "La kurso de Andreo Cseh" klarigas la metodon kaj krom tio donas saĝajn konsilojn al tiuj, kiuj sincere deziras helpi al la disvastigo de Esperanto. La libro estas mendebla ĉe Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172,

2585 HW Hago, Nederlando; prezo: 25 gld. inkluzive sendkoston.

LIBROJ ELDONITAJ DE SARLANDA ESPERANTO-LIGO

Lastatempe Sarlanda Esperanto-Ligo reeldonis nombron da Esperantaj libroj, inter kiuj estas "La vort-teorio de Esperanto" (R. Saussure), "La virineto en bluo kaj aliaj rakontoj" (M. Stuttard), "Tiel okazis aŭ mistero minora" (F. Szilagi), "El Parnaso de popoloj" (A. Grabowski), "Auli" (Hendrik Adamson), "Bakŝis" (L.N. Newell), "Ifigenio en Taurido Dramo en kvin aktoj" (J. W. Goethe), "Pri problemo de internaciigo de scienc-teknika terminaro" (E. K. Drezon)

BELA DONACO

AL LA ABONANTOJ DE 1982



JAM komenciĝas la varbkampanjo de 1982 por El Popola Ĉinio. Tuj abonu ĝin jam nun! Se vi abonos ĝin en la periodo de la 1-a de novembro ĉijare ĝis la 28-a de februaro venontjare, vi povos senpage ricevi la belan kalendaron de 1982.

La kalendaro estas eldonita de nia redakcio por ĉiuj abonantoj, inkluzive tiujn, kiuj faros sian abonon dum la varbperiodo. Ĝi havas 14 paĝojn kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj kaj estas en formato de 37.5 cm X 25.5 cm. Tiu bela donaco bone servos al vi ne nur kiel kalendaro tutjare, sed ankaŭ kiel valora artaĵo por longe.

Ni dankeme esperas, ke vi abonu aŭ reabonu la gazeton ĝustatempe. Senpaga specimeno de EPC estas sendata laŭ peto.

Bonvolu sendi vian abonilon kaj abonkotizon al peranto en via lando aŭ la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

La Redakcio de EPC



Vizito en Zhangjiajie

de PENG ZHENGYANG

EN Dayong-gubernio en la okcidenta parto de Hunan-provinco troviĝas mirinda pitoreskejo Zhangjiajie. En aŭgusto de la kuranta jaro mi vizitis ĝin kaj plezure ĝuis ĝiajn belajojn.


Zhangjiajie, apartenanta al Qingyan-monto de Wuling-montaro, situas ĉe la limo inter la gubernioj Dayong, Sangzhi kaj Cili, je 424 kilometroj for de Changsha (Ĉangŝa), la ĉefurbo de Hunan-provinco.

La 14-an aŭguste, veturinte de la gubernia urbo Dayong per aŭto ĉ. 32 kilometrojn mi atingis Zhangjiajie. La komence viditaj montoj estas tre ordinaraĵoj. Sed kiam ni trapasis la lastan montegon, nebule ekaperis antaŭ ni groteskaj montpintoj kaj rokoj. Plu veturinte ĉ. unu kilometron, ni estis tuj kaptitaj de groteskaj nuboskrapantaj gigantoj. La verdaj montoj kaj ruĝaj rokoj klare distingeblaj en sunlumo, estis kvazaŭ hakitaj. Mi sentis kvazaŭ mi troviĝus en felando.

Ni pasloĝis en la arbara administrarejo de Zhangjiajie. Tagmeze de la sekvinta tago, kiam la aliaj siestis, mi promenis sola laŭ Jinbian-rivereto pelate de forta deziro rigardi la kuriozan pejzaĝon. Irante duonan kilometron mi vidis romban rokmuron, ĉirkaŭatan de groteskaj montoj kaj rokoj alte starantaj ĉe la bordo. Ĝi estas la fama Jinbian-roko. Mi rapide iris

al ĝi kaj rigardis supren: en la lazura ĉielo blankaj nuboj glitis trans la montpinton. Mi sentis kvazaŭ moviĝus la monto inter la nuboj. En Zhangjiajie troviĝas pli ol 2,000 tiaj krutaj gigantoj. Ili ĉiuj estas el ruĝaj rokoj kaj meznombre altas je ĉ. 150 metroj. Kun Jinbian-roko kiel la centro, ili okupas areon de pli ol 2,400 hektaroj. Iliaj montsuproj plejparte estas neniam tuŝitaj de homoj, kaj ili ĉiuj, ĉu vastaj aŭ malvastaj, eĉ tiuj kun areo de nur 1-2 kvadrataj metroj, estas tute kovritaj de primitiva arbaro. Iliaj formoj estas diversaj, iuj el ili similas al ekranoj, aliaj al jadaj bambuĝermoj, triaj al kasteloj kaj kvaraj al ĉinaj antikvuloj... Jen vere mirindaj kreaĵoj de la naturo!

La 15-an aŭguste, gvidisto proponis, ke ni vizitu Huangshizhai, dirante "Vanas vizito al Zhangjiajie sen rigardo de Huangshizhai." Posttagmeze, ni forlasis nian loĝlokon je pli ol 500 metroj super la mara nivelo kaj iris laŭ zigzaga kaj kruta pado al Huangshizhai je pli ol 1,200 metroj super la mara nivelo. Kvankam la montgrimado ŝvitigis nin tutkorpe, tamen la variaj pejzaĝoj forgesigis al ni la lacon. Ni iom ripozis monttalie en natura koridoro en kruta rokmuro super ravino. Proksime estas arbomaro kaj malproksime montpintoj unuj post aliaj. Subite sur la rokmuro ni trovis subskribojn de 13 japanoj. La gvidisto diris al ni, ke en junio de la kuranta



Edzo-sopira Roko

jaro, kiam la japanaj kaj ĉinaj filmistoj fotis naturan pejzaĝon por la televida filmo "Jangzi-rivero", la japanaj amikoj faris tie memoraĵojn. Pli antaŭe du rokogigantoj ŝultre-ĉe-ŝultre starantaj baris la vojon. Ili altas pli ol 200 metrojn kaj la spaco inter ili larĝas nur 20 centimetrojn. Supren rigardante, ni vidis nur strion da lazura ĉielo. Trapasinte ilin, ni trovis monton kun 2-metre larĝa truo, kiu estas la sola trapasejo por iri al Huangshizhai. Oni nomas ĝin la Suda Pordego de la Ĉielo. Rigardante de tie orienten ni vidis multajn rokajn gigantojn starantajn en profunda valo.

Ni atingis Huangshizhai en vespera krepusko. Tie estas montsupro kun areo de ĉ. 90,000 kvadrataj metroj kaj ĉirkaŭata de pli ol 200 diversformaj montpintoj. Tie loĝas familio de arbaro-protektista familio. Por ĝui la variajn kaj ĉarmajn pejzaĝojn ni tranoktis en la domo de la arbaroprotektisto. Tie ni vidis la nubomaron super la arbaroj antaŭ sunleviĝo kaj la belan pejzaĝon de montpintoj en vespera sunbrilo. Oni starigis pli ol dek belvidejojn sur la montsu-

pro. Ĉirkaŭirinte sur ĝi oni povas spekti la tutan pejzaĝon de Zhangjiajie. Fore, staras montoj unuj post aliaj kaj en la valoj kreskas nigre verdaj primitivaj arbaroj. Sur montokrestoj zigzagas arbarzono simila al la Granda Muro en la Nordo. Proksime, maljunaj pinoj kiel drakoj kreskas sur rokmuroj, malsupre la sen-nombraj groteskaj rokaj gigantoj kiel ŝakpecoj dislokiĝas sur granda ŝaktabulo. Norde de la montsupro estas ŝtona pordego kun larĝeco de malpli ol 1 metro, sub kiu estas kruta rokmuro, sur kiu oni ĉizis centojn da ŝtupoj kondukantaj spirale malsupren al la rokaj gigantoj.

El la pli ol 2,000 rokaj gigantoj de Zhangjiajie pli ol 200 jam havas sian nomon.

Oni opinias ke la montoj de Zhangjiajie estas pli belaj ol la montoj de Guilin (Gujlin). Tie ĉi estas 5 riveretoj kaj unu akvofalo. La riveretoj estas ĉiam tiel klaraj ke videblas la fiŝoj en ili. Kaj tre grandioza estas la akvofalo pen-


danta sur kruta rokmuro alta je 120 metroj.

Tie kreskas tropikaj vegetaĵoj kune kun tiuj de malvarma zono. La loko estas natura botanika ĝardeno. Laŭ nepreciza statistiko de la Ŝtata Esplora Grupo de Arbaro, tie troviĝas lignaj vegetaĵoj de 571 specioj de 93 familioj. Ni iris profunde en la mirindan arbaron. Ni promenis sur tero kovrita de dika tavolo da falintaj folioj tiel mola kiel tapiŝo. Fasketoj da sunlumo penetris en la densan foliaron kaj fariĝis koloraj. La antikvaj arboj kreskas prospere. Zefiro estigis susuradon en la arbaro. Ĉie estis tiel bele, ke ni ebriiĝis kaj ne volis foriri.


Tie troviĝas ankaŭ multspecaj valoraj animaloj, kiaj tigroj, leopardoj, riveraj cervoj, ĉamoj, kapreoloj, lutroj, aproj, flugaj sciuroj, pangolinoj (*Manis pentadactyla*), makakoj, oraj fazanoj ktp. Tre interesaj estas la akvoportaj birdoj, kiuj konstruas siajn nestojn sur krutaĵoj kaj malofte trinkas ĉe riveretoj. Plene estinginte sian

soifon ili plenigas per akvo la akvovezikon kreskantan sur ilia nuko. Unufoje la akvoveziko povas enteni du kilogramojn da akvo. Tial ili ne bezonas trinki dum 5-6 tagoj.

La malfermita pejzaĝa regiono de Zhangjiajie estas nur duono de tiu de la tuta Qingyan-monto kaj mi rigardis nur ĝian malgrandan parton. La Popola Registaro de Hunan-provinco jam difinis Zhangjiajie kiel rezervejon kaj turisman regionon. Nun oni tie konstruas hotelojn kaj ŝoseojn. Post kelkaj jaroj ĝi certe fariĝos pli bela turisma loko.



LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO





1. Beijing
2. Tibeto
3. Lhasa
4. Xigaze
5. Wuhu
6. Guangzhou
7. Dayong-gubernio
8. Linqing-gubernio
9. Nanjing
10. Shanghai
11. Kongwang-monto


NATURAJ BELAĴOJ

Fotoj de WANG SHOULIANG

La ĉarma pejzaĝo de Zhangjiajie







Elegantaj montpintoj

Bonvenigaj pinoj



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

de SERDA KAŬPP

Studento pentras
sur strato.



Akvo-Kastelo en FR Germanio





Liu Shifu

LIU Shifu estis ĉina veterana esperantisto en la komenco de la kuranta jarcento. Li faris gravan kontribuon al la unua stadio de la ĉina Esperantomovado.

Li havis Esperantan plumnon Sifo. La 27-an de junio, 1884, li naskiĝis en la gubernio Xiangshan (nun Zhongshan) de Guangdong-provinco. Pro malcontento al la politika putriĝo de la kortego de Qing-dinastio, li starigis paroladan grupon en 1901 por propagandi revolucion. En 1904 li iris al Japanio por studi kaj tie akceptis anarkiismon, poste li aliĝis al Tong Meng Hui sub la gvido de d-ro Sun Zhongshan (Sun Jatsen). En 1905 li revenis al la patrolando, funkciigis la ĵurnalon "Oriento" por propagandi renverson de Qing-dinastio kaj socian reformon. Printempe de 1906 li venis al Guangzhou (Kantono) kaj intencis kaŝe mortigi Li Zhun, estron de militaj aferoj de Guangdong, sed bedaŭrinde lia maldekstra manpoĵo vundiĝis de eksplodo en farado de bombo kaj estis fortranĉita. Poste li estis eskortita al Xiangshan kaj kondamnita al tri-jara malliberigo. En 1909, elkarceriĝinte li venis al Hongkong kaj tie organizis kunlaboran organizon de Tong

Meng Hui. En 1911 okazis la revolucia insurekcio en Wu-chang, Liu Shifu partoprenis en gvidado de popolanoj kaj armeanoj en ilia insurekcio en Xiangshan kaj Dongjiang.

Somere de 1912, post kiam Sun Zhongshan transdonis la prezidantecon de la Ĉina Respubliko al Yuan Shikai, parto de la superuloj de Tong Meng Hui fariĝis altrangaj funkciuloj. Liu Shifu tamen publike rifuzis esti altrangulo aŭ parlamentano kaj decidis batali por anarkiismo por la tuta vivo. Poste li starigis en Guangzhou la societon Huiming por interŝanĝi opiniojn pri politiko. En julio de tiu jaro Liu Shifu kaj Zheng Bi'an iniciatis Societon de Konscienco, kies statuto el 12 artikoloj difinis ne manĝi viandon, ne trinki vinon, ne fumi, ne dungi serviston, ne veturi per rikiŝo kaj palankeno, ne edziĝi, nomi reciproke ne per familia nomo, ne fariĝi ŝtatfunkciulo, ne esti kiel parlamentano, ne aliĝi al politika partio, ne fariĝi armeano kaj ne kredi al religio.

Tiam estis studento Xu Lunbo, kiu revenis el Francio al Guangzhou. Li funkciigis Esperantan vesperkurson en la Civitana Lernejo. En la lernado partoprenis Liu Shifu, Ou Shengbai, Huang Zunsheng (Won Kenn)

kaj aliaj. Tiam mankis Esperantaj lernolibroj kaj la de ili uzita lernolibro "Dek Lecionoj" estis tradukita el la franca lingvo.

Aŭtune de 1912, Liu Shifu kaj Xu Lunbo iniciatis la Kantonan Esperantan Instituton kaj estis elektitaj kiel ĝiaj estro kaj vicestro respektive. La instituto funkciigis Esperantan kurson. Dank' al la klopodo de Liu Shifu la membraro de la instituto superis 300. La Ĥina Esperanta Asocio de Ŝanhajo laŭdis ilin kaj honoris la instituton kiel antaŭiranton de la tuta lando. Krom laboro en la societo Huiming, Liu ofte laboris por la instituto. Post nelonge ili ambaŭ estis komisiitaj de UEA kiel ĝiaj delegito kaj vicdelegito en Guangzhou respektive.

Por propagandi anarkiismon kaj Esperanton, Liu Shifu decidis peti monon de la samideanoj kaj de la socio, por fondi sian presejon kaj eldoni gazeton. La 20-an de aŭgusto, 1913, oficiale eldoniĝis la unua numero de la semajna gazeto "La Krio de Koko" en Esperanto kaj la hana lingvo, iniciatita de li, kun la subtitolo "Civitana Voĉo". Ĝi propagandis socian revolucion por akceli la grandan harmonion de la mondo. Kompreneble, la socia revolucio de Liu Shifu estas simple utopia socialismo de



Liu Shifu kaj Esperanto

de HE GUOLIANG

la etburĝaro, tute diferenca de la scienca socialismo.

Ĉiu numero de "La Krio de Koko" havis 16 paĝojn, kun la lastaj kvar paĝoj de Esperanta traduko kiel internacia rubriko, kies artikoloj plejparte estis verkitaĵoj de Liu kaj tradukitaĵoj de Xu en Esperanton. En ĝia antaŭparolo Liu skribis: "Ni publikigos en nia gazeto tiujn artikolojn, kiuj temas pri sciencoj utilaj al plibonigo de la popola vivo kaj la socia evoluo. Kaj por unuigi la lingvon ni starigis la Esperantan rubrikon. Ni faros tion por propagandi Esperanton en Ĉinio unuflanke, kaj konigi la veron de la ĉina socio al la mondo aliflanke. Ni kolektos artikolojn en Esperanto kaj en la hana lingvo kaj publikigos ilin en ambaŭ lingvoj, por ke la civilizacio de Ĉinio proksimiĝu al tiu de Eŭropo, la civitanoj de la orienta Azio kunlaboru kun tiuj de la mondo en la sankta afero de la socia revolucio." Tio montris, kial Liu amis Esperanton.

En julio kaj aŭgusto de 1913 Sun Jatsen malvenkis en sia

militekspedicio kontraŭ Yuan Shikai kaj la reakciaj militaristoj komencis subpremi la revolucion en Guangdong. Post kiam eldoniĝis la dua numero de "La Krio de Koko", Liu kaŝe translokis la presmaŝinon al Aomen. Ekde la tria numero la gazeto alinomiĝis "La Voĉo de la Popolo". Tiam la gazeto havis grandan malfacilon en financo. Por daŭrigi la eldonadon li devis mem fari kompostadon kaj presadon en sia loĝejo.

Liu peneme laboris en Aomen pli ol tri monatojn, kaj la registaro de Yuan Shikai en Beĵing kaj la Guangdong-aj militaristoj, pere de portugalaĵa ambasadoro kaj konsulo en Ĉinio, postulis malpermesi la eldonon de "La Voĉo de la Popolo" kaj sendis spionojn por observi lin. En la fino de 1913 Liu Shifu kaj Zheng Peigang translokis la presmaŝinon al Hongkong, kaj poste al Shanghai por daŭrigi la eldonadon. Tie en la eldonado partoprenis ankaŭ ĉina veterana esperantisto K. C. Ŝan, kiu zorgis redaktadon de la Esperanta rubriko, kaj la japana esperan-

tisto kaj anarkiisto Taiji Yanaga.

La eldonado de "La Voĉo de la Popolo" estigis eĥon internacie. Tiamaj tutmondaj anarkiismaj gazetoj kaj Esperantaj gazetoj multe publikigis ĝiajn artikolojn. Diverslandaj amikoj kaj esperantistoj, inkluzive de Kropotkine, J. Grave, Emma Goldman, Osugi Sakae, Zamenhof k.a., skribis aŭ sendis fotojn al ĝi por kuraĝigo. Ankaŭ anarkiismaj kaj Esperantaj gazetoj de diversaj landoj starigis kun ĝi rilaton por interŝanĝi la revuojn.

En 1914 li organizis en Shanghai la Anarkiist-komunistan Grupon. La 14-a artikolo de ĝia programo difinis: "En la lerneja instruado oni devas apliki la universalan lingvon por iom post iom elimini diversajn naciajn lingvojn kaj skribojn." La 27-an de junio de la sama jaro, en la nomo de la Anarkiist-komunista Grupo Liu Shifu skribis al la Universala Kongreso de la Anarkiistaj Partioj kaj prezentis al ĝi kvin proponojn, unu el kiuj temis pri Esperanto. Li diris: "Niaj partioj dislokiĝas en diversaj landoj kaj uzas malsamajn lingvojn, kio estas la kaŭzo, ke oni ne povas unuigi. Tial estas necese uzi Esperanton por unuigi la lingvojn. Ĉiuj oficialaj dokumentoj de niaj partioj devas aperi unue en Esperanto kaj due en naciaj lingvoj. Ni devas pli multe kunlabori kun aliaj Esperantaj organizoj por disvastigi Esperanton interne de niaj partioj. Niaj gazetoj devas pli multe publikigi Esperantajn presadojn por propagandi Esperanton en ĉiuj landoj." Dum la redaktado de la gazeto li praktikis la supre diritan principon. Ĉiu en la 22 numeroj redaktitaj de li havis artikolojn pri Esp-



La gazeto "La Voĉo de la Popolo" eldonita de Liu Shifu

NOVAJ ELSTARAJ TABLO- TENISISTOJ APERINTAJ EN ĈINIO

En la fino de septembro, en la urbo Hefei de orienta Ĉinio okazis tablotenis konkursa partoprenata de elstaraj ĉinaj ludistoj. La mondaj geĉampionoj de solludo Guo Yuehua kaj Tong Ling perdis la matĉojn unu post alia. La elstaraj ludistoj Wang Huiyuan kaj Cao Yanhua gajnis la ĉampionecon en la vira kaj virina solludoj respektive. Kaj novaj tablotenisistoj el Jiangsu, Hebei, Guangxi, Xinjiang kaj aliaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj gajnis la duajn kaj triajn lokojn. Nombro da novicoj debutis kaj prezentis bonegan ludarton en la konkurso. Ofte okazis, ke nesemaj ludistoj venkis la semajn. Inter la pli ol 30 semaj ludistoj viraj kaj virinaj nur 9 iris en la unuajn ok lokojn de la vira kaj virina solludoj.

novajoj, en kaj ekster Ĉinio, pri prezentado de Esperanto kaj Esperantaj organizoj k. a.

La mono por la eldonado de la gazeto venis ĉefe de oferado. La gazeto estis senpage donacita al la legantoj interne de la lando kaj elmigrintaj ĉinoj. Kaŭze de la dufoja translokiĝo de la presejo, granda malfacilo estiĝis en ĝiaj monrimedoj. La redaktoroj de la gazeto ofte devis suferi malsaton, kaj pro tio ege malfortiĝis Liu Shifu. Ĉiufoje, kiam eldoniĝis nova numero, li devis kuŝi malsane sur lito por kelkaj tagoj. Tuj kiam li iom resaniĝis, li laboris diligente kiel antaŭe. En la unua tagdeko de novembro, 1915, lia malsano graviĝis.

DU MATĈOJ INTER LA PIEDPILKAJ TEAMOJ ĈINA KAJ NOVZELANDA

La 24-an de septembro, en la Beijing-a Laborista Stadiono okazis la unua matĉo inter la teamoj ĉina kaj novzelanda en la Azio-Oceania finala selekta konkurso de la mondopokala piedpilka ĉampioneca konkurso. La matĉo, kiun rigardis pli ol 80,000 personoj, finiĝis per 0:0.

La dua matĉo inter ili okazis la 3-an de oktobro en Auckland de Novzelando. Per 0:1 la ĉina teamo perdis la ludon, kiun rigardis 15,000 interesitoj.

SUKCESOJ DE LA ĈINA VOLANA TEAMO EN LONDONO

En la Tria Internacia Turniro de Mondaj Elstaraj Volanistoj okazinta la 26-an de septembro en Londono la ĉinaj gesportistoj Zhang Ailing kaj Luan Jin gajnis la ĉampionecon en la virina kaj vira solludoj respektive. Zhang Ailing kaj Liu Xia gajnis la ĉampionecon en la virina parludo.

Por kuraci lin liaj kolegoj proponis vendi la presmaŝinon, sed li neniel konsentis tion. Kuracistoj konsilis, ke li manĝu bovaĵon, lakton kaj ovojn por fortigi la korpon, sed li preferis morti ol malobservi la statuton de la Societo de Konscienco.

X-radia ekzameno montris, ke li suferis de ftizo. La 27-an de marto, 1915, li mortis en sia aĝo de 31 jaroj.

En septembro de la sama jaro, liaj kolegoj entombigis liajn restaĵojn en Yanxiadong de la Okcidenta Lago de Hangzhou. La Esperanta epitafio sur lia tombŝtono registris lian tutan vivon. Ĝi estas grava Esperanta dokumento en la frua periodo

Jam okazis dufoje tiaj turniroj ekde 1979, kaj la trian partoprenis pli ol 30 elstaraj ludistoj el Danlando, Hindio, Indonezio, Japanio, Svedo, Ĉinio kaj Britio. La ĉinaj sportistoj unuafoje partoprenis tian konkurson.

ĈINAJ GIMNASTINOJ GAJNIS KVAR ĈAMPIONECOJN EN ITALIO

En la tria tagdeko de septembro okazis en Sicilio de Italio la Tria Catania Invita Virina Gimnastika Turniro, en kiu ĉina gimnastino Xiang Yu gajnis la ĉampionecon en la kunmetita individua konkurso per 38.20 poentoj. Ŝi gajnis ankaŭ la unuajn lokojn de la ŝtupa paralelado kaj grundgimnastiko. Alia ĉina gimnastino Zheng Jie gajnis la ĉampionecon de senansa ĉevalado per 19.05 poentoj. Ŝi gajnis ankaŭ la duajn lokojn de la kunmetita individua konkurso kaj trabado.

Krom gimnastinoj de la gastiganto Italio, la nomitan turniron partoprenis ankaŭ tiuj el Ĉinio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, la Germana Demokratia Respubliko, Rumanio kaj Hungario.

de la ĉina Esperanto-movado.

Post lia morto liaj disĉiploj funebris lin en Hongkong, Aomen kaj Guangzhou, kantante por li Esperantan elegion. Ili heredis la aferon de Liu Shifu, daŭre eldonis la gazeton kaj en januaro de 1916 iniciatis la Esperantan monatan gazeton "Ĉina Stelo" por propagandi Esperanton. Ĝi ricevis laŭdon de ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. "La Voĉo de la Popolo" kaj "Ĉina Stelo" estis honoritaj siatempe kiel gazetoj fratinaj. El tio ni povas vidi influon de Liu Shifu.

Ni ne aprobas la politikan tezon de Liu, sed kiel pioniro fervore sin dediĉinta al Esperanto, li estas memorinda.

Pupistoj Interesiĝas pri Esperanto

de Spomenka Stinac



La pupteatro "Petruskja" el Trondheim, Norvegio, ĉe PIF en Troms

Pupteatro estas teatra branĉo kiu nun ofte rilatas al Esperanto. Al tio parte kontribuis la festivalo nomata PIF (Pupteatra Internacia Festivalo) kiu de la lastaj 14 jaroj ĉiuoktobre okazas en jugoslavia urbo Zagreb. Tie dum kvar tagoj renkontiĝas profesiaj teatroj ludantaj en Esperanto. Unu el la plej altaj atingoj de la festivalo sendube estis la ĉeesto de ĉinaj pupistoj ĉe la festivalo en 1978. Kvan-kam jam tri jaroj forpasis de tiu

gastado, forte sigeliĝis en memoroj "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" kun legendea heroo Sun Vukong.

Ĉar la jugoslavia urbo Zagreb kaj la norvega Troms estas amikaj urboj, la norvega komunumo Troms invitis la Esperanto-festivalon al gastado en Norvegio. La unua gastado realiĝis surbaze de iniciato de s-ro Zlatko Tišljar, direktoro de la Internacia Kultura Servo el Zagreb. Tiu entrepreno

daŭre flegis kontaktojn kun norvegoj kaj post la unua eksperimenta gastado en 1978, inter la 11-a kaj la 14-a de junio Troms denove fariĝis pupteatra centro. Profesiaj ensembloj el Svedio, Finnlando, Jugoslavio, Hungario kaj Norvegio montris siajn prezentaĵojn. En Esperanto prezentiĝis hungara pupisto Roberto Banky el Budapesto kiu ĉijare gajnis la premion "Jozefo Petrin". Tiu premio estas atribuita memore al rumana Esperanto-pioniro Jozefo Petrin kiu multe kontribuis al uzo de Esperanto inter rumanaj pupistoj. Indas menciigi ĉi tie, ke financajn rimedojn por tiu mona premio de 25 usonaj dolaroj jare prizorgas s-ino Gigi Harbagiu el Usono memore al la forpasinta rumana samideano.

Ankaŭ jugoslava teatra ensemblo el Zadar ludis en la internacia lingvo fabelon de H. C. Andersen "Firma Stana Soldato". Per tiu perpupa interpretado jugoslavia teatro ricevis veran majstroverkon. Ĝojigas la scio, ke tiu kvalifikita prezentaĵo estas nun ankaŭ en Esperanto ĝuebla.

Ĉeestintaj pupistoj el Svedio kaj Norvegio ĉi tie la unuan fojon renkontiĝis kun la internacia lingvo kaj montris intereson por ĝi. Des pli ĝi allogas ilin, se per la kono de la internacia lingvo ili povus vojaĝi al Ĉinio kaj surloke kontaktiĝi kun ĉina pupteatra arto. Eble tiu vizito de pupistoj al Ĉinio povus estonte realiĝi. Ankaŭ Troms estonte spektus ĉinan prezentaĵon sur sia scenejo.



* Dizdareviĉ H. Jusuf, instruisto, Babina Elementa Lernejo, 72000 Zenico, Jugoslavio, dez. kor. kaj interŝ. bk k insignojn.

* Dizdareviĉ Vildawa, lernantino 10-jaraĝa, 72000 Zenico elementa

lernejo Babina, Arnauti, Jugoslavio, dez. kor. kun esp-istoj el Ĉinio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio Francio, Hispanio, Svedio, Sovetunio kc. Esp. aŭ ruslingve.

* 19-jara junulo dez. kor. pri ĉiutaga vivo, politiko, literaturo, homaj rajtoj k.a. Dirk Kretschmann, Bekassinenu 122a, D-2000 Hamburg 73 FR Germanio.

* Mehmed Bilge (27-j.) turisma oficistino, dez. kor. t.m. pri turismo, ĵurnalismo, muziko, sporto Esp. aŭ angle. Adr.: P.K. 344 ULUS-Andara, Turkio.

* S-ro Ara Nruzy, (17-j.) dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj esp-istinoj pri politiko, muziko kaj interŝ. pm. Adr.: P.O. Box 2398, Tehran, Irano.



SUKCESO DE ĈINIO EN MARSISMA EKSPERIMENTADO

En la dua tagdeko de aŭgusto, Ĉinio unuafoje faris mar-sisman eksperimentadon en la Beĵing-Tianĵin-Tangŝan-a sismo-prognoza eksperimentejo.

Tiu eksperimentado, en kiu oni faris grandan kombinan eksplodon, okazis en maro profunda je 20 metroj sur la norda latitudo 38°50' kaj orienta longitudo 118°47'. Por observi kaj mezuri la eksperimentan eksplodon, oni organizis pli ol 180 sismo-observajn staciojn fiksaĵn kaj moveblajn en la urboj Beĵing kaj Tianĵin kaj en la provincoj Henan, Hebei, Ŝandong, Ŝanxi kaj Liaoning, kiuj formis observan reton de 800,000 kvadrataj kilometroj kun radiuso de ĉ. 500 kilometroj. Oni faris analizon al la materialoj akiritaj en la observado kaj mezurado kaj konstatis, ke tio estas sukcesa eksploda eksperimentado.

RARAĴO TROVITA EN LA MEZA PACIFIKO

En 1979, kiam Ĉinio unuafoje partoprenis en la atmosfera eksperimentado de la tuta terglobo, tri sciencaj laborantoj de la Unua Oceanografia Instituto de la Ŝtata Oceana Buroo de Ĉinio Peng Han-

chang, Zhao Kuihuan kaj Chen Suitian trovis vitrecajn grajnetojn de aerolitoj en la interno de rokpecoj prenitaj el marfundo profunda je ĉ. 5,000 metroj en la okcidenta parto de la meza Pacifiko (sur la norda latitudo 3° kaj la orienta longitudo 165° kaj sur la norda latitudo 5° kaj la orienta longitudo 165°). Tiuj malofte vidataj vitrecaj grajnetoj estas riĉaj je silicia dioksido, kaj la strukturo de unu el ili estas tre simila al tiu de la "Darvina vitro" trovita antaŭ ĉ. 150 jaroj.

La sciencaj laborantoj konstante faras esploradon al tiuj vitrecaj grajnetoj, kiuj havas gravan valoron por koni la devenon de la vitreca grajneto de aerolito kaj por studi geologion, astronomion, aerodinamikon, aeronautikon kaj kosmonautikon.

26 NOVAJ ALTAJ LERNEJOJ FONDITAJ EN ĈINIO

Lastatempe la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio sankciis fondon de 26 novaj altaj lernejoj, el kiuj estas 6 mekanikaj, 2 medicinaj, 13 normalaj, 4 financaj kaj ekonomikaj kaj 1 sporta institutoj. Tiuj lernejoj fondiĝis kiel suplemento aŭ aldono.

UNUA GRUPO DA PERSONOJ DE LA ĈINA AKADEMIO DE SCIENCIOJ REVENINTA POST STUDO

Ĝis la unua tagdeko de septembro, pli ol 200 el la pli ol 1,500

sciencistoj, fakuloj kaj esplorantoj-studentoj eksterlanden senditaj de la Ĉina Akademio de Sciencoj jam revenis en Ĉinion unuj post aliaj. Ili diligente studis eksterlande por koni la internacian nivelon kaj disvolviĝon de sia fako kaj posedi avangardajn teknikojn kaj eksperimentajn procedojn. Dank' al tio ilia faka nivelo estis multe altigita.

Post la reveno iuj el ili estas starigantaj novan sciencan fakon, aliaj prenas sur sin pezan taskon de sia fako, triaj instruas esplorantoj-studentojn, kvaraj prelegas en koncernaj institutoj kaj kvinaj sin preparas por fondi novan laboratorion. El ili pli ol 30 personoj atingis rimarkindajn sukcesojn, el kiuj iuj eĉ ŝtopis la mankolokon de Ĉinio en iuj kampoj de scienco.

LA DOKUMENTAJ FILMOJ "ĈINA GEMO — SONG QINGLING" KAJ "HEJMLOKO DE SUN JATSEN" FINFARITAJ

Tiuj du koloraj filmoj estis finfaritaj de la Centra Novaja Studio kaj prezentataj.

La antaŭa registris la funebrajn aktivadojn de partiaj kaj ŝtataj gvidantoj kaj la popolo por la ĉina honora prezidantino Song Qingling. La filmo prezentas per multaj raraj historiaj materialoj ŝian grandan kaj gloran revolucion vivon en la pasintaj pli ol 70 jaroj.


* 23-jara viro dez. kor. kun Esp. geamikoj tm. interesiĝas pri literaturo, fremdlingvo kaj turismo. Adr: Kazimiers Dabrowski, ul. Koreanska 1/226, PL-52-121 Wroclaw, Pollando.

* Nia societo deziras korespondi kun ĉinoj en Esperanto, ĉina, angla,

japana lingvoj respektive. Adr: Societo por japana-ĉina amikeco per korespondado, hiroŝi oota, Tokio hinoŝi oĉikaŭa 1415. 191.

* Lernantino, 13-jara dez. kor. tutmonde pri geografio, biologio kaj diversaj temoj. Adr: Sipo Julia, Donath 105 Ap. 20, 3400 Cluj-Napoka, Rumanio.

* Japana Esperanto-Instituto petas internacian korespondadon. Tiu, kiu deziras korespondi kun japanaj gesamideanoj, skribu al jena adreso per preslitero donante detalojn pri nomo, sekso, aĝo, profesio, hobia (interesiĝo), kaj se eble sendante sian portreton. Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinz-yuku-ku, Tokio 162, Japanio.



Pang Juqin, la ĉefa kulturanto de la kotonon Lumian n-ro 1

LUMIAN n-ro 1 estas nova specio de kotonon laŭdata en Ĉinio. Ĝia kreinto — la Kotonona Instituto de Shandong-provinco estis honorita per unuagrada ŝtata inventpremio. Sed kiel ĝi naskiĝis kaj pro kio ĝi ricevis tian honoron? Kun tiuj demandoj mi vizitis la instituton en Linqing-gubernio en nordokcidenta Shandong-provinco.

NASKIĜO DE NOVA SPECIO

Elkulturi bonan semon estas afero grava sed ne facila por ĉiu agronomia instituto.

Antaŭe kreskis en la kotonaj kampoj de Shandong-provinco la specio *Daizi* enkondukita el Usono, precipe *Daizi* n-ro 15, kiu karakteriziĝas per siaj longaj fortikaj fibroj, brileco kaj alta produkto. Sed la longa kulturado de ĝi pruvis ke ĝi ne adaptiĝas al la tiea klimato kaj ofte ŝanĝiĝas ĝiaj ecoj kaj formo, kio kondukas al malpliigo de la hektara produktokvanto. En la periodo de 1949 ĝis 1979 ĝia meznombra hektara produktokvanto estis nur 258 kg. Kiam

ZOU CHAO:

Altprodukta kotonon Lumian n-ro 1

oni povas havi kotonsemon stabile altprodukta de kotonon kun bonkvalita fibro? Tiu demando pezis sur la koro de la tieaj kotonkultivistoj.

Por rapide havigi al si bonan kotonon specion, en la komenco de la 6-a jardeko la tieaj scienc-esploristoj hibridigis kotonon *Zhongmian* n-ro 2 kun alia specio. Ili faris selektadon tra 9 generacioj en dek jaroj. Tamen iliaj idoj ne estis elstaraj, kaj la ecoj kaj formo ne stabilaj, tial ili ne povis esti disvastigataj. La scienc-esploristoj tamen ne ŝanceliĝis pro tio, ili traktis la semojn per radiado kaj poste semis ilin en eksperimenta kampo por fari komparon. Dank' al zorgema kulturado aperis miraklo: Vico da kotonarboj kreskas aparte bone, kun fortaj tigoj kaj prosperaj branĉoj portantaj grandajn kotonajn fruktojn. Kun ĝojo la scienc-esploristoj plukis kvin grandajn fruktojn de sur la plej bona kotonarbeto kaj generigis iliajn semojn por fari komparon en la eksperimenta kampo. Sub la samaj kondiĉoj de grundo, akvo kaj sterko, ili produktis pli multe ol *Daizi* n-ro 15 je pli ol 25% kaj kreis la rekordon de hektara produktokvanto de sensemigita kotonon 1,950 kg. Post plurfoja fizika ekzameno oni konstatis ke ili havas longajn fibrojn de alta klaso kaj se ĉi tiuj estas miksitaj

kun kemiaj fibroj por ŝpinado, oni povas produkti tre fajnajn fadenojn. En 1976 oni donis al tiu specio la nomon *Lumian* n-ro 1.

Lumian n-ro 1 karakteriziĝas ĉefe per sia stabila kaj alta produkto kaj adaptiĝemo. Pro sia frua maturiĝo kaj rezistemo kontraŭ frua prujno kaj malalta temperaturo en norda Ĉinio, ĝi povas tre bone kreski en la vastaj kotonproduktaj regionoj en la baseno de la Flava Rivero. Ĝi bone kreskas kaj sur la ordinara grundo kaj sur salalkala, malfekunda grundo. Ĝi estas ankaŭ interplantebla kaj havas fortan rezistan povon kontraŭ malfavoraj naturaj kondiĉoj kaj kapablon rapide kreski post damaĝo. La faktoj pruvis ke ĝi estas la plej bona kotonona specio en Ĉinio.

15 jaroj forpasis de 1961, kiam oni komencis hibridigi ĝin, ĝis ĝia naskiĝo. En tiu periodo dekelkaj scienc-esploristoj partoprenis en la kultivado ŝajne ordinara, sed la notlibroj plenskribitaj je donitaĵoj ja atestas la ŝvitlaboron de la kultivintoj.

BONAJ SEMOJ EN VASTEGAN KAMPARON

La sukceson de *Lumian* n-ro 1 signifas ne ĝia naskiĝo, sed ĝia disvastiĝo.

Ordinare, la kotono generas dekoble en la unua generacio, okoble en la dua kaj kvinoble en la tria kaj sekvantaj generacioj. Sed *Lumian* n-ro 1 generas meznombro 30-oble ĉiujare en la unuaj 4 jaroj. En 1975 ĝi kreskis nur sur 1/15 hektaro da kampo, en 1976 sur 2.8 hektaroj, en 1977 sur 80 hektaroj, en 1978 sur pli ol 3,000 hektaroj kaj en 1979 sur 80,000 hektaroj.

La kotona produktokvanto tuj levigis ĉie, kie oni antaŭe kultivis la kotonon *Daizi*, se oni semis anstataŭe *Lumian* n-ro 1. En 1979 la kotona instituto popularigis ĝin en Linqing-gubernio kaj ties meznombra hektara produktokvanto kreskis de 337.5 kg. ĝis 652.5 kg. En la sama provinco la kotona produktokvanto malpliiĝis tiujare ĉie kie oni ne kultivis *Lumian* n-ro 1. En 1980 *Lumian* n-ro 1 populariĝis preskaŭ ĉie en Shandong-provinco kaj tiujare la totala kotona produktokvanto de la provinco atingis 537,320,000 kg., t.e. je 370,500,000 kg. pli multe ol tiu en 1979.

La novaĵo pri abunda rikolto de *Lumian* n-ro 1 atingis Linxi, najbaran gubernion de Linqing sur la alia bordo de la Granda Kanalo. Multe da brigadoj kaj komunumoj sendis interŝanĝi semon de la nova specio.

Por akiri bonan rikolton oni devas posedi ankaŭ teknikon de kultivado. Tial esploristoj de la kotona instituto fariĝis tre okupataj.

En la lastaj jaroj la scienc-esploristoj elbakis multajn kotonkultivistojn per kursoj kaj lekcionoj faritaj en multaj lokoj de la provinco. Ĉiujare kamparanoj ĉeestis tian lernadon meznombro je 100,000 homfojoj. Kaj en 1980 eĉ je 500,000 hom-

fojoj. En la printempo de la lasta jaro la Scienc-teknika Eldonejo de Shandong-provinco petis la instituton verki broŝuron "Kiel Bone Kultivi *Lumian* N-ro 1" kaj doni al ĝi la manuskripton en unu semajno. La scienc-esploristoj klopodis tage kaj nokte kaj rapide plenumis la taskon. Baldaŭ 150,000 ekzempleroj da ĝi estis disdonitaj al kadroj kaj kamparanoj antaŭ la semado de kotono.

Tiamaniere *Lumian* n-ro 1 disvastiĝis ne nur en Shandong-provinco, sed ankaŭ en la provincoj Hebei, Henan, Jiangsu k.a. En 1980 la areo por ĝia kultivado jam superis 600,000 hektarojn.

La dekstra kotonplanto estas Lumian n-ro 1 kaj la maldekstra Daizi n-ro 15.

Agronomo instruas al kotonkulturantoj teknikon pri kulturado de la kotono Lumian n-ro 1.

La disvastiĝo de 1/15 ĝis pli ol 600,000 hektaroj daŭris nur ses jarojn. Tia rapideco estis malofta en la historio de disvastiĝo de kotono.

GOJO DE LA KOTONKULTIVISTOJ

Kiel kamparanoj opinias pri *Lumian* n-ro 1? Por solvi tiun demandon mi forlasis la instituton por viziti la produktan brigadon Xijiuxian de Linqing-gubernio.

Nun tiu produkta brigado ĉiujare kultivas la nomitan specion de kotono sur 45.6 hektaroj da kampoj. En 1980 ĝia mez-


(Daŭrigota sur p. 10)





Reĝo de ginsengo

En la gubernio Fusong de Jilin (Gilin)-provinco, en la primitiva arbaro sur la suda deklivo de Changbai-montaro kvar kampuloj trovis sovaĝan ginsengon kun pezo de 287.5 gramoj, raran en la regiono de Changbai-montaro. La scienc-teknikistoj asertis post ekspertizo, ke ĝi estas pura sovaĝa ginsengo kun aĝo de ĉ. 100 jaroj. Oni nomas ĝin reĝo de ginsengo. Ĝi estas 54 centimetrojn longa de la kapo ĝis la radikofino kaj surhavas delikatajn vejnojn. Ĝiaj maldikaj radikoj estas simetrie kovritaj per tuberetoj. Ĝi estas vere in-



Granda sovaĝa ginsengo

teresa kreaĵo de la naturo. La popola registaro de la provinco decidis eksponi ĝin en la Jilin-a salono de la Popola Halo en Beijing.

Medikamento antaŭ 3000 jaroj

En tombo de Taixi-vilaĝo de Gaocheng-gubernio, Hebei-provinco oni trovis kernojn de persiko kaj prunuso (*Prunus japonica thunb*), ŝtonan tranĉilon kaj aliajn ĉinajn drogojn kaj kuracilojn. Post esploro la fakuloj asertis ke la koncerna tombo estas de Shang-dinastio en la 14-a jc. a.K. La medikamentoj, kiujn oni elterigis, estas tiuj plej fruaj, kion oni konas hodiaŭ, pruvas, ke antaŭ pli ol 3,000 jaroj la laboranta popolo de Ĉinio jam povis kuraci malsanojn per medikamentoj el drogherboj kaj povosciis fari kuracilojn.

La kernoj de persiko kaj prunuso estas ĉinaj drogoj kaj ŝtona tranĉilo en formo de sarkileto estas antikva ĉina kuracilo por disrompi absceson. La nomita ŝtona tranĉilo 10 centimetrojn longa havas glatan surfacon kaj akran pinton.

Reĝo de arboj

Sin trovas ginko pli-ol-3000-jara sur Fulai-monto de Shandong-provinco. Ĝi, 25.4 metrojn alta kun trunkocirkonferenco de 15.7 metroj, donas ombrojn al areo de 800 kvadrataj metroj. Ĝi estas la plej granda ginko trovita en nia lando ĝis hodiaŭ. Sub la arbo estas steleo starigita en 1653 kun jena skribaĵo: "Ĉe tiu ĉi ginko estis ejo de intertraktado inter

Regnestro Lu kaj Juzi. La arbo vivis jam pli ol 3,000 jarojn, tamen ĝi estas riĉa je frondoj kaj ĝia ombro kovras kelke da muoj (1 muo egalas al 1/15 hektaro) . . . ja mirindaĵo." (La koncerna intertraktado okazis en 715 a. K. — Trad.).

Ginko estas dioika planto. Antaŭ ĉ. 200 milionoj da jaroj kreskis multe da specioj de ginko tra la tuta mondo. Sed antaŭ 500,000 jaroj la glaciriveroj pereigis preskaŭ ilin ĉiujn kaj ĝisvivis hodiaŭ nur la ĉina specio. La ĉina ginko estis enkondukita unue en Japanion en la 11-a aŭ 12-a jarcento kaj poste en Eŭropon en la mezo de la 18-a jc.

La nomita ginko estas femala, kaj polenata de la maskla ginko, kreskanta je 10 km. fore. Ĝi produktas jare ĉ. 1,000 kg. da kernoj kun altklasa nutrivo.

Rara blanka tearbo

En la popola komunumo Shanhe de Anji-gubernio en la montregiono Tianmu, Zhejiang-provinco kreskas rara tearbo blanka. Printempe kiam la maljunaj folioj flaviĝas, prosperas la novaj ŝosoj en jada koloro kaj faras impreson kiel neĝo en la senlimaj verdajoj.

Ĝi kun historio de pli ol cent jaroj produktas teon nomatan "jada stameno" kies infuzaĵo blanka kaj eleganta havas specialan guston.

Oni provis generi ĝin per markotado, stikado kaj semado, sed neniam sukcesis, ĉar la novaj plantoj elkreskigas nur verdajn foliojn.

(Daŭrigo de p. 37)


Malheliĝas iom post iom kaj la blanka muro klare staras en la griza krepusko. Mi sentas ke mi bezonas la muron, kiu rememorigas al mi multajn agrablajojn, kvazaŭ ŝi starus apud mi

forfrapante per siaj molaj fingroj polvon de sur mia korpo, kvazaŭ ŝiaj bukloj denove tiklus mian mentonon kaj eĉ ŝia korpo odorus per diskreta aromo. . . Neeltenebla estas tia sento, mi sopiras ŝin, sopiras el la tuta koro. Mi devas tuj iri al ŝi!

Dek metrojn for de mia dorso iu knabino staras firme volvante sin en koltuko kaj tremadas ŝiaj manoj tirantaj la koltukon. Larmeroj brilas sur ŝiaj vangoj. Denove larmoj. Ĉiam ŝi havas tian eksplodemon en sia temperamento, mia kara!

EN TIBETO

Fotoj de CHEN ZONGLIE



Potala-palaco post riparado



En teĝardeno en la mildaklimata orienta parto de Tibeto tibetaj knabinoj kolektas te-foliojn.


Riĉa rikolto de ŝaflano






Konkurso de surĉevala arkpafado de paŝtistoj

Studentoj de la Normala Instituto de la Tibeta Aŭtonoma Regiono





Tibeta Opero "Knabino Langsha"

Fotoj de YAN JIN

La tibeta opero havas densan naciecan koloron.

"Knabino Langsha" estas tradicia opero. Ĝi priskribas, ke Langsha, solfilino de malriĉaj servutuloj geedzoj Gongsang, estas knabino bela kaj laborema. Ŝin forrabis montestro Chaqin kaj devigis ŝin edziniĝi al lia filo. Lia filino malestimis ŝin pro tio, ke ŝi venis de malriĉa familio, kaj timis perdi la rajton mastri la tutan bienon, tial ŝi intencis insidi al ŝi. La lasta suferis ĉiajn turmentojn kaj fine estis brulmortigita. Per fantaziaj scenoj la opero prezentis figurojn de tibetaj servutuloj kaj montris iliajn sorton kaj deziron pri libero kaj feliĉo.

La komenco de la opero





Langsha (maldekstre) estas forrabata de montestro Chaqin (dekstre).

Unu el la scenoj de la opero

Langsha kun larmoj plendas al sia patro sin alvizitanta.



Langsha enfermita en brulaj-tenejo kaj baldau brul-mortigota





Grandaj Amikoj de la Infanoj

de Ho Lingyun

Sceno el "Piedpilkistetoj"

MALRAPIDE leviĝis purpura velura kurteno.

Ho, kiel bela bildo prezentiĝas sur la scenejo: En la ore brilanta Drako-reĝa Palaco sur marfundo ĉio ornamigas per ruĝaj kaj blankaj koraloj; en la faŭkoj de drakoj ĉirkaŭvolvanta la kolonojn trembrilas perloj, kaj la aroganta Drako-reĝo, sidante sur trono garnita per perloj, rigardas dancadon de palacaj servistinoj.

La malgrandaj rigardantoj kun naiva mieno tiel absorbiĝas, kvazaŭ ili mem estus en la Drako-reĝa Palaco.

Tie la Infana Arta Teatro de la Ĉina Bonstatiga Instituto en Shanghai prezentas la operon "Florkulturisto", kiu priskribas knabegon kulturantan ĉerizflorojn, kruelan Drako-reĝon kaj belan kaj bonkoran Drako-princinon.

Ĝi estas unu el la teatraĵoj plej ŝatataj de la infanoj. En la pasintaj pli ol 30 jaroj post sia fondiĝo la teatro kreis kaj pre-

zentis ĉ. 200 modernajn dramojn kaj aliajn programojn de muziko kaj dancoj, kiuj ricevis aplaŭdon de ĉinaj infanoj.

La teatro estis infana teatra trupo, kiu fondiĝis plej frue en Ĉinio, kaj pro tio oni nomas ĝin "pioniro" de la infana teatraĵo. En 1947 Song Qingling, prezidanto de la Ĉina Bonstatiga Fonduso (kiu poste alinomiĝis la Ĉina Bonstatiga Instituto), sentis urĝan bezonon liveri al la ĉinaj malriĉaj infanoj spiritan nutraĵon kaj ŝi do mem klopodis por fondi tiun trupon. Ĝiaj unuaj dekelkaj geaktoroj devenis el malriĉaj infanoj. Ili sin liberigis de la mizera vivo kaj venis en novan mondon. En 1957 la trupo reorganizis sin en la Infanan Artan Teatron. En multjara arta praktiko la malgrandaj geaktoroj kreskis kune kun la teatro. Nun la teatro jam havas pli ol 300 geaktorojn kaj sian propran teatran domon.

Ĝia estro Ren Deyao estas unu el ĝiaj fondintoj kaj ankaŭ

fama verkisto kaj reĝisoro de infanaj teatraĵoj de Ĉinio. La de li verkita mita teatraĵo "Astero" gajnis ŝtatan premion de dramo kaj estis filmita. Ĝi estis tradukita en plurajn lingvojn kaj la prezentado de "Astero" en Japanio kaj aliaj landoj ricevis laŭdojn de la publiko. Ankaŭ lia alia scenaro "Piedpilkistetoj" gajnis ŝtatan premion de dramo. Li bone konas infanojn kaj estas lerta en reĝisorado, tion tre admiras la rigardantoj. Li estas tre rigora al la aktoroj kaj en lia ĉeesto ili sin montras aparte diligentaj kaj seriozaj en provludado.

Liu Angu estas relative elstara el multaj bonaj geaktoroj de la teatro. Li, bone trejnita en arto, havas talenton en dancado, kantado kaj rolado. Li ludis la ĉefrolon en "Astero", perfekte prezentis honestan kaj justaman karakteron de la heroo, kio profunde impresis la rigardantojn. Por bone ludi la ĉefan rolon de halfo en "Piedpilkistetoj", li pene sin ekzercis pri malfacilaj

movoj de piedpilkado, kaj la malgrandaj rigardantoj eĉ prenis lin veterana piedpilkisto. Ankaŭ lia edzino Zhong Xiaoyin estas aktorino de la sama teatro. Ili havas solfilinon. Antaŭ sia nokta prezentado, ili devis frue enlitigi ŝin. Reveninte de prezentado, ili iam trovis la filinon ankoraŭ ne endormiĝinta, kaj la lasta sin ĵetis al ili plende. Liu Angu ameme diris: "Mia kara, pardonu viajn gepatrojn, ĉar nin atendis multaj infanoj en la teatro!"

En la teatro troviĝas pluraj geaktoraj paroj kiel Liu Angu kaj Zhong Xiaoyin, inter kiuj Zhan Che kaj Gu Guoyi estas alia paro. Zhan kun basa tembro komencis ludi maljunulon jam en sia aĝo de dekelkaj jaroj. Gu estas gracia kaj ofte ludas filon aŭ nepon. Por la arto Gu naskis infanon nur en la sesa jaro post la geedziĝo. Gu estas lerta en ludado de knabo de malsamaj karakteroj. Ŝi opinias, ke aktorino havas avantaĝon en ludado de knabo pro sia staturo kaj voĉo, sed ŝi devas nevidebligi trajtojn de virino en movoj kaj korpa formo kaj kuraĝi troigi la prezentadon. Estas grave havi memfidon sur la scenejo kaj kredi, ke ŝi mem estas knabo. Ŝia filo Xiaoqiang havas 9 jarojn kaj estas tre vigla kaj moviĝema, kaj li estas bona modelo de la patrino en ludado. Lastatempe Gu Guoyi ludis ĉefrolon en la scienc-fikcia tea-

trajo "Mistera Ĉapelo". Estas tre hazarde, ke la rolo havas la saman nomon kiel ŝia filo. Li vivas en la estonta mondo, kaj estiĝas nemalmultaj ridindaĵoj pro tio, ke inĝeniero elfaris aŭtomaton tute similan al li. Gu opinias, ke la rolo tre similas al ŝia filo, ŝi do kune kun sia edzo observis kaj analizis la movojn kaj psikon de la filo. Kiam Xiaoqiang sub la scenejo estis altirita de tiu sur la scenejo, la antaŭa neniel atendis, ke ankaŭ li kontribuis al la prezentado.

Antaŭ du jaroj la teatro prezentis la dramon "Tong Xin", kiu vekis fortan eĥon en la socio. La afero okazis en iu apartamento en Shanghai. En 1975 biologia instruisto Tong Xin emeritiĝis. Li trovis, ke infanoj najbare de lia hejmo estas sensciaj pro la socia tumulto en la kultura revolucio. Li do elverŝis sian tutan entuziasmon kaj energion por helpi ilin. Dum la prezentado eksplodis de tempo al tempo longa aplaŭdo en la teatro kaj multaj rigardantoj kortuŝiĝis ĝis larmoj. En malpli ol unu jaro la dramo estis prezentita 128-foje en Beijing, Nanjing, Wuxi, Shanghai kaj aliaj urboj. En la Tutĉinia Arta Festivalo ĝi gajnis la unuaklasan premion de prezentado kaj duaklasan premion de dramo.

Post rigardo de teatraĵo plenkreskuloj facile memoras la geaktorajn kaj rolojn samtempe,

dum infanoj ofte neglektas la ludantojn kaj memoras nur la rolojn. Malgraŭ tio, infanoj estas plej varmaj kaj sinceraj rigardantoj, kiuj povas tutanime percepti ĉion donitan de la ludantoj. Foje la teatro prezentis la dramon "Lei Feng", kiu pri-skribas helpeman soldaton de la Liberiga Armeo. Post la prezentado la geaktoraj ne povis hejmeniri pro pluvo. En tiu momento venis al ili kelkaj infanoj por doni al ili ombrelojn kaj galoŝojn. Kiam la geaktoraj dankis ilin, iu el ili diris montrante Liu Angu, kiu ludis la rolon de Lei Feng: "Estas li, kiu instruas nin tiel fari." Por la geaktoraj ja estas nenio pli feliĉa ol tio, ke la roloj kreitaj de ili estas varme akceptitaj kaj ŝatataj de la spektantoj.

Profunda amikeco stariĝis inter la geaktoraj kaj malgrandaj rigardantoj. Geaktoraj ofte partoprenas aktivadojn de la infanoj. Ankaŭ la lastaj rigardas ilin kiel karulojn, ofte skribas al ili, iuj eĉ sendas al ili sian poentoliston de lernado. Post kiam iuj infanoj plenkreskis, ili eĉ diris al geaktoraj sian amaferon por peti iliajn konsilojn.

La teatro havas multajn talentajn aktorojn kaj ili certe sukcesas en prezentado de teatraĵoj de Ŝekspiro, se ili volus. Tamen ili diris, ke ili preferas ludi por la infanoj lupon kaj kuniklon dum la tuta vivo.


Gu Guoyi (maldekstre) kune kun siaj infanoj

Geaktoraj inter geknaboj



BLANKA MURO

de CHU DI



Ilustritaj de YIN FENGGE

Tie iras malkonstruado kaj transloĝigo. Malkonstruiĝis la movoplana plaĉa korteto, post-restas grizaj ruinoj kaj ankoraŭ staras nur la blanka dorsa muro de la norda domo, kiu rebrilas blindige en la suno. Antaŭe ĝi estis dividita de du brune lakitaj kolonoj en tri partojn, sed nun ĉe la lokoj vidiĝas nur grizaj brikoj malordaj.

Detruigis la domo, tamen restas la muro; tiel sama estas nia nova geedzeco, de kiu disfalis la framo, tamen ankoraŭ restas la amo. Kaj tiu muro fariĝis la sola konsolo por mi.

Ĉe la dekstra angulo de la kalkita muro vidiĝas du ombrecaj postsignoj el frotado de niaj dorsoj. Preskaŭ post ĉiu vespermanĝo ŝi lokis tie du taburetojn kaj tiu loko fariĝis iom post iom nia "tereno". La luma ekrano de la televidilo brilis jen forte jen malforte kaj en la mallumo ni kunpremiĝis unu al la alia. Tiam nur unu ideo okupis nin: "Geedziĝu, tuj geedziĝu! Kaj poste estos senfina dolĉo de amo."

Fine, antaŭvespere de la Nacia Festo de 1979, ni enloĝiĝis en la ĉambreto, kiun nia fabriko

luigis al ni. Post la foriro de ĉiuj gastoj alvenintaj por nin gratuli, ni firme ĉirkaŭprenis nin. Ho, novaj geedzoj! Ho, nia eta familio! "Kiel bele!" ŝi flustris en mian oreilon.

Miela monato, miela monato, kies ĉiu tago dolĉis kiel mielo, kaj la mielon suĉadis mi kaj ŝi ĝis plena kontento. Post la deĵoro en ĉiu tago ni kune rigardis filmon, partoprenis balon, promenis en avenuoj aŭ ludis briĝon... senlace. Ŝi ofte ludis la rolon de mastrineto kun memkontenta mieno. Ŝi ŝatis elmontradi sian kuirarton portante sian broditan rozkoloran antaŭtukon.

"Aĥ," mi priridis ŝin, "vi scipovas fari nur tiel malmultajn pladojn? Terpomaj strioj, rafanaj strioj, brasikaj strioj, terpomaj lamenetoj, rafanaj lamenetoj, brasikaj lamenetoj, terpomaj pecetoj..."

"For —" ŝi eĉ sin jetis al mi.

Ni ofte ridadis, kisadis nin forgesante manĝon; kaj tute ne gravis la forgeso! "Ho, kiel bele!" diris ŝi ebrie. Ĉu tio estas amo? Verŝajne jes. Ankaŭ mi ne sciis klare. Lasu tion!

Forpasis la miela monato. Ŝi kunvolvis la littukon, litkovrilon kaj kapkusenajn tukojn kaj ilin kunportis al la patrina domo. Eble pro la miela monato servistino onjo Cao ilin lavis, sekigis en la suno, bonorde faldis kaj reportis al ni. Forpasis aliaj du monatoj, mia edzino same faris tian kunvolvaĵon kaj diris ke mi ĝin portu al onjo Cao. Tiufoje onjo Cao estis faranta lavadon ĉe granda ligna kuvo kun amaseto da vestaĵoj kaj littukoj de mia bofrateto.

"Vi venas. Kial ŝi ne? Kiel ŝi sentis apetiton lastatempe?"

"Ne tiel," mi respondis preterpense.

"A?" onjo Cao mezuris min per sia rigardo kvazaŭ ni ĵus interkonatiĝus kaj diris, "estante forta junulo vi ja devas lerni iom labori!"

Tion aŭdinte mi eksentis stuporon kaj ofendiĝis. Ne estus ĝene, se ŝi rifuzus lavi por ni, sed ŝi mokis ĉirkaŭparole! Mi metis la kunvolvaĵon sub mian brakon kaj iris returne.

Kion fari? Mi mem lavu do! Mi eltiris la grandan platan kuvon kaj sakon da lavpulvoro kaj

trempis la littukon en varma akvo.

Vespere alvenis al ni geamikoj por ludi briĝon. Je divido de la partioj, oni diris, ke nia paro faris signojn por interkomuniko, kaj dividis nin ne lasante nin esti en unu sama partio. Ŝi ĵus ellernis briĝon kaj bezonis helpon, sed la geamikoj tion ne permesis pro ŝercemo. Tute neatendite estis, ke rezultigis el niaj 16 ludoj ke ŝi venkis apenaŭ kun supereco. Tio ŝin kuraĝigis kaj senĉese daŭris la briĝa batalo.

Pasis tiel tri tagoj sinsekve kaj mi tute forgesis la littukon. En tiu tago, kiam mi revenis hejmen post la deĵoro, mi vidis ke ŝi sidas kun la brodita antaŭtuko ligita al la talio mallaboreme ĉe la tablo.

“He, vi ankoraŭ ne preparas manĝon?” mi demandis. Ŝia oficejo estas pli proksime de la loĝejo kaj ĉiutage ŝi pretigis la manĝon antaŭ mia hejmenreveno.

“Mem preparu se vi volas manĝi, mi ne malsatas!”

“Kio estas al vi? Ĉu malsaniĝo?” Mi palpis ŝian frunton — ne febre. Ŝi ekfermis la okulojn, larmeroj eĉ elruliĝis sinsekve.

“Sensence! Banale! Lavado, kuirado, manĝado... La samo ripetiĝas ĉiutage. Fakte per la geedziĝo vi nur akiris servistinton, pli serveman servistinton! Ŝi devas iri al laboro por mono, kaj post hejmenreveno kuiri kaj lavi vestojn kaj krome dormi kun vi en lito!”

“Kial vi diras tion? La hejmeto apartenas al ni ambaŭ, kaj krome, ĉu ne estas mi, kiu aĉetas legomojn, grenon kaj karbon?”

“Ankaŭ estas vi, kiu trempis la littukon kaj litkovrilon en la kuvo sub la lito. Ili jam fiodoras. De kiom da tagoj? Ĉu lasu min tion fari?!”

Damninda littuko! Mi min klinis kaj eltiris la kuvegon. Vere, cirkla rusta makulo jam aperis sur la surakva parto de la littuko.

“Labori estas mia devo! Neniu laboras krom mi! Kaj tio estas feliĉo, amo?!”

Neniam mi atendis, ke ŝi povas koleriĝi kontraŭ mi pro tia bagatelo! Ho, fiadora littuko! Aliiĝis laodoro de amo! Diablo prenu!

En vintra krepuska vespero mi meditis, starante apud ŝi. Kiam ŝi estis en la patrino domo, ŝi tute ne bezonis zorgi pri manĝo kaj vestoj, sed nun ŝi devas ĉiutage klopodi por havigi al mi matenmanĝon kaj vespermanĝon, lavi por mi ĉemizojn kaj ŝtrumpetojn, kaj zorgi pri sen nombraj bagateloj en mastrumado de la hejmo. Kial antaŭe mi ne multe pensis pri tio?... Mi etendis manon por palpi ŝian vizaĝon — malsekaĵo restis ĉe la nazloboj. Subite ŝi sin forturĉis.

“Nu, nu, ne koleru plu,” mi ŝin konsolis, kliniĝis por ŝovi mian vizaĝon al ŝi. “Ekridu, servistineteto, kaj labori por mono kaj dormi kun mi en lito...”

Subite mi eksentis pikan ardon en la maldekstra vango, kaj akre varmega fluo tuj leviĝis brulante en la gorĝon, en la kapon. Mi ne multe pensis, kio tio estas, ĝi trafluis mian koron kiel bolanta magmo, malvarmiĝis tie restigante dikan tavolon da vulkana cindro. Ŝanĝiĝis la amo.

De tiam ni respektis unu la alian kiel “gastoj”. Ĉiutage post hejmenreveno ni interkonsiliĝis kune pri aĉeto de legomoj, greno kaj karbo kiel kutime. Mi faris kiel eble multajn mastrumajn laborojn kiel preni akvon, lavi legomojn, distranĉi terpomojn... la familia vivo iris regule. La vespermanĝo ofte finiĝis post la oka.

Dum iom pli ol unu horo antaŭ la enlitiĝo mi legis kaj ŝi trikis lanveston — por si. Iam kaj tiam mi ĉesis legi por rigardi ŝian trikadon por momento; iam kaj tiam ŝi ĉesigis trikadon por rigardi mian legadon... Ni ambaŭ deziris la antaŭan harmonion, sed neniam povis retroiri en ĝin. Pro la vangfrapo mi ne volis, ke ŝi malestimu min prenante min kiel nuran amurulon. Kaj ankaŭ ŝi ne petis de mi pardonon, certe timante, ke mi misprenos tion kiel klopodon por reakiri mian varmon. Ŝi kaj mi fariĝis ege diskretaj kaj ne faris unu troan paŝon eĉ en rutinaj aferoj. Ho, simile al migraj birdoj, ni pene konstruis nian neston nur por poste ĝin detrui per niaj propraj manoj!

Tiel pasis du aliaj monatoj. Iutage mi demandis ŝin: “Ĉu ni povus lavi la littukon kaj litkovrilon en ĉiu tria monato?”

“Jes, se nur vi ne ŝanĝos vian edzinon en ĉiu tria monato.”

“Vi! Vi ja ne tiel parolis antaŭe.”

“Sed nun! Simple konfesu, ke vi ne plu amas min...”

“Kial tia diro?”

“Vi mem scias! Kiel vi parolis kaj faris antaŭ la geedziĝo? Sed nun?” Ŝi preskaŭ ekkriis, kaj tamen ekplorsingultis pretervole, kovrante la vizaĝon per la manoj.

La geamantoj ne devus teni en memoro unu alies misfarojn. Sed kial mi tamen ne povis forgesi la vangfapon? Ĉu mi nun malesperiĝis pro antaŭa troa amo al ŝi aŭ mi amis ŝin ne tiel profunde?

Ŝi faris longan enspiron kaj laŭte ploregis.

Mi alproksimiĝis al ŝi kaj ŝin prenis en la brakojn. “Ni ja povus manĝadi en restoracio por ke vi ne okupiĝu pri tiel multaj mastrumaj aferoj, sed mi estas tro malriĉa...”

“Kiel tio rilatas al malriĉeco?” Ŝi diris ankoraŭ kun kolerero. Ŝajne la kverelo estis de longe dezirata de ŝi, nur por rompi la deprimon kaj elverŝi la ĉagrenon. “Temas pri koraj sentoj. Se ne plu estas amo, tiam ĉio perdas la signifon! Konfesu do!”

Ŝi bezonas tre multe da amo, kaj pagis por ĝi... ankaŭ ne malmulte. Mi ĉirkaŭprenis ŝin pli firme. Certaj vortoj jam estas sur la lango, sed necesas ekstera forto por kvietigi ŝin.

“Aŭskultu min,” mi pene malaltigis mian voĉon, “mi pensas, ke eble vi tro laciĝis, eble vi malsaniĝis. Vivante kun mi, vi ĉiam vin turmentadis. Mi pensas, ke estus bone ke ni vivu aparte por certa tempo, reiru portempe al la patrina domo kaj tie vivu por monato...”

Ŝi subite eklevis la kapon kaj time min rigardis kun larĝe malfermitaj okuloj larmoplenaj.

“Mi ne elpelas vin, sed tion proponas por via bono. La hejmeto ĉiam apartenas al vi; ankaŭ mi ĉiam estas via. Vi povas reveni iam ajn, nur kiam vi sopiros min...” Ankaŭ mi volus ploradi kiel ŝi, sed mankis al mi



sufiĉa eksplodemo en la temperamento. Ŝi denove eklarmis torente, kaj mi pensis, ke eble ŝi falos en mian sinon por ploregi, ĉar ankaŭ mi mem estis kortuŝita de miaj vortoj. Ŝi tamen ne ploris plu kaj jese balancis sian kapon. Tio estis atesto pri nia interkompreno.

Ŝi sendis al mi nenian informon dum tri semajnoj post sia foriro, eĉ ne sciigis min pri la transloĝiĝo de sia familio pro la malkonstruado. Nun restas nur la blanka muro por ke mi rememoru la pasintaĵojn antaŭ ĝi.

“Filmoj, baloj, briĝoj, ĉio tio estas farita por vi viroj, ĉio tio estas artifikaĵoj por trompi la virinojn. Geedziĝo kaj malapero de la amo...” “Ĉu inter ni estas nur terpomaj strioj, terpomaj lametoj, nur oleo, sojo, salo kaj vinagro? Ne babilu kun mi pri ĉio tio!” “Ĉu ni virinoj devas ĉiam esti banalaj, nur por

ke vi viroj ne estu tiaj?... Ho, diablo prenu.

Sen nutraĵo ankaŭ amo estas pala kaj febla, sed kio estas ĝia nutraĵo? Mi vidis, ke mi haste edziĝis sen klara ideo pri ĉio tio kaj ekserĉas amon kaj nutraĵon por ĝi nur post la edziĝo. Ĉu familio vere estas la tombo de amo? La amo droninta en oleo, salo, sojo kaj vinagro, la amo flavmakulita en lavkuvo, la amo kiu lacigas la gambojn ĝis doloro pro starado en longa vico de aĉetantoj...

Mi ja volas, ke ŝi vivu pli interese. Filmoj, teatraĵoj, koncertoj kaj kunvenoj por diskuto pri nebula poezio. Ŝi malŝatas mastrumadon ne pro mallaboremo, sed pro revemo; ŝia revata familio ne estas tia kiel la nuna, kaj cetere ŝi ja rajtas tiel revii. Kiel agas la homoj en la pasinteco, estanteco kaj estonteco? Ĉu efikas nur la inertforto?

(Daŭrigota sur p. 32)



Bonan vojaĝon, Mary!

de Yang Mingzhao

MATENE de la 21-a de majo, 1981, nigra personaŭto kuris el la Hotelo Nanjing. Ĝi trapasis bulvarojn en nebula gazo kaj eniris la Laboristan Hospitalon de Jiangsu (Giangsu)-provinco ĉe la piedo de Wutaimonto. Subite malsaniĝis la 84-jara sinjorino Mary Murray, membro de la Delegacio de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, kiu ĵus atingis Nanjing (Nankino) en sia vizito al Ĉinio. Ŝi malsaniĝis pro laciĝo de la longa vojaĝo, kaj ŝin akompanis al la hospitalo Zhu Mingyi, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo. Mary spiris malfacile sentante premon en la brusto, tusadis, astmis kaj ŝvitegis. La deĵoranta doktoro konstatis post ekzameno, ke ŝi suferas de akuta bronkito kaj astmo; oni devis tuj doni al ŝi urĝan helpon.

La subita enhospitaliĝo de Mary multe influis la aktivadon de la 16-membra delegacio. Por ne ŝanĝi la tagordon de la delegacio, ĝia estro s-ro William Harmon decidis, ke li mem kaj s-ino Betty J. Worswick, la filino de s-ino Mary Murray, restu kun ŝi portempe, kaj la ceteraj 13 membroj veturu al Beijing.

Li esperis, ke s-ino Murray rapide resaniĝos kaj povos daŭ-

rigi la signifoplenan viziton kune kun ili.

Sed la sano de Mary rapide malboniĝis. Malgraŭ la klopodoj de la medicinistoj, ŝiaj infektitaj spiraj organoj ne resaniĝis kaj pli kaj pli klare montriĝis simptomo de miokardia infarkto. Gvidanto de la hospitalo donis grandan atenton al la sanstato de Mary kaj tuj organizis medicinistojn por ŝin savi plenforte. Iom post la 17-a de la sekvanta tago, la administracio de la hospitalo sciigis doktorinon Cheng Yunlin, kiu tiam ordigis raportojn pri pacienca sanstato en la

Katetera Ĉambro, ke ŝi tuj rapidu al la malsanula ĉambro por kuna ekzameno kaj prognozado. Eksciinte ke grave malsaniĝis usona gastino, tiu ĉefkuracistino usona gastino, tiu ĉefkuracistino pri kormalsanoj tuj ĉesigis la ordigadon kaj venis al Mary kaj komencis streĉe labori por savi ŝin. Pasis du tutaj horoj, anstataŭ reboniĝo de ŝia sanstato aperis ĉe ŝi danĝeraj simptomoj de aŭrikla frua bato kaj maldekstrakora insuficienco, ŝi estis minacata de vivdanĝero. Doktorino Cheng Yunlin tuj raportis tion al la hospitala gvidantaro kaj informis la koncer-

Mary Murray (la kvara de maldekstre) vizitas la pitoreskan urbon Hangzhou.



najn instituciojn pri la vivdanĝero de la pacientino.

Maltrankvile oni observis la sanstaton de Mary. En la kriza momento, ankaŭ Ma Wenzhu, estrino de la kormalsana sekcio kaj specialistino de kardioangiologio, partoprenis en la kuna kuracado. Ŝi faris plenampleksan ekzamenon pri la pacientino kaj atente legis la notojn pri la historio kaj ekzameno pri ŝia malsano. Ŝi konstatis, ke la pacientino suferas ne nur seriozan infekton de la spiraj organoj, sed ankaŭ koran infarkton kaj neritman korbataĉon. Ŝia elektrokardiogramo montris konduktan obstrukcon kaj ŝia miohemoglobino-kvanto superis 340 ng/ML, t.e. pli-ol-kvinoblon de la normo. Kaj krome, ŝi estis tiel grandaĝa kaj malforta. Eĉ tiu spertoriĉa specialistino trovis la kazon malfacilega. Por la resaniĝo de Mary, ŝi prenis sur sin la pezan ŝarĝon de savado. Ŝi diris al la kuracistoj kaj flegistinoj, ke ili faru sian plej-

eblon, eĉ se estos nur centona espero. Rapide ŝi elmetis projekton por kuracado: krom plua provizo de oksigeno kaj korpo-fluido al la pacientino, tuj komenci sistemon de 24-hora deĵorado de fakaj kuracistoj, 24-horan gardadon per elektrokardiografo kaj specialan flegadon.

Sub la direktado de Ma Wenzhu, la kuracado kaj flegado iris bonorde. Por ĝustatempe koni la sanstaton de la pacientino kaj trakti diversajn kuracajn problemojn, ŝi diris al la deĵorantaj kuracistoj kaj flegistinoj, ke oni faru ekzamenon pri la miohemoglobino de s-ino Murray en ĉiu kvara horo. Samtempe, speciala medikamenta ŝranketo estis starigita por enteni diversajn necesajn medikamentojn por urĝa savado kaj korbatiĝan aparaton. Ŝi reiris hejmen nur post plenumo de ĉiuj necesaj aranĝoj.


Jam estis profunda nokto, sed Ma Wenzhu ankoraŭ pensadis pri la pacientino. Ŝi timis, ke


okazos al Mary subita malboniĝo kaj aperos malfacila problemo. Ŝi pensis, ke en kriza horo ŝi, sekciestrino, ne devas forlasi la pacientinon. Sekve ŝi reiris piede al la hospitalo sub la lumo de stratlampoj. Kiam ŝi vidis, ke post preno de medikamento, la akra kordoloro kaj ekstrema malkvieto de Mary estis mildigitaj kaj ŝi jam endormiĝis kviete, ŝi faris longan elspiron kun malstreĉita koro. De tiam ĉiutage ŝi plurfoje ekzamenis per stetoskopo ŝiajn koron kaj pulmojn, kalkulis ŝian pulson kaj mezuris ŝian sangpremon. Kelkfoje, kiam la sanstato de Mary malboniĝis kaj aperis ĉe ŝi seriozaj pulma hidropso, kordoloro kaj malfacilega spirado kun sento de premo al la brusto, Ma restadis ĉe ŝia flanko por fari urĝan savadon.

Post 48-hora streĉa kuracado s-ino Murray fine eldanĝeriĝis. Matene de la tria tago, ŝi sentis ke mildiĝis la premo al la brusto kaj faciliĝis la spirado. Tio ĝojigis precipe s-ron W. Harmon. Li lasis s-inon Betty daŭrigi sian flegadon al la patrino kaj mem forlasis Nanjing kun malstreĉita koro por atingi la delegacion en Beijing.

Kelkajn tagojn poste, subite aperis ĉe Mary tromalmulteco de urino, ĉiutage nur malpli ol 100 mililitroj. Ma Wenzhu tuj modifis la kuracan projekton kun plena zorgo por protekti samtempe la koron kaj la funkciojn de la renoj kaj pulmoj. Por kuraci la renoastenion de s-ino Murray, ŝi venigis kuraciston de la urinologia sekcio. Pro la grandaĝeco, malforteco kaj komplikeco de la kazo, ŝi invitis kuraciston de ĉina medicino por fari kuracadon aplikante la ĉinan kaj okcidentan medic-

Sekciestrino Ma Wenzhu stetoskopas la koron de Mary.





La resaniĝinta Mary (la tria de dekstre), ŝia filino Betty (la dua de dekstre), vicestro de la hospitalo Guan Zhezhaio (la kvara de dekstre) kaj sekiestrino Ma Wenzhu (la unua de dekstre)

nojn en kombino. Sub la influo de sekiestrino Ma, ĉiuj kuracistoj kaj flegistinoj partoprenantaj en la savado laboris diligente kun volonteco kaj deĵoris tage kaj nokte kun alta konscienco.

Unu semajnon poste, Mary jam povis manĝi iom pli multe. Post 10 tagoj, ŝi jam povis ellitiĝi por iom promeni. Kaj post duon-monata zorga flegado, la pacientino tute resaniĝis.

Alproksimiĝis la tago por elhospitaliĝo. Mary kaj ŝia filino montris eksterordinaran emociĝon kaj sentis bedaŭron pro la disiĝo baldaŭ okazonta. Mary diris al la ĉinaj amikoj, ke la 20 tagoj en Nanĵing estas la plej memorindaj en ŝia vivo, kaj ke nur en Ĉinio ekzistas tia intima rilato inter la homoj kaj la maljunuloj estas tiel respektataj de la tuta socio. Ŝi diris al la filino ke tiu skribu dankleteron pro la helpoj.

Ankaŭ ŝia filino Betty sentis same. Ĉio tie okazinta profunde ŝin impresis. Kiam ŝi informiĝis

pri la vivdangero de sia patrino, ŝi vere ne sciis kion fari kaj ekploris. Tiam ŝi vere ne sciis, ĉu la patrino povos resaniĝi, kaj tute ne sciis kiom da malfaciloj ilin atendas en la urbo Nanĵing je miloj da kilometroj for de ŝia patrolando. Sed la faktoj pruvis, ke ŝia maltrankviliĝo estis senbaza. Kvankam la hospitalo ne estis tiel bone ekipita kiel tiuj en Usono, tamen la kuracistoj estas lertaj, laboras kun alta devokonscio kaj havas varman simpatian koron al la pacientoj. Ŝi ne povas forgesi vicestron de la hospitalo Guan Zhezhaio, kiu ĉiutage vizitis ilin en la malsanula ĉambro por rigardi kaj konsoli ŝian patrinon, malgraŭ sia granda aĝo de 72 jaroj. Li zorgis, ke ĉiu postulo de ŝia patrino pri manĝaĵo estu kontentigita, nur se li informiĝis pri ĝi. Vespere de la tago de ilia forveturo, dankletero en la angla lingvo estis portita al la administracio de la hospitalo. Betty skribis en sia letero: "Sen tia zorga kuracado kaj flegado

de la ĉinaj kuracistoj kaj flegistinoj, mia patrino certe ne povus resaniĝi tiel rapide. Reveninte al la patrolando, ni certe sciigos ĉiun en nia ĉirkaŭaĵo pri la okazintaĵoj en tiu ĉi loko."

La 9-an de junio, Mary estis elhospitaliĝonta kaj forveturonta al sia patrolando tra Shanghai! Informiĝinte pri tio, multaj kuracistoj kaj flegistinoj alvenis por ilin adiaŭi kaj fotiĝi kune kun ili por memoro. Vicestro Guan foje kaj refoje admonis ke ili estu singardaj survoje. Sekciestrino Ma Wenzhu speciale pretigis por ili medikamentojn por eventuala urĝa bezono, kaj donis necesajn klarigojn pri ilia aplikado kaj atentindaj aferoj. S-ino Murray diris al la ĉinaj kuracistoj emocie: "Estas vi, kiuj min savis el la manoj de la Morto!"

Ekmoviĝis la trajno el la Nanĵing-a stacio, Mary kaj ŝia filino etendis siajn manojn el fenestro de la kupeo kaj senĉese ilin svingis al la adiaŭantoj, kiuj longe staris sur la kajo sekvante per la rigardoj la foriĝantan trajnon kun kora bondeziro:

Bonan vojaĝon, Mary!



Ĉi-sube ni aperigas ĉerpajojn el leteroj de niaj legantoj. Inter ili troviĝas longa parto de letero de nia danlanda leganto J.H.E. pri Lusin. Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de la granda ĉina verkisto ni jam publikigis kelkajn artikolojn en n-ro 9 ĉi-jare, kaj la ĉerpajo kredeble interesos multajn el niaj legantoj. Krome, pro tiu jubileo ankaŭ rumana esperantistino k-dino M.I., rumana esperantisto k-do K.A. kaj pollanda esperantisto k-do R.S. sendis al ni artikolojn pri Lusin kaj portretan reproduktion de tiu fame konata verkisto. Al ili ni esprimas ĉi tie nian koran dankon.

MI ESPERAS, KE NI LEGOS PLI MULTE PRI LUSIN EN EPĈ

La 25-an de septembro estos celebrata la 100-a jubileo de la naskiĝo de la fama ĉina verkisto Lusin. Mi anticipas ĝojas, ke ni legu pri li en EPĈ. Kun li mi koniĝis en la jaro 1977 kiel la unua ĉina verkisto entute. Tiam mi apenaŭ komencis aboni EPĈ. Kiam mi eniris la Esperanto-centron en Aarhus kaj tie vidis grandan dikan ĉinan libron, mi iom scivoleme studis ĝin, ĉar ĝi estis ja la unua ĉina libro kiun mi iam ajn vidis. Hodiaŭ mi ja havas multajn. Sed tiam mi ĝin aĉetis kiel la unuan libron de Ĉinio. Veninte hejmen mi iom hezitis ĝin legi. Timante ke eble ĝi ne estus por mi, dano, tre facile komprenebla. Ĉar tiam mi ja ne sciis tre multe pri Ĉinio aŭ pri la vivo en Ĉinio, precipe dum la tempo priskribita de Lusin, kiu ja treege multe diferencas de la hodiaŭa pli feliĉa vivo. Sed tiu timeto, kiun mi havis, estis absolute senkaŭzo. Mi ja vere ĝuis ĝin legi. Ankaŭ tre faciligis la legadon multe da tre bonaj klarigoj. Mi do tre forte povas ĝin rekomendi al ĉiu ajn esperantisto en la mondo. Kiam mi pensas pri "La Taglibro de Frenezulo", la unua novelo, kiun mi legis, mi preskaŭ ne povas ne ridi. Kvankam temas pri tragika homo priskribita de Lusin, li tamen verkis tiun novelon tiom humorplena ke legi ĝin sen kelkfoje laŭte ridi, vere estas neeble. Mi trovis ĉiujn liajn novelojn vere majstraj. Nun mi ja legis la plej multajn el ili plurfoje. Kaj legante ilin de-

nove kaj denove, oni absolute ne malplivalorigas ilin. Tute male oni pli kaj pli ŝatas ilin, ĉar Lusin vere sciis skribi pri homoj vive kaj anime, humore kaj serioze. Li vere skribis multajn novelojn. Menciis ilin ĉiujn estus tro. Certe estas ke oni neniam povas enui en kunestado kun la noveloj de Lusin. Mi esperas ke ni legos pli multe pri Lusin en la venontaj numeroj de EPĈ.

Laŭ la letero, kiun li skribis al la redakcio de "La Mondo" la 15-an de aŭgusto 1936, s-ro Lusin mem ne estis esperantisto, sed li tamen estis tre entuziasmigita de la Esperanto-lingvo kaj li ja ankaŭ havis plurajn esperantistajn amikojn kiujn li laŭdis kaj certe li ankaŭ multilate subtenis la Esperanto-movadon.

de **J.H. ERIKSEN** (Danlando)

TRE PLAĈAS AL MI VARIECO DE TEMOJ

Lastatempe mi ricevis tri numerojn de EPĈ 5, 6 kaj 7/1981. Kun vera plezuro mi tralegis ilin kaj trovis interesokaptaj. Se mi devus elekti la plej bonan kaj interesan el ĉi tiuj tri, estus malfacile al mi tion fari, eble la 6-a numero "venkus". Mian atenton vekis en la n-ro 5 precipe la 3 unuaj artikoloj pri aferoj de la ĉina junularo, plue la novelo "En Nia Vilaĝo", en la n-ro 6 "Fremdlandaj Esperantistoj kaj la Ĉina Esperanto-movado", "Pentraĵoj de Gejunuloj" kaj ankoraŭ pli la akompanaj fotoj, ankaŭ la kolora serio sub la sama nomo, "Ruĝa Trapo", "Taras Ŝevĉenko" kaj la aliaj en ĉi tiu n-ro kaj la 7-a.

— LA RED.

Estas bone, ke la enhavo de la revuo ne nur fokusiĝas al nuraj priĉinaj aferoj, sed estas malferma ankaŭ al alilandaj temoj. Pro tio mi ŝatis legi la rubrikon "Tra la Mondo", kaj artikolojn dediĉitajn al granduloj de la mondo kiel T. Ŝevĉenko, Tagore aŭ T.A. Edison.

Tre plaĉas al mi varieco de tuŝataj temoj. Por ĉies plaĉo. Bonvolu tiel daŭrigi.

de **WIESLAW PONCZEK**
(Pollando)


EDISON NE INVENTIS ELEK- TRAN LUMIGADON

Jam de pli ol 20 jaroj mi regule trastudas vian instruan kaj interesan gazeton "El Popola Ĉinio" kun plezuro kaj kontentego. Ĝi estas por mi nepre bezonata ĉiutaga necesajo.

En 1981 n-ro 7 sur la paĝoj 33 ĝis 35 mi trovis artikolon de Toma Macowei pri "Thomas Alva Edison". Li vere inventis tiel multajn gravajn objektojn — sed ne la elektran lumigadon.

Heinrich Grebel, horloĝisto el Hannover, kiu loĝis poste en Nov-Jorko, faris la unuan elektran lampo. Ĝi konsistis el botelo por parfumo, kaj el du karbigintaj bambuaj bastonetoj. Li estigis vakuon en la botelo, kaj ligis la finaĵojn de ambaŭ bastonetoj al pilo. Ekestis lumo sen fumo kaj sen malbona odoro. Tamen, oni konsideras kiel patron de la elektra lampo ne horloĝiston Heinrich Grebel, sed la faman usonan inventiston Thomas Alva Edison.

de **RICHARD WLUKA**
(FR Germanio)



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

LA ĈINA POPOLA LIBERIGA MILITO

(Dua parto)

de TANG BAOLIN

LA AGRA REFORMO EN LA LIBERIGITAJ REGIONOJ


Profunda ŝanĝiĝo sekvis la disvolviĝon de la enlanda milito. En la liberigitaj regionoj, ekde majo de 1946, la Komunista Partio de Ĉinio faris la agraran reformon, en kiu oni disdonis la agroj al la vastaj amasoj de agron malhavantaj kamparanoj, kiuj konsistigis 92% de la kampara loĝantaro. La kamparanoj, liberiĝinte el la kelkmiljara feŭda kateno kaj ricevinte la longe deziratajn agroj, levis altan tajdon de produktado, kio materie garantiis la sukceson de la Popola Liberiga Milito. Por defendi la fruktojn de la venko en la liberigitaj regionoj pli ol du milionoj da kamparanoj arope aliĝis meminitate al la armeo kaj milionoj da homoj servis al la fronto. Tiam en la liberigitaj regionoj estis preskaŭ nenia moderna komunikilo. Sen subteno de la vastaj popolamasoj ne povus venki tiel grandskala liberiga milito.

LA JIANG JIESHI-A REGPOTENCO SIEĜATA DE LA TUTLANDA POPOLO

Estis male en la regionoj regataj de Kuomintango. La sinsekvaj malvenkoj en la milito kaŭzis gravan ekonomian kaj politikan krizon. Profitante la militmaŝinon kaj politikan privilegion, la burokrataj kapitalistoj senprecedence artifice ekspluatis la popolamasojn kaj rabis la riĉaĵojn de ili. Ni prenu emisadon de monbiletoj kiel ekzemplon. La emisikvanto en 1948 470,000-obliĝis kompare kun tiu antaŭ la milito. Sekve de tio salte leviĝis la varprezaro. Kompare kun tiu antaŭ la milito, en la fino de 1947 ĝi kreskis je 145,000-oblo. La monsumo sufiĉis por aĉeti du bovojn en 1937, sufiĉis nur por aĉeti trionon de 1 skatolo da alumetoj. En tiuj cirkonstancoj la ĉinaj naciaj industriaj entreprenoj bankrotis unuj post aliaj. De la dua duonjaro de 1946 ĝis 1947, laŭ la nekompleta statistiko de

pli ol 20 urboj, inkl. de Shanghai (Ŝanhajo), Tianjin (Tiangin), Guangzhou (Kantono) ktp, bankrotiĝis 27,000 fabrikoj kaj firmaoj. La vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj baraktis kontraŭ la Morto. En 1947, en la tuta lando la nombro de la malsatuloj en situacio senelira atingis pli ol cent milionojn. Samtempe kun tio, la kuomintangaregistaro intensigis sian subpremadon al la patriota demokratia movado de diversondaj popolamasoj kaj faris multe da masakroj kaj maljustaj verdiktoj. Ĉio ĉi tio puŝis popolanojn de diversaj socitavoloj en la regionoj regataj de Kuomintango suriri la vojon de unuiĝo kaj memsavado kaj fari mortan batalon kontraŭ la kuomintangaj reakciuloj. La batalo atingis sian kulminon, kiam la studentoj de la altaj lernejoj de Shanghai, Nanjing (Nankino), Beijing (Pekino), Tianjin kaj Chongqing (Ĉongking) levis, en majo de 1947, movadon kontraŭ la enlanda milito, malsato kaj persekuto. Unuiĝinte kun la batalo kontraŭ Jiang Jieshi fare de laboristoj, kamparanoj, urbanoj kaj ĉiuj demokratiaj partioj, la movado formis la duan fronton kontraŭ Jiang Jieshi, kiu forte subtenis la Liberigan Militon. Tiam la Jiang Jieshi-a registaro jam estis sieĝata de la tuta popolo.

La Liberiga Armeo konkeris la Prezidantan Domon.



TRI GRANDAJ KAMPANJOJ KUN DECIDAJ SIGNIFOJ

Kiam la milito eniris en la duan jaron kaj la kuomintangaj trupoj perdis ofensivan povon, la Liberiga Armeo komencis grand-skalan kontraŭatakon. En julio de 1947, la sep kolonoj komandataj de Liu Bocheng kaj Deng Xiaoping perforte transpasis la Flavan Riveron en la sudokcidenta parto de Shandong kaj frakasis unu post alia defendajn liniojn de la malamikaj trupoj. Post pli-ol-50-taga marŝo ili atingis la regionon de Dabieshan-montaro en centra Ĉinio. Ankaŭ la trupoj de la Liberiga Armeo sur aliaj frontoj faris atakojn sinsekve, ekstermis grandan nombron da malamikoj kaj liberigis vastan teritorion. Post unujara militado du milionoj da kuomintangaj trupoj norde de Changjiang (Jangzi)-rivero devigite retiriĝis al la grandaj urboj sur kelkaj fervojoj. Ili estis ĉirkaŭataj respektive sur la batalkampoj nordorienta, nordĉinia, orientĉinia, centraĉinia kaj nordokcidenta. En aŭgusto de 1948 la plej alta aŭtoritato de Kuomintango decidis pluapase redukti la batallinion, evakui la Nordorienton kaj defendi centran Ĉinion. Profitante tiun ŝancon, la komandejo de la Liberiga Armeo decideme organizis tri grandajn kampanjojn por plene ekstermi la kuomintangajn ĉefajn fortojn.

Tibetanoj festas la pacan liberigon de Tibeto.



1. La Liaoshen-kampanjo. Por malhelpi la kuomintangajn trupojn retiriĝi suden de la Granda Muro, KPĈ decidis organizi la unuan kampanjon en la Nordoriento. La 12-an de septembro de 1948, la Nordorienta Popola Liberiga Armeo kun pli ol 700,000 militistoj, komandate de generaloj Lin Biao kaj Luo Ronghuan laŭ la milita dispozicio de la komandejo, unue konkeris Jinzhou, la sudan pordon de la Nordoriento, devigis parton de la malamikaj trupoj, garnizonantaj en Changchun, ribeli kaj la alian parton kaptulaci, kaj poste tenajle atakis Shenyang, la centran urbon de la Nordoriento. La 2-an de novembro Shenyang estis konkerita kaj la tuta Nordoriento liberigita. En sia trimonata militado la Liberiga Armeo ekstermis sume 470,000 malamikajn armeanojn.

2. La Huaihai-kampanjo. La defendlinio kun Xuzhou de orienta Ĉinio kiel centro estis ĉiam rigardata de Jiang Jieshi kiel vivlinio protektanta lian koran regionon Nanjing kaj Shanghai. Li sendis tien bone ekipitajn trupojn el 800,000 armeanoj por defendi. La Orientĉinia kaj Centraĉinia Liberiga Armeo kun pli ol 600,000 soldatoj sub la komando de generaloj Chen Yi, Su Yu, Liu Bocheng kaj Deng Xiaoping, ekde la 6-a de novembro de 1948 faris atakon al la kuomintangaj tru-

poj en la vasta regiono de Haizhou oriente ĝis Huaiherivero sude. En la batalo de 65 tagoj ĝi ekstermis pli ol 550,000 malamikajn trupanojn kaj kaptis viva Du Yuming, la vickomandanton de la malamikaj trupoj. La kampanjo estis la plej grandskala en la Popola Liberiga Milito. El la venko rezultis, ke Nanjing, la ĉefurbo de la Kuomintanga registaro, fariĝis senŝirma kontraŭ la atako de la Liberiga Armeo.

3. La Pingjin-kampanjo. Kiam la Liaoshen-kampanjo gajnis venkon kaj la Huaihaikampanjo glate iris, la kuomintangaj trupoj en norda Ĉinio ekstreme maltrankviliĝis. Ili kunpremiĝis ĉe la linio de Beiping, Tianjin kaj Zhangjiakou kaj pretis por fuĝi suden aŭ okcidenten. Aplikante la militan principon "Rapideco valoregas en milito", la komandejo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo ordonis siajn trupojn en la Nordoriento rapide marŝi suden de la Granda Muro kaj kune kun la trupoj de ĈPLA sub la komando de generalo Nie Rongzhen dispartigi kaj ĉirkaŭi la malamikajn trupojn por ke la lastaj falu en seneliran situacion. Post intensa batalado kaj konkerinte Zhangjiakou kaj Tianjin la Liberiga Armeo faris potencon politikan ofensivon al generalo Fu Zuoyi, sieĝata en Beiping, kaj fine devigis lin konsenti pri paca reorganizo de liaj trupoj. La 31-an de januaro de 1949 Beiping estis paca liberigita (poste ĝi alinomiĝis Beijing). En tiu kampanjo pli ol 520,000 malamikaj trupanoj estis ekstermitaj. La paca liberigo de Beiping donis ekzemplon al liberigo de multaj urboj en suda Ĉinio.



Prezidanto Mao Zedong proklamis la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko en Beijing la 1-an de oktobro, 1949.

kuomintanga registaro, kiu regis Ĉinion dum pli ol 20 jaroj, estis renversita. Sekve la Liberiga Armeo forbalais la restintajn malamikajn trupojn. En la fino de septembro de 1949 la Popola Liberiga Milito gajnis fundamentan venkon tra la tuta lando. En majo de 1951 Tibeto estis pace liberigita. Tiel la tuta lando, escepte de Taiwan-provinco, estis liberigita.

La 1-an de majo de 1949, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio alvokis rapide okazigi politikan interkonsiliĝan konferencon kaj establi demokratian koalician registaron surbaze de interkonsiliĝo. Tuj respondis ĉiuj demokratiaj partioj kaj progresemaj elementoj kaj sendis siajn reprezentantojn al la liberigita regiono. En la 21-30-a de septembro de 1949 la nova Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco okazigis sian unuan plenan sesion en Beijing, ellaboris dokumentojn "La Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco" kaj "La Organiza Leĝo de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko", kaj elektis Mao Zedong kiel prezidanton de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko. La 1-an de oktobro de 1949 solene celebriĝis la fondo de la Ĉina Popola Respubliko sur la Tian'anmen-placo de Beijing.

LA FONDIĜO DE LA NOVA ĈINIO

Dank' al la venko de la tri grandaj kampanjoj, duono de Ĉinio, t.e. la vasta regiono norde de Changjiang-rivero, estis liberigita. La plejparto de la elitaj trupoj de Jiang estis ekstermita, kaj restis al li nur trupoj kun pli ol miliono da personoj kiuj garnizonis sude de Changjiang-rivero kaj estis dislokitaj en la vasta regiono kaj sur longa battalinio. Vidante ke la venka marŝo de la popola revolucio estas ne haltigebla sole per militado, Jiang Jieshi intencis malhelpi la suden-marŝon de la Popola Liberiga Armeo pere de Changjiang-rivero unuflanke, kaj ekmanovris "pacan ofensivon" aliflanke. La 1-an de januaro de 1949, Jiang faris deklaron, ke li pretas fari pacan intertraktadon kun la Kompartio de Ĉinio.

Prezidanto Mao Zedong ĝustatempe malkaŝis la pacan intrigon de Jiang kaj faris la alvokon

"Konduku la revolucion ĝis la fino". Samtempe li elmetis la ok kondiĉojn, kiaj "puni la militkrimulojn", "aboli la naciperfidajn traktatojn", "kunvoki politikan interkonsiliĝan konferencon* sen ĉeesto de reakciuloj kaj establi demokratian koalician registaron". Tiutempe Jiang estis devigita ekŝi je sia ofico, kaj Li Zongren, militaristo de la Guangxi-a kliko, estis puŝita kiel aganta prezidanto por fari intertraktadon kun la Kompartio de Ĉinio. La 20-an de aprilo Kuomintango rifuzis subskribi la traktaton, kio malkaŝis ĝian maskon al la tutlanda popolo.

La 21-an de aprilo de 1949 Mao Zedong, prezidanto de la Ĉina Popola Revolucia Milita Komisiono, kaj Zhu De, ĉefkomandanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, donis la ordonon pri "landskala antaŭenmarŝo". La miliono da bravaj batalantoj de la Liberiga Armeo rompis la defendan linion de Changjiang-rivero, kaj rapide konkeris Nanjing la 23-an de aprilo, tiel ke la

La fondiĝo de la Popola Respubliko markis la finiĝon de la historio de la ĉina demokratia revolucio, ekde tiam la ĉina popolo eniris novan historian etapon.

* La Politika Interkonsiliĝa Konferenco funkciis kiel provizora parlamento kaj Komuna Programo ellaborita de ĝi funkciis kiel provizora konstitucio.

Novaj Koloraj Infanlibroj


eldonitaj de "El Popola Ĉinio"

Neĝa Infano

(88-Es-179P)

Bildrakonto pri neĝa infano, kiu brave savis
kunikleton el fajro kaj sin oferis.

18×20.5cm. 40 paĝoj prezo: £0.65 US\$1.30



Pesi Elefanton

(88-Es-181P)

Enhavanta sep bildrakontojn pentritajn en la ĉina
stilo: Pesi Elefanton; Lerni Kaligrafion; Elpreni
Pilkon; Rompi Grandan Akvarion; Kudriligi
Ferstangon; Pentri Tigron; Pentri Lotuson.

18 × 20.5 cm. 91 paĝoj
prezo: £1.60 US\$3.30

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC

aŭ

Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

REN ZONGXIN:

KONFERENCO PRI LA MONDA KRIZO DE ENERGIO

EN aŭgusto UNO okazigis en Nairobi, la ĉefurbo de Kenjo, la Konferencon de Novaj kaj Renovigeblaj Energioj, por trovi solvon de la monda krizo de energio. Ĝi estas la unua grava internacia konferenco pri energio depost la apero de la monda krizo de energio en la jaro 1973.

Iom-post-ioma aplikiĝo de petrolo kiel la ĉefa fonto de energio de la mondo anstataŭ karbo, multe akcelis la disvolviĝon de la monda ekonomio en la dudeka jarcento, precipe tiun de industrio. Tamen ekde la sepdekaj jaroj, antaŭvidebliĝas la elĉerpiĝo de certaj gravaj rezervejoj de petrolo, sekve de rapida konsumado de energio. Kaj la impeta altiĝo de petrola prezo rekte influas la ekonomion de plejparto de la landoj, precipe la evoluantaj landoj de la mondo. Nun plejparto de la landoj tra la mondo zorgas pri la demando, ĉu aperos nova energia krizo.

Dume, en la vasta kamparo de la mondo kun du miliardoj da loĝantoj ne estas sufiĉe da hejtajoj. Dokumento publikigita de la

informa oficejo de UNO asertas, ke en 1950 kvarono de la senakvaj partoj de la terĝlobo estis kovrita de arbaroj, sed nun duono de la arbaroj jam malaperis sub hakiloj, buldozoj, ĉensegiloj kaj fajregoj. Ĉ. 5,000,000 anglaj akreoj da arbaroj estas forbruligitaj kiel hejtajoj ĉiujare en Afriko. Enketo de la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo de UNO montras, ke pli ol cent milionoj da loĝantoj de la mondo suferas pro serioza manko de hejtajo kaj pli ol miliardo da loĝantoj sentas malfacilecon en akiro de brulligno. Kaj krome la rapida detruo de arbaroj kaŭzas perdon de akvo kaj grundo kaj malbonigas la homan vivmedion.

Tiu krizo konata kiel “duobla energia krizo” formis seriozan premon precipe al la evoluantaj landoj. Ni prenu Kenjon kiel ekzemplon. 84 procentoj de ĝia energio konsumata por komerco estas importita petrolo. En 1979 ĝi elspezis 120,000,000 kenjajn pundojn por importi petrolon kaj en 1980 eĉ 256,000,000 kenjajn pundojn. Kaj 90 procentoj de ĝiaj loĝantoj vivas en vilaĝoj kaj forbruligas ĉiujare 22,000,000 tunojn da brulligno. En tiu lando estas nur 1,500,000 hektaroj da arbaroj, kiuj konsistigas nur 2.5 procentojn de la totala areo de la lando. Se oni konsumados brullignojn en tia kvanto, tute pereos la arbaroj de Kenjo en la jaro 2000.


Tial solvi la mondan krizon de energio estas komuna volo de ĉiuj evoluantaj kaj evoluintaj landoj. Laŭ tiu volo, la 33-a Kongreso de UNO en 1978 decidis okazigi la nomitan konferencon en Nairobi. En tiu konferenco oni diskutis pri la demando kiel rapidigi la ekspluatadon kaj utiligon de diversaj novaj kaj renovigeblaj energioj. Kaj krome oni faris planon por mobilizi ĉiujn landojn, en dependo de petrolo kiel la ĉefa energio, doni sufiĉan atenton al 14 novaj kaj renovigeblaj energioj, nome sunenergio, geotermo, ventoforto, akvoenergio, bioenergio, energioj de brulligno, lignokarbo, torfo, ole-skisto kaj bitumoza sablo, oceana energio, ondenergio, tajdenergio kaj brutoforto. La delegitoj pristudis la latenton de tiuj energiaj fontoj kaj la limigojn en utiligo de ili, kaj ankaŭ rimedojn por rompi la limigojn.

Kvankam nur 15 procentoj de la totala kvanto de la konsumata energio devenas de la fonto de novaj kaj renovigeblaj energioj, tamen tiu ĉi fonto havas grandan latentan forton. Ekzemple, nun en la mondo 23 procentoj de la elektro produktita de la mondo devenas de la hidroelektrejoj. Tamen 90 procentoj de la akvoenergioj de la evoluantaj landoj ne estas utiligataj. Alia ekzemplo estas, ke la rezervo de torfo en la tuta mondo egalas cent miliar-

Sunelektrejo de Japanio



Metanbaseno de Ŝtata agrikultura entrepreno de Rumanio



dojn da tunoj da petrolo aŭ duonon de la natura gaso rezervata de nia tero, tamen tiu riĉaĵo ne estas ekspluatata kaj utiligata.

Por doni elokventajn konkretajn ekzemplojn, la konferenco aranĝis ekspozicion pri energio en la Internacia Konferenco-centro Kenyatta. Dekoj da landoj montris en ĝi siajn novajn instalaĵojn por utiligi sunenergion, bioenergion kaj aliajn renovigeblajn energiojn.

Dum la kunvenado, pli ol 140 delegitoj de diversaj landoj kaj koncerna organizo de UNO faris paroladojn kaj multaj el la delegitoj esprimis grandan zorgon pro la serioza influo de la nuna energia krizo al la nacia ekonomio, precipe en la evoluantaj landoj, kiuj devas importi petrolon.

Iu oficisto de UNO diris, ke la elspezo de afrikaj landoj por importo de petrolo kreskis de la sumo de 800 milionoj da usonaj dolaroj en 1973 ĝis 7 miliardoj kaj 400 milionoj da usonaj dolaroj, je 37 procentoj en ĉiu jaro. Laŭ takso de la Internacia Mona Fonduso, la defcito de la landoj de la Tria Mondo, kiuj importas petrolon, atingos 97 miliardojn da usonaj dolaroj en la kuranta jaro. Delegito de Sudano diris, ke lia lando jam elspezis pli ol

90 procentojn de siaj fremdaj valutoj por pagi importitan petrolon. Delegito de Venezuelo diris, ke la energia problemo estas neapartigebla de la aliaj ekonomiaj problemoj nun alfrontataj de la mondo. Rumana delegito emfazis, ke starigo de nova internacia ekonomia ordo karakterizata de egalrajta kaj justa nova interrilato estas "absolute necesa premiso" por solvi la problemon de energio. Ĉina delegito montris, ke ĉiuj evoluintaj landoj de malsamaj ekonomiaj sistemoj devas helpi la evoluantajn landojn en esplorado, disvolvado kaj utiligado de novaj kaj renovigeblaj energioj.

Post ripetfoja interkonsiliĝo, ĉefe inter la evoluintaj kaj evoluantaj landoj, plano pri ekspluatado kaj utiligo de novaj kaj renovigeblaj energioj estas unuanime akceptita. Tiu plano montris la seriozecon de la monda energia problemo kaj la neceson kaj neeviteblecon de transiĝo de la nuna internacia ekonomio bazita sur hidrokarbidoj al tiu sur novaj kaj renovigeblaj energioj. La plano montris, ke tia transiĝo de energia fonto konformas al la interesoj de ĉiuj landoj. Se tiu transiĝo iros surbaze de justa kaj

publika kunlaborado, tiam ĝi alportos ŝancon por ekonomia kaj socia disvolviĝo precipe de la evoluantaj landoj kaj reduktos la nunan dependecon en ekonomio kaj teknikoj. La dokumento emfazas, ke efika transiĝo de energio nepre devas konformi al la principo, ke ĉiu lando havas plenan kaj eternan suverenecon super siaj naturaj riĉfontoj, kaj devas konformi al ĝia ŝtata plano. La plano diras: "Akceli la ekspluatado kaj utiligon de novaj kaj renovigeblaj energioj estas antaŭ ĉio devo de ĉiuj koncernaj landoj." Kaj samtempe, "ankaŭ internacia kunlaborado estas normalhavebla, kaj devas helpi kaj subteni la klopodadon de ĉiu lando". En tio "la evoluintaj landoj portas apartan respondecon". La plano alvokas al la evoluantaj landoj, internaciaj financaj institucioj kaj aliaj internaciaj organizoj liveri pli multe kaj sufiĉe da kapitalo por subteni la evoluantajn landojn en grand-skala ekspluatado de novaj kaj renovigeblaj energioj.

La konferenco proponis fondi, en la kadro de UNO, specialan komisionon kaj interregistaran institucion por direkti kaj supervidi la plenumon de tiu plano.

(Daŭrigo de p. 48)

La kronprinco poste refoje naskiĝis kiel kronprinco kaj fariĝis kreinto de budhismo Ŝakjamunio.

Antaŭ la klifo staras ŝtona elefanto kun la piedoj sur lotusfloroj. Apud la elefanto estas gravurita dresanto kun T-forma hartubero laŭ la tipo de la Orienta Han-dinastio (25—220 p.K.). Je 40 metroj for de la ŝtona elefanto videblas fajna artaĵo—ŝtona bufo vigleca, preta salti. Laŭ ĉina antikva legendo bufo simbolas lunon kaj feliĉon kaj ofte videblas en ĉinaj silkobil-

doj kaj ŝtonaj skulptaĵoj antaŭ la dua jarcento.

La malkovro de la tieaj ŝtonskulptaĵoj pruvis ke jam en la 2-a jc. ĉinoj komencis prezenti budhajn rakontojn per tradicia skulpturo. Ĝi diferencas de la skulptaĵoj de la Yungang-aj ŝtonaj kavernoj de Datong kaj la Longmen-aj ŝtonaj kavernoj de Luoyang en intensa gandhara* stilo. Pro tio iuj arkeologoj asertas, ke la tiea budhismo enkondukiĝis eble tra mara vojo. Antaŭe la ĝenerala opinio estis ke la ĉina budhismo enkondukiĝis el Hindio tra Xinjiang kaj Gansu en

la okcidenta parto de nia lando en la 1-a jc. La skulptaĵoj de Kongwang-monto havas gravan signifon por studi la ĉinan budhisman historion, la budhisman arton kaj kulturen intersanĝon inter Ĉinio kaj la okcidentaj landoj.

* Gandhara estas loko de la antikva Hindio. Ĝi situis inter la nunaj Peŝavano kaj najbara orienta parto de Afganio. Antaŭ la 3-a jc. budhismo enpenetriĝis tien kaj iom post iom formiĝis gandhara budhisma arto.



Ŝtona homfiguro

Kongwang-monto de Jiangsu-provinco, sur la bordo de la Orienta Ĉina Maro, nun altiras al si arkeologojn kaj belartistojn per sia nove trovita ŝtona skulptaĵaro antaŭ 1800 jaroj, kiu pruviĝas la plej frua ŝtona figuraro pri budhismo en Ĉinio. Antaŭe oni prenis la Ŝtonkavernaron de Dunhuang estiĝintan en 336 p.K. kiel la plej fruan en la speco, sed fakte tiuj de Kongwang-monto formiĝis pli frue je 200-300 jaroj.

En la 15-a jc. oni jam notis la tieajn skulptaĵojn, sed misprenis la figurojn por bildoj de Konfuceo, la ĉina antikva pensulo kaj edukisto, kaj liaj disĉiploj. Nur antaŭ nelonge la ĉinaj arkeologoj konvinkiĝis, ke ili temas pri budhismo, do la budhisma skulpturo de Ĉinio komenciĝis pli frue je 2 aŭ 3 jc.

Kongwang-monto longas je ĉ. 700 metroj de oriente ĝis okcidente kaj altas je 129 metroj. Kiel fama pitoreskejo, la tuta monto estas kovrita de verdaj cipresoj kaj pinoj kaj fruktarboj. Tie kontinue fluas riverakvo. La nomita ŝtona skulptaĵaro troviĝas en la okcidenta ekstremo de la suda parto de la monto kaj estas farita en la natura rokmuro 17 metrojn longa kaj 8 metrojn alta. La skulptaĵaro konsistas el 105 figuroj. Ĉiuj figuroj, ĉu staraj aŭ sidaj, diferencas unu de alia. La plej granda el ili similas al vera homo kaj la plej malgranda altas nur je dekkelke da centimetroj.

En la centro videblas du plej

Surklifa ŝtona skulptaĵaro de Kongwang-monto

de LUO CAO

grandaj figuroj, ĉirkaŭ kiuj troviĝas statuoj sidaj, staraj kaj kuŝaj. Ili kune formis harmonian tuton. Pluvoj kaj ventoj serioze eroziis la figurojn, el kiuj iuj jam fariĝis ne kompletaj aŭ ne klare videblaj, tamen ankoraŭ evidentiĝas sur la rokmuro la linioj karakterizataj de simpleco kaj viveco. La figuroj estas aŭ skulptitaj reliefe aŭ gravuritaj. La antikvaj artistoj unue desegnis la homfigurojn sur la rokmuro kaj poste forĉizis la ĉirkaŭaĵon profunde je 2 aŭ 3 centimetroj, tiel ke la figuroj elstariĝis. Post tio ili delikate gravuris la homajn vizaĝojn, manojn, piedojn kaj la vestofaldojn tiel, ke la homfiguroj reliefiĝis kaj fariĝis pli vivecaj. Tiuj artaĵoj estas en stilo ĝenerale simila al tiu en la periodo de imperiestro Huan (147 — 167 p.K.) de Han-dinastio.

En la centro de la surklifa skulptaĵaro troviĝas du plej grandaj sidaj statuoj, el kiuj unu altas je 1.11 metroj kaj la alia je 1.54 metroj. Kun trankvilaj mienoj ili ambaŭ aspektas aplombe kaj senĝene, tenante sin fiere. Arkeologoj asertis, ke ili estas Huang Di, la prapatro de la ĉinoj laŭ legendo, kaj Laozi, la kreinto de taoismo. Ili ambaŭ estas respektitaj de la ĉinaj kredintoj de taoismo kiu estas originala religio de Ĉinio. Post kiam budhismo estis enkondukita en Ĉinion, ĝi kunfandiĝis kun taoismo.

Malsupre de la centro de la skulptaĵaro troviĝas grupo da figuroj. Ĝi konsistas el 57 homfiguroj okupantaj spacon longan je 4.6 metroj de oriente ĝis okcidente kaj altan je 2.3 metroj en la okcidento kaj je



1.4 metroj en la oriento. En la centro surdorse kuŝas karnruĝa busto en rondkoluma jaketo kun la dekstra mano apoganta ĝian vangon. Kaj la ceteraj figuroj kun rondaj vizaĝoj bareliefaj aŭ gravuritaj troviĝas ĉirkaŭe sur griza rokmuro. Ĉu viro aŭ virino, ĉu juna aŭ maljuna, ili portas rondkolumajn vestojn. Iuj el ili portas ĉapon, aliaj havas hartuberojn, triaj portas florojn sur la kapo kaj kvaraj estas kalvaj. Ĉiuj ĉi figuroj rigardas al la kuŝanta statuo kun funebra miĝo. Arkeologoj asertas, ke ĝi estas bildo pri nirvano de Budho. Ĝi rakontas, ke plenuminte sian taskon klerigi la karnulojn, Sakjamunio estas leviĝonta en la paradizon, kaj ĉiuj liaj disĉiploj ploras.

En la orienta ekstremo videblas alia kuŝanta statuo 1.55 metrojn longa kaj 0.45 metron larĝa, kun pinta ĉapo kaj kuloto. Kun nuda trunko kun elstaraj ripoj kaj malgrasa vizaĝo, li aspektas trankvila. Sur la statuo gravuriĝis tigo kiu englutas kun malfermita faŭko lian ventran karnon. Tio prezentas la budhisman rakonton "Kronprinco Mahasattva Jataka sin oferas al tigo". Ĝi rakontas, ke dum ekskurso kun la reĝo kronprinco Mahasattva Jataka vidis malsatan tigrinon kun 7 tigridoj en neĝtago minacataj de morto pro malsato kaj frosto. Li tre kompatis ilin kaj sin jetis al ili. Kaj timante ke la tigrino eble ne volas lin manĝi, li sangigis sian kapon per bambupikilo. La tigrino lekis la sangon kaj poste ekvoris lian karnon. La kronprinco viktimiĝis kaj la tigroj estis savitaj.

(Daŭrigota sur p. 47)

NACIAJ KANTOJ K DANCOJ

Kantoj kaj dancoj de la hani-oj

Fotoj de YAN JIN

La hani-a nacieco kun pli ol 960,000 anoj vivas en Yun-nan-provinco de Ĉinio. Ĝi havas longan historion kaj riĉan kulturon. La virinoj estas lertaj en brodado kaj la viroj lertaj en skulptado. Ili ĉiuj, ĉu junaj aŭ maljunaj, amas kanti kaj danci. La dancoj estas tre diversaj: iuj gajaj kaj viglmovaj, aliaj lirikaj. La kantoj dividiĝas en du specojn: popolkantoj kaj vinkantoj. La antaŭaj estas riĉaj en have, kaj la lastaj, laŭ malsamaj drinkadoj, havas multe da melodioj. Ili ĉiuj estas plenaj de nacieca vivetoso.




La danco "Gaja Arĝenta Sonorilo"




Virina solo

Danco en tamburado





Budho en han-aj kostumo kaj ĉapelo






La suda piedo de

Ŝtona Skulpturo Kongwang

Ŝtona elefanto

Ŝtona bufo





ongwang-monto, kie troviĝas ŝtona skulptaĵaro



Staranta budho

otajaro de monto

Reliefaro

Fotoj de REN SHIYIN

